

# EL POPOLA ĈINIO

中國報道



12 1982






# Sportoj de Ĉinaj Nacimalplimulto

Fotoj de Li Weipu




Ĉevalkonkurso, unu el la tradiciaj sportoj de mongoloj




Lukto de koreoj. La venkinto ricevas bovon kiel premion. Tiu sporto estas ŝatata de multaj ĉinaj nacimalplimulto.

Pilkoludo de gaŭŝan-oj. La ludo okazas inter gaŭŝan-aj junuloj en vilaĝoj en Taiwan kaj Guangdong. La ludantoj per stango 7-8 metrojn longa en la mano pikas pilkon falantan en la aero, kaj venkas tiu, kiu la unua trafas la pilkon.



Poloo de mongoloj





Bovobatalo de huj-oj, diferenca kun tiu de la hispanoj.  
La toreisto firme kaptas la kornojn de la bovo kaj  
per diversaj manovroj perdigas al la bovo ekvilibron  
kaj fine ĝin faligas teren.



Turnado sur rado de tu-oj









Arkopafo de tibetanoj. Oni ekipas la sagpinton per sonigilo. Kiam la sago forlasas la arkon, ĝi eligas tre plaĉan sonon.

Stangopuŝado de ĉjang-oj. Legendo diras, ke antaŭ mil jaroj ĉjang-aj junuloj venkis la malamikon per stangoj kaj lancoj. La posteuloj okazigas stangopuŝadon por elekti siajn bravulojn.



Trapezoludado de koreaj virinoj

Surŝnura irado de ujguroj. Laŭ la oblikve ligita ŝnuro la ludanto iras desur la tero al la pinto de stango je pli ol 30 metroj alta, farante diversajn danĝerajn movojn dum la irado.





Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto: Esperanta Sekcio de Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj (GUOJI SHUDIAN) P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

## Enhavo

### SUR LA KOVRILO:

Dahur-a hokeisto  
 Foto de CHUN QU

### SUR LA DORSKOVRILO:

Taj-a kuracistino (Ĉinstila pen-  
 trajo)  
 de YAO YOU DUO

### KOLORAJ SERIOJ:

Sportoj de ĉinaj nacimalplimulto  
 La monto Wudang  
 Fotoj faritaj de Esp-istoj  
 La Imperiestra Palaco en Shen-  
 yang kaj la tri maŭzoleoj de  
 Qing-dinastio

Ĉinstilaj pentraĵoj

### NIGRAJ-BLANKAJ SERIOJ:

Fotoj faritaj dum mia trimil-  
 kilometra vojaĝo  
 Vojaĝo de esperantistoj el kvin  
 landoj en Ĉinio

|  |    |
|--|----|
| Kunveno de tradiciaj sportoj de la ĉinaj nacimalplimulto   | 2  |
| La ĉina ŝipkonstrua industrio en marŝado   | 6  |
| Vizito al Mulan  | 8  |
| NIA KULTIVEJO: Vizito al esperantisto-lingvisto Cen Qixiang                                      | 10 |
| Du semajnoj en Japanio   | 12 |
| En Ĉinio renaskiĝas pionira spirito  | 18 |
| Esperantistoj el kvin landoj vizitis Ĉinion  | 16 |
| ESP-NOVAĴOJ  | 20 |
| VIDINDAJ LOKOJ: Vojaĝo al la monto Wudang  | 24 |
| Karmemore al doktoro Kotni   | 22 |
| La domo de kriplaj infanoj   | 27 |
| Kiel aprezi ĉinstilajn pentraĵojn?   | 29 |
| Virina lando (Elektita ĉapitro el la ĉina klasika romano "Pilgrimado al la Okcidento")           | 36 |
| MIA VIVO: Tutkore servi al la patrujo  | 32 |
| 5 000 JAROJ DE ĈINIO: Ekonomio kaj kulturo de la Okcidenta Han-dinastio                          | 42 |
| HISTORIAJ OBJEKTOJ: La Imperiestra Palaco en Shen-<br>yang kaj la tri maŭzoleoj de Qing-dinastio | 51 |
| Por ke la homaro vivu en bela medio  | 44 |
| AMIKECO  | 41 |
| KALEJDOSKOPO   | 48 |
| KURANTAJ AFEROJ  | 49 |
| INTER NI   | 46 |
| KORESPONDI DEZIRAS   | 15 |

|  |        |       |             |           |       |          |        |       |            |  |      |             |             |       |        |       |      |
|--|--------|-------|-------------|-----------|-------|----------|--------|-------|------------|--|------|-------------|-------------|-------|--------|-------|------|
| JARABONTARIFO  | Belgio | BF    | 180.00      | Finnlando | FMK   | 24.00    | Italio | Lit   | 5200       | Nederlando                                   | Gld. | 12.60       | Portugaliao | Esc   | 400    |       |      |
| Aŭstralio  | SA     | 5.70  | FR Germanio | DM        | 10.80 | Francio  | FF     | 26.00 | Japanio    | Yen  | 1400 | Nov-Zelando | NZ\$        | 6.70  | Usono  | US\$  | 6.00 |
| Aŭstrio  | Sch    | 80.00 | Britio      | £         | 3.00  | Hispanio | Pts    | 600   | Jugoslavio | Din.   | 180  | Svisio      | SF          | 10.00 | Kanado | Can\$ | 7.20 |
| Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko: £ 2.20 US\$ 4.30 |        |       |             |           |       |          |        |       |            | Por aliaj landoj en Eŭropo: £ 3.00 US\$ 6.00 |      |             |             |       |        |       |      |



XIAO REN:



## *Kunveno de Tradiciaj Sportoj de la Ĉinaj Nacimalplimulto*

**S**EPTEMBRE de 1982 en Huhhot, la ĉefurbo de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio, Ĉinio, okazis grandioza kunveno de tradiciaj sportoj de la ĉinaj nacimalplimulto. Ĝin ĉeestis sportantoj kaj spektantoj el la 55 ĉinaj nacimalplimulto. Estis pli ol cent tradiciaj sportobranĉoj, inter kiuj troviĝis sagopafado kaj luktado por konkurso. Estis rava kaj admirinda la brila prezentado kun nacia gusto kaj nacia spirito.

Tiuj tradiciaj sportoj strikte ligiĝas kun laboro kaj vivo de la koncernaj nacimalplimulto. Kupto de kapro, kiun mi vidis

en la sportkunveno, estas surĉevala sporto ŝatata de kazaĥoj, ĥalĥazoj, taĝikoj kaj ujguroj. Oni unue metis buĉitan kapron sur vastan stepon kaj post tio anoncis la komencon de kaptado. Tiam svarmo da rajdantoj rapidegis al la kapro. Iu lerta rajdanto sur galopanta ĉevalo prenis la kapron, metis ĝin sub la piedringan rimenon kaj kuris plenforte, dum la aliaj rajdantoj postkuris lin por kapti la kapron. Formiĝis pluraj grupoj, ĉiu ofte el dekelkaj rajdantoj. Kiam iu el la grupo kaptis la kapron, la aliaj ŝirmis lin, kaj la triaj kure sekvis por bari rajdantojn de

aliaj grupoj. Se iu kaptis la kapron kaj sukcesis porti ĝin al la difinita loko, lia grupo do venkis kaj rajtis ricevi la kaptajn. La aktivado okazas ofte dum festotago kaj geedziĝa ceremonio.

La plej mirinda estis la ŝnurirado de ujguro. Ŝnuro okdek metrojn longa kaj kvar centimetrojn dika pendis inter la tersurfaco kaj la supra fino de ligna stango alta tridek metrojn. En muzika akompano la 53-jara ujguro Lulo Ashim, kun ligna stango du metrojn longa en la manoj por ekvilibro, nudpiede supreniris sur la ŝnuro. Li facilpaŝe kaj aplombe iris sur la




*Surĉevala akrobataĵo*

ŝnuro, kun korpo oblikva, kun la okuloj kovritaj per tuko, kun metalaj teleroj ligitaj al la piedoj. Li jen sidiĝis, jen stariĝis, jen saltetis sur la ŝnuro. Subite, kiam li iris ĝis la supra fino de la ŝnuro, li ne povis firme stari kaj ĵetiĝis malsupren. La rigardantoj ekkriis de tio kaj deturnis sian rigardon. Kiam ili relevis la okulojn, ili vidis, ke nur lia mantelo falas ŝvebante kaj li, kun piedoj alkroĉitaj al la ŝnuro, sin turnas je 180 gradoj kaj sekure sidiĝas sur la ŝnuron. Tiam kulminis la danĝera prezentado, kiu montris la bravecon de la ujuguroj.

Ankaŭ brila estis la prezentado de la mongola surĉevala arkopafado. La ĉinaj mongoloj, kiuj sin okupas ĉefe pri paŝtado, loĝas sur vasta stepo en norda Ĉinio. Jam en sia infanaĝo la paŝtistoj komencis dresi furiozajn ĉevalojn kaj fariĝis lertaj en rajdado kaj arkopafado. Kaj el tio nature sekvis ilia surĉevala sporto, kiu ne nur utilas al sano, sed ankaŭ kulturasaĝecon, kuraĝecon kaj vigecon. En la sportkunveno la mongolaj sportantoj konkursis pri longdistanca ĉevalkurado kaj prezentis diversajn surĉevalajn sportojn, kiel "surĉevala dehaki arbobrandaĉojn", "transrajdi barierojn" kaj "surĉevala pafi sagojn".

La sportoj de nordaj nacimallimultoj de Ĉinio impresis per malmildeco, senĝeneco kaj danĝereco, dum tiuj de la sudaj per mildeco kaj gracieco de dancovoj.

Ludo de saketoj venis el la provinco Guizhou en sudokcidenta Ĉinio. Ĝin tre ŝatas buji-aj gejunuloj. Legendo diras, ke antaŭ tre longa tempo vivis saĝa kaj bela buji-a knabino Kangmei. Ŝin amis multaj junuloj. Iun



*Sportantoj de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio surkamele eniras en la stadionon.*

tagon sep junuloj sin turnis samtempe al ŝi por peti ŝian manon. Ŝi diris al ili, ke ili venu la 15-an tagon de la unua monato laŭ la luna kalendaro. Kaj ses el ili venis frumatene de tiu tago. Kangmei ĵetis al ili sep saketojn respektive kun rizo, glueca rizo, milio, sorgo, tritiko, maizo kaj brano, kaj diris, ke ŝi edziniĝos al tiu, kiu elektos la saketon, kiun ŝi preferas. La ses junuloj konkure prenis po unu, lasante tiun kun brano. En tiu tempo la sepa junulo alvenis kaj levis la lastan saketon. Kangmei demandis lin, kial li malfruis. Li diris la kaŭzon, ke hejme li pistis rizon kaj portis akvon por sia patrino. Kangmei ekamis tiun diligentan junulon kaj edziniĝis al li. Tiel la ludo de saketoj fariĝis populara ĉe la buji-oj kaj herediĝis de generacio al generacio. Ĉiujare en la 15-a de la unua monato kaj festotago, buji-aj gejunuloj venas al ebena spaco ĉe vilaĝo por ludi saketojn. Ili, starantaj en du vicoj distancantaj ĉ. dudek metrojn unu de la alia, ĵetas saketojn komence laŭvole al la kontraŭa flanko,

kaj iom post iom al tiuj, kiujn ili amas. Laŭ regulo oni povas ne preni la saketon flugantan trans ŝultron. Se iu malsukcesas preni la saketon ne flugantan trans ŝultron, li (aŭ ŝi) devas doni donacon al la ĵetinto. Iam junulo (aŭ junulino) intence malsukcesas preni la saketon de sia amato, tiam li (aŭ ŝi) povas donaci ion al tiu kiel ateston de amo. La ludo estas ne nur bona rimedo por montri la amon, sed ankaŭ bona sporto por ekzerci la korpon.

Salto trans bambuajn stangojn estas tradicia sporto de la li-oj sur la insulo Hainan de Ĉinio. En la sportkunveno mi vidis du vicojn da ludantoj, unu el tri junuloj kaj du junulinoj kaj la alian el du junuloj kaj tri junulinoj. Kvin duoj da gejunuloj kaŭris vidalvide en du vicoj, tenante bambuajn stangojn horizontale sur du dikaj bambuoj. Ili kunfrapadis la stangojn por eligi klarajn, serenajn kaj ritmajn sonojn. Ili tion faris jen sidante, jen kaŭrante, jen starante. Aliaj kvin duoj da gejunuloj, laŭ la takto de frapado, sal-



tadis facilpaŝe inter la bambuoj. Ili prezentis saltojn jen dukru-rajn, jen unukru-rajn, jen altajn, jen malaltajn. Ilian saltadon akompanis belaj dancmovoj imite al produktaj laboroj. Tio montris ilian amon al la vivo kaj laboroj.

En la sportkunveno estis plu-raj sportoj strikte ligitaj kun moroj de la koncerna nacieco. Inter ili troviĝas pilkopikado ludata de pajvan-oj el gaŭŝan-nacieco en Taiwan-provinco. La ludo havas kultan karakteron, ĉar la pajvan-oj tre adoras siajn prapatrojn. Oni ludas pilko-pikadon dum la kulta festo, kiu okazas en ĉiu kvina jaro. Cirkulas legendo, ke antaŭ tre longa tempo estis kruela birdego, kiu manĝis nur pajvan-ajn infanojn. Tiam la pajvan-oj elpensis rimedon por ekstermi ĝin. Ili stari- gis sur la tero bambuajn stan- gojn kun pika pinto kaj sam- tempe metis lignajn pistujojn inter la stangojn. Nokte ili bru- ligis grandan fajron por venigi la birdegon. La birdego prenis la lignajn pistujojn por infanoj kaj sin ĵetis malsupren por manĝi ilin. Kaj tiel ĝi estis pikmorti-

gita. Por memori la meriton de siaj prapatroj, la pajvan-oj ini- ciatis la ludon de pilkopikado. Ili faris pilkon el arboŝelo kiel simbolon de la kruela birdego. Unue iu ludanto ĵetis la pilkon alte en la aeron, kaj poste dekoj da aliaj penis piki la pilkon per longaj bambuaj stangoj kun me- tala pinto. Fine la pilko estis trafita de pinta stango. Tio signifas, ke venis feliĉo kaj paco. La sporto propra al viroj okazas ĝenerale post aŭtuno por kulti la prapatrojn, festi riĉan rikolton kaj preĝi la samon por la venon- ta jaro.


Luktoarto estas trezoro de la antikva kulturo de la ĉina nacio. Kaj la nacimalplimulta luktoarto kun densa loka koloro malfermis novan horizonton. La tuĝja-oj, kiuj ŝatas koko-lukton, kreis luktoarton laŭ luktomovoj de kokoj; la taj-oj en la hejmloko de pavoj kreis luktoarton laŭ movoj de pavoj; kaj la mjaŭ-oj kun hakilo kaj falĉilo kiel armi- loj por sia defendi elpensis plur- specajn luktoartojn. Inter la di- versaj lukto-prezentadoj tiu de la huj-oj estis tre altira. Huj- nacieco estas unu el la grandaj

ĉinaj nacimalplimulto kaj havas grandan dissemitecon. Tiu na- cieco de ĉiam estas tre lerta en luktoarto. Multaj konataj lukto- artoj estas kreitaj aŭ de la huj- o, aŭ de pluraj ĉinaj naciecoj. La luktoarto de Ĉamir, populara ĉe la huj-oj, karakteriziĝas per belaj facilaj kaj fortaj movoj. Maljuna luktoartisto diris, ke ĉirkaŭ la 17-a jarcento Ĉamir, la kreinto de la luktoarto, venis de la Okcidenta Regiono (nun Xinjiang en la nordokcidenta parto de Ĉinio) al la orienta ĉina provinco Shandong kaj tie instruis sian luktoarton. Kaj tiu luktoarto populariĝis en la pro- vinco. Poste la huj-oj iom post iom perfektigis ĝin.

Vektotrapado estas tradicia sporto de ĝuang-aj virinoj en la regiono Mashan en la Guangxi-a Ĝuang-nacieca Aŭtonoma Re- giono. Historiaj notoj diras, ke la sporto floris en Tang-dinastio en la sepa jarcento. Kaj poste ĝi apenaŭ herediĝis. Ĉe la fon- diĝo de la nova Ĉinio ĝin povoc- iis nur du maljunulinoj. Tiu- tempe la ĝuang-a knabino Meng Xuefeng heredis kaj diskonigis la sporton. En la ĉi-foja sport- kunveno ŝi kune kun siaj 13-jara filino kaj 8-jara filo kaj aliaj kvin ĝuang-aj knabinoj prezentis la vektotrapadon. La ludantoj kun vektoj staris ĉirkaŭ kvar benkoj. Ili frapis per vekto jen benkon jen vekton, produktante diversajn ritmajn sonojn kaj farante movojn de draŝado de greno, plantado de riz-plantidoj, pistado de rizo kaj teksado de ŝtofo. Per tio ili prezentis sian gajan vivon.

Inter la virinaj sportoj trovi- ĝis ludoj de trapezo kaj baskulo kun kontraŭfeŭdisma koloro, ŝa- tataj de koreaj virinoj. Oni diras, ke en la antikveco junaj koreaj virinoj enfermitaj en kor-

### *Kapto de kapro*





*La Ĉina Virina Flugpilka Teamo denove en ĉampioneco*

## LA ĈINA VIRINA FLUGPILKA TEAMO REFOJE GAJNIS LA MONDAN ĈAMPIONECON


De la 12-a ĝis la 25-a de septembro 1982 okazis en Peruo la Naŭa Monda Virina Flugpilka Ĉampioneca Konkurso. La ĉina teamo venkis la peruan teamon per 3:0 en la finalo kaj gajnis la ĉampionecon de tiu konkurso, tiel ke ĝi estas nature rajtigita partopreni en la flugpilka konkurso de Olimpikoj en 1984. Tio estas la dua ĉampioneco gajnita de la ĉina teamo post tiu de la lastjara Mondpokala Virina Flugpilka Konkurso.

Tiu venko estas atingita ne facile, ĉar la ludnivelo de ĉiuj teamoj ĝenerale altiĝis dum la pasinta jaro kaj la ĉina teamo fariĝis la ĉefa esplorobjekto kaj atakcelo de iuj fortaj tea-

moj, post kiam ĝi gajnis la ĉampionecon en 1981.

En la antaŭfinala konkurso la ĉina teamo estis venkita de la usona teamo per 0:3. Sed la ĉinaj knabinoj ne perdis sian kuraĝon en tiel malfavora situacio. Tuj poste la ĉina teamo postenigis novajn sportistojn kaj formis novan formacion. Per sia supereco de rapida atako ĝi venkis la kuban, sovetunian, hungaran kaj aŭstralian teamojn kaj tiel elhakis por si la vojon al gajno de la ĉampioneco. En la finala konkurso la ĉina teamo venkis la japanan teamon per 3:0 kaj poste la peruan teamon. Fine la ĉampioneco estis gajnita de la ĉina teamo.

*La ĉina kaj perua teamoj konkuras pri la ĉampioneco.*



to ĉirkaŭita de altaj muroj povis vidi sian amaton trans la muro nur en la momento, kiam ili sin levis en la aeron, helpate de trapezo aŭ baskulo. La koreaj virinoj, graciaj kaj mildaj en ordinaraj tagoj, sportis tre kuraĝe kaj facilmove, kiel hirun-

doj. An Xianyu, ludantino de baskulo, estas 30-jara laboristino en la provinco Heilongjiang en nordorienta Ĉinio. Ŝi povis salti kun kruroj rektaj, kurbigitaj kaj disigitaj en la momento, kiam ŝi levis sin en la aeron. Ŝiaj movoj estis tiel liberaj kaj graciaj, ke

oni ne kredis, ke ŝi estas patrino de du infanoj.

El la pli ol 800 sportantoj la plej aĝa estis 86-jara kaj la plej juna aĝis nur sep jarojn. El tio oni vidis la estontecon kaj esperon de la sportoj de la ĉinaj nacimalplimulto.



# La ĉina ŝipkonstrua industrio en marŝado



**E**KDE 1980 ĝis nun, Ĉinio kontraktis eksporton de ŝipoj de ĉirkaŭ 900 000 toneloj kun mendantoj de aziaj, eŭropaj kaj amerikaj landoj kaj regionoj. La klientoj opiniis, ke la kvalito de la ĉinaj ŝipoj estas unuaklasa.

La ŝipkonstrua industrio de la nova Ĉinio jam trapasis 30 jarojn. En la komenca periodo tiu branĉo havis malfortan bazon, postigintan teknikon kaj povis fari nur riparadon, kaj iom post iom establis la nunan, relative kompletan sistemon, kiu povas plenumi sciencan esploron, projektadon, kompletigadon kaj

muntadon. Nun nia lando jam sin trovas inter la ŝipkonstruaj landoj de la mondo.

Nun Ĉinio havas pli ol ducent ŝipkonstruejojn ĉe la marbordoj, en ĉefaj akvo-transportaj regionoj kaj fiŝkaptaj bazoj, kiuj kapablas konstrui ŝipojn maksimume 100 000-tonelajn. Krome funkcias pli ol cent fabrikoj de akcesoraj ŝipekipaĵoj, ĝenerale adaptigantaj al la totala munta kapablo. Fondiĝis nombro da scienc-esploraj kaj projektaj organizaĵoj kun rimarkindaj teknikaj rimedoj kaj nivelo.


Dum pli ol 30 jaroj la ŝipkonstruejoj grandaj kaj malgrandaj de la tuta lando konstruis ĉ. dek-mil ŝipojn apartenantajn al mil tipoj kaj per ili ekipis la riverajn kargoŝiparojn, la plejparton de la marbordaj ŝiparoj kaj parton de la oceanaj ŝiparoj. Nun Ĉinio povas konstrui lozkargoŝipon, kontenersipon, pasaĝerŝipon, pasaĝer- kaj kargoŝipon, cisternoŝipon, trenŝipon, fridigan ŝipon, fiŝkaptan ŝipon kaj diversspecajn bargojn.

Ĉinio ankoraŭ konstruis multe da sciencsploraj ŝipoj, dragŝipoj, orkolektaj ŝipoj, dizelgeneratoraj ŝipoj, flosgruoj, glacirompiloj kaj aliaj. Ekde la sepdekaj jaroj, la ŝipkonstrua industrio de Ĉinio malfermis al si novan servokampon — konstrui surmaran putoboran platformon.


En 1973, Ĉinio konstruis la unuan grandan hidraŭlikan memlevan surmaran putoboran ŝipon. Tiu ĉi ŝipo laboris sur la maro pli ol naŭ jarojn kaj eltenis severan provon de ŝtormo. Ĉiuj ekipaĵoj de la ŝipo bone funkciis sub la alta temperaturo, frosta malvarmo kaj ventego de 11 gradoj. La unua duon-subakva poresplora ŝipo projektita de Ĉinio mem estas konstruata.

Kompreneble, la ŝipfara industrio de Ĉinio ankaŭ produktis diversajn militŝipojn, inkluzive de misila destrojero, pneŭmat-kusena alteriĝa ŝipo kaj aliaj novtipaj ŝipoj.

En majo, 1980, por prova lanĉo de transporta raketo al Pacifiko, Ĉinio ekspedis al la suda Pacifiko la unuan oceanan militŝiparon kun speciala tasko, konsistantan el diversspecaj ŝipoj, kiel oceana sinteza mezurŝipo, maresplora ŝipo kaj misila des-



*Putobora platformo konstruata por Usono*



*La oceana sinteza mezurŝipo Yuanwang*

trojero, ĉiuj projektitaj kaj konstruitaj de Ĉinio mem.

En sufiĉe longa tempo nia ŝipfara industrio servis nur al nia lando mem, sed ekde 1980 ĝi komencis sin turni al la internacia merkato kaj rapide malfermis la vojon al komerco. La mendantoj de la ĉinaj ŝipoj estis el Singapuro, Malajzio, Rumanio, Usono, Italio, FR Germanio, Hongkongo kaj Aomen.

La ŝipoj eksportitaj de Ĉinio atingis ĉiun teknikan normon postulatan de la mendantoj kaj ĝuis bonan reputacion inter la klientoj.


La ŝipo Changcheng estis la unua 27 000-tonela kargoŝipo projektita kaj konstruita de Ĉinio laŭ la kriterio de Lloyd-a Registro de Ŝipoj. Kiam la tuta ŝipkorpo estis finmuntita, la mendanto invitis britan altklas-sipokontroliston por ekzameni. La ekartoj de ĝiaj longeco, vasteco kaj profundeco estis en permesita kategorio: unu el ili estis nulo kaj la aliaj du estis nur unu milimetro kaj du milimetroj respektive.

Unu el la kvar kontenerŝipoj, menditaj de du kompanioj de FR Germanio, jam estis finkons-

truita kaj transdonita al la uzanto en aŭgusto, ĉi-jare. Tiu ŝipo havas ekipaĵojn pilotatajn de artsatelito, kaj la maŝinĉambro estas tute aŭtomata. Dum navigado, centoj da ĉefaj kaj helpaj maŝinpartoj estas regataj de miniatura komputero kaj aliaj instrumentoj, kaj la pilotaj ekipaĵoj povas difini la ŝippozicion kaj montri la navigan orientiĝon pere de artsatelito.

Por rapidigi modernigon de la ŝipkonstrua industrio de Ĉinio, fondiĝis en majo 1982 la unua ĉina faka kompanio egala al ministerio — la Ĉina Ŝipindustria Kompanio. La kompanio konsistas el ŝipfaraj fabrikoj kaj iliaj helpaj fabrikoj kaj plenumas sian administradon ĉefe super la grandaj ŝipkonstruejoj de Ĉinio. Sub la kompanio estas 26 grandaj kaj mezgrandaj ŝipkonstruejoj kaj 66 fabrikoj por speciale produkti ŝipuzajn ĉefmaŝinojn, pilotajn instrumentojn, telekomunikajn aparatojn kaj aliajn instalaĵojn, sume kun 300 000 laboristoj. Ĝi ankaŭ posedas 33 scienc-esplorajn instituciojn kaj tri ŝipkonstruajn institutojn. Estonte, Ĉinio klopodos por fari teknikajn reformojn kaj konstrui pli multe da ŝipoj, serve al la enlanda kaj internacia bezonoj.

*La kargoŝipo Changcheng lanĉita*







# Vizito al Mulan

de ZHENG ZHENJIE

## LA MALNOVA ĈASEJO

En la ora septembro mi vizitis la malnovan imperiestran ĉasejon Mulan en la gubernio Weichang en la plej norda parto de Hebei-provinco.

La ĉasejo Mulan kun areo de pli ol 10 400 kvadrataj kilometroj estis starigita, en 1681, de Qing-dinastia imperiestro. Tie ĉasis imperiestroj kaj korteganoj pli ol cent fojojn. En la manĉura lingvo "mulan" signifas "cervoĉasado kun ligna fajfilo", t. e. antaŭ tagiĝo manĉuraj ĉasisoj sin kaŝis en arbaroj sur la monto, portante maskojn en formo de cervokapo, kaj blovis lignajn fajfilojn, imitante blekadon de cervoj por ilin logi kaj kapti.

## LA FORSTOKULTUREJO SAIHANBA

Matene mi forlasis la gubernian urbon kaj aŭte veturis

nordokcidenten al la forstokulturejo Saihanba.

La aŭto kuregis laŭ la zigzaga rivero Yixun. La vojo serpentumis laŭ la montpiedo. La pejzaĝo estis ĉarma, tamen videblis neniun beston. Mi ne povis imagi, ke antaŭe la loko estis ĉasejo. En la lasta duono de la 18-a jc. Qing-dinastio iom post iom kadukiĝis, dronis en konstanta embaraso de financo kaj pro tio turnis la antaŭan malpermesitan lokon en terkulturejon por multe akiri rentojn. Laŭ historiaj notoj, sole dum ses jaroj de 1768 ĝis 1774 tie estis forhakitaj pli ol 365 000 arboj, kio terure detruis la naturajn vegetaĵojn kaj forpelis preskaŭ ĉiujn bestojn.

La aŭto kuris sur la montvojo tri horojn kaj fine atingis Saihanba.

Ŝovinte la kapon el la aŭto, mi vidis la impone starantan

altan barajon Saihanba kun admirinda pejzaĝo ĉe la supro. La barajo propre estas altaĵo formita el lafo, je 1 100-1 950 metroj super la marnivelo. Malproksimen etendiĝas de tie arbaro kaj stepo. Ni veturis en la arbaro konsistanta el piceoj, larikoj, betuloj, kverkoj k. a. Iuj verdaj arbofolioj flaviĝis, dum aliaj flavaj ruĝiĝis.

Ĉe la tagmezo ni atingis la lastan stacion de la aŭtovojo, la administracion de la forstokulturejo limtuŝanta la Altebenaĵon de Interna Mongolio. Tie la jara meza temperaturo estas 1° C sub la nulo kaj la senprujna sezono daŭras nur 60-70 tagojn. Estis sendube tre malfacile fondi en tia medio la forstokulturejon. Oni devis labori en frostoj kaj sablovento. Mi demandis Li Xingyuan, vicĉefinĝenieron de la forstokulturejo, pri la tiama

arbarizado. Li respondis al mi simple: "Peniga batalo!"

La forstokulturejo, fondita en 1958, havis tiam nur 360 laboristojn. Ili nutris sin per nuda aveno kaj terpomoj kaj loĝis en kabanaj kaj barakoj. Estis tiel malvarme, ke ĉe tagiĝo la litkovriloj ofte estis kovritaj de prujno. En la rekorda jaro ili plantis pinojn sur areo de 53 hektaroj.

Nun la forstokulturejo havas 1 500 laboristojn. Dum pli ol 20 jaroj ili kovris 54 000 hektarojn ĉefe per larikoj kaj fermis monton kun areo de pli ol 24 600 hektaroj por faciligi kreskadon de la arboj reaperintaj. Nun ĝia totala ligna rezervo atingis 1 800 000 kubmetrojn. Kaj 81% de la forstokulturejo estas kovritaj per arboj. La laboroj estas plenumitaj ĉefe per maŝinoj.

### LERTA PAŜTISTO

Iom okcidente de la forstokulturejo estis alia aspekto. Tie troviĝis malmultaj arboj, kaj la ora stepo montriĝis pli vasta. Jen la ŝtata paŝtejo Yudaokou.

Kuregis la aŭto sur la stepo, preterpasante montetojn kaj riveretojn. La herbejo apud rivereto estis punktita de ĉevaloj, bovoj kaj bonrasaj ŝafoj, kiel blankaj merinoj kaj kaŭkazaj ŝafoj, kio prezentis belan bildon.

En la herbaro elrigardis nur la kornoj kaj dorsoj de ŝafoj. Tian pejzaĝon priskribis la antikva ĉina poemo "Cile-ebenajo":

*Sub la ĉielblu' sen baro  
La paŝtejo vastas kiel maro.  
Kiam vent' klinigas herbojn.  
Ekaperas bovoj kaj ŝafoj en  
aroj.*

La ŝoforo, kiu longe laboris en la paŝtejo, bone konis la lokon. Laŭ mia peto li tre rapide kondukis la aŭton kaj ĝin haltigis antaŭ la domo de ŝafisto Wang Yuchen, kiun mi volis viziti.


Wang estis pli-ol-40-jara viro forta kaj mezstatura. Li bredis 163 purrasajn merinojn. Post la Printempa Festo ĉi-jare, la pli ol 100 ŝafinoj facile naskis 263 idojn. La viv-procento de la ŝafidoj flegataj de li estis alta en la lando.

Li laboris ĉiam diligente. Printempe la ŝafoj ŝatis manĝi junajn herbojn, sed ofte ne povis sin satigi. Li do ne lasis la ŝafojn libere kuri dum paŝtado, por ke ĉiuj ŝafoj, fortaj kaj malfortaj sate manĝu. Somero estis ora sezono por grasigi la ŝafojn, li do paŝtis la ŝafaron tie, kie kreskis nutroriĉaj herboj. La de li paŝtataj delikat-lanaj ŝafoj pezis meznombro 47.8 kg. en julio kaj en aŭgusto ili jam kreskis al 60.8 kg. Aŭtuno estis pariĝa

tempo por la ŝafoj, li do paŝtis ilin sur la herbejo riĉa je herboj, por ke ili bone sin nutru. Vintre la temperaturo falis ĝis 30° C sub la nulo kaj la tero estis kovrita de neĝo kaj glacio. En tiaj malfavoraj cirkonstancoj oni paŝtis nur 2-3 horojn ĉiutage. Sed ekde la pasinta vintro li rompis la rutinon kaj paŝtis de la deka antaŭtagmeze ĝis la kvara posttagmeze, kio ne nur favoris al la ŝafa grasiĝo, sed ankaŭ ŝparis 25 tunojn da fojno.

Ĉi-jare, pro manko de fojno, la grupestro petis lin plilongigi paŝtajn horojn. Li plenumis lian peton. Foje, subite fariĝis malvarmege. Por ke la vento ne frostigu ĵus naskitan ŝafidon, li demetis sian peltan surtuton kaj per ĝi ŝirmis la malgrandan beston. En la paŝtejo Yudaokou ja estis multaj tiaj ŝafistoj, kia Wang Yuchen. Nun en la paŝtejo oni bredas 40 000 bonrasajn ŝafojn, 1 000 ĉevalojn kaj 700 bovojn.

Kun la disvolviĝo de la brutobredado, la vivo de la paŝtistoj pliboniĝas iom post iom. Nun la paŝtistoj loĝas en grandaj bri-kaj domoj, kaj iuj el ili aĉetis televidilojn, radioricevilojn kaj kudromaŝinojn. La infanoj vizitas elementan kaj mezan lernejojn fonditajn de la paŝtejo mem.



*La paŝtejo  
Yudaokou*





*S-ro Cen Qixiang*



## VIZITO AL ESPERANTISTO-LINGVISTO CEN QIXIANG

de SHAO BIN

**S**INJORO Cen Qixiang, fama ĉina nuntempa lingvisto, iam studis en la famkonata Pariza Universitato kaj akiris tie diplomojn pri literatura magistro kaj altgrada studo de fonetiko. Ekde la mezo de la 30-aj jaroj li verkis «Ĝeneralan Lingvistikon», «Skizon pri Historio de Lingvistiko», «Skizon pri Fonetiko», «Fundamenton de Gramatika Teorio», «Skizon pri Enketrimedoj de Dialektoj» kaj aliajn, kiuj multe influis la studadon pri ĉinaj lingvistiko, lingvistika historio kaj fonetiko. Krome, li okupiĝas pri lingvistika instruado pli ol 40 jarojn kaj posedas riĉan sperton en instruado. Nun li estas estro de la Lingvistika Sekcio de la Ĉinlingva Fakultato de la Pekina Universitato kaj samtempe veterana esperantisto. En 1926 li jam eklernis Esperanton, en la mezo de la 60-aj jaroj li instruis Esperanton en la Pekina Universitato kaj nun estas konsilanto de la Ĉina Esperanto-Ligo.

Estante esperantisto kaj filologo, li aktive subtenas esperantan movadon. Kian opinion li havas pri la scienceco kaj perspektivo de Esperanto kaj pri la esperanta movado nuntempa en- kaj eksterlande? Kun tiuj demandoj mi intervjuis profesoron Cen Qixiang.

Kvankam li estas 79-jara, tamen li komencas labori ĉiam frumatene. Li ridete renkontis min kaj komencis nian interparolon. Mi diris: “Kamarado Cen, kiel sana vi estas!” Li ĝoje diris al mi, ke li ĉiutage legas novajn librojn pri lingvistiko aŭ sin okupas pri studo kaj verkado, kaj ankaŭ donas lekciojn al esplorantoj-studentoj kaj ĉinlingvaj instruistoj el diverslokaj universitatoj. “Nun vi estas konsilanto de la Ĉina Esperanto-Ligo, la Ĉina Lingvistika Asocio kaj la Pekina Lingvistika Asocio kaj membro de la Akademia Komisiono de la Pekina Universitato. Vi ŝarĝas

vin per tiel multaj aferoj. Ĉu ne tro?” mi demandis. “Ho, jes,” li respondis, “Mi partoprenas en tiuj aktivadoj, en kiuj mi povas, kaj faras tion, kion permesas al mi la kapablo, ĉar multaj laboroj devas esti plenumitaj!”

Por ŝpari tempon, mi prezentis al li la unuan demandon: “Kamarado Cen, kiel vi opinias pri la scienceco, supereco kaj perspektivo de Esperanto?”

Iom meditinte, profesoro Cen respondis: “Franca lingvisto Meillet asertis pri Esperanto: ‘Zamenhof ne kreis, sed nur el-tiris la komunajojn el diversaj eŭropaj lingvoj. Estas tre oportune aldoni por ĉiu homo facile uzeblan lingvon kiel ĉiutagan komprenilon en internacia vivo krom grandnaciaj kulturaj lingvoj, kiujn povas lerni, tamen malfacile perfekte posedi nur malmultaj homoj.’”

“La diraĵo de Meillet ja estas vere trafa,” interrompis lin mi

pretervole. “Jes, li eldiris la esencon de Esperanto — ĝi estis ne senbaze kreita de Zamenhof, sed surbaze de la komunaj eliritaj el eŭropaj lingvoj. Tial la parolantoj de ĉiu ajn eŭropa lingvo povas ellerni ĝin facile. Krome li montris, ke Esperanto estas lingvo facile uzebla por ĉiu en la internacia ĉiutaga vivo. Ĝi estas internacia helpa lingvo, kiu ne kontraŭstaras aliajn grandnaciajn lingvojn, nek intencas anstataŭi iun ajn nacian lingvon. Mi opinias, ke Esperanto havas profundajn bazojn de naturaj lingvoj, lertan vortfaradon kaj simplan gramatikon, kiuj ja estas scienceco kaj la plej granda superereco de Esperanto. Ĝuste pro tio ĝi fariĝis internacia helpa lingvo lernata de pli kaj pli multaj homoj. Mi plene kredas ĝian estontecon.” Dirinte tion, profesoro Cen ekridis laŭte.

La kredo kaj trafa analizo de profesoro Cen pri Esperanto profunde infektis min. Mi plie konis signifon de ekzisto kaj disvolvo de Esperanto kaj en mia koro estiĝis respekto al laborantoj de Esperanto. Sekve mi faris al li la duan demandon: “Kiel vi opinias pri la nuna esperanta movado en- kaj eksterlande?”

“Nun la esperanta movado jam disvolviĝas vaste en- kaj eksterlande, tio estas bona afero,” respondis kamarado Cen kun rideto, “sed ekzistas iuj problemoj, la plej granda el ili estas disvastigo.”

“Disvastigo?” mi demandis nekomprene.

Li daŭrigis: “Nun oni disvastigas ĝin ne sufiĉe. Oni devas bone fari disvastigan laboron por ke pli multaj homoj lernu Esperanton. Je la komenco de junio ĉi-jare mi veturis al la Interna Mongolio por fari prelegon

pri lingvoscienco en la lingvistika kunsido aranĝita de la Universitato de Interna Mongolio kaj la Normala Instituto de Interna Mongolio. La aŭskultantoj estas esplorantoj de altaj lernejoj aŭ scienc-esploraj unuoj, sed multaj el ili ne konis Esperanton kaj demandis al mi, ĉu nun oni devas disvastigi Esperanton. Mi diris al ili, ke nun la esperanta movado vigle disvolviĝas en multaj landoj, kaj ankaŭ akiris subtenon kaj aprobon de la registaro kaj diversaj sociaj rondoj de nia lando. Krom la Ĉina Esperanto-Ligo, stariĝis ankaŭ esperantaj asocioj kaj grupoj en multaj provincoj kaj urboj. La lernantoj de Esperanto pli kaj pli multiĝas. En Pekino fondiĝis porinstruista Esperanto-kurso, kiun vizitas instruistoj el diversaj lokoj. Aŭdinte miajn vortojn, ili ĝoje diris: ‘Ho, ni ne scias pri tio. Tio estas tre bona!’ En la sekva tago ili jam sin organizis kaj estas instruataj de esperantisto. Tio montras, ke multaj ne konas Esperanton. La mondo estas tre vasta, ankaŭ Ĉinio estas tre vasta. Kompreneble troviĝas iuj izolitaj lokoj. Pro tio plej grave estas disvastigi kaj ĝeneraligi Esperanton!”

Mi kapjesis aprobe. Li daŭrigis: “Alia grava problemo estas

eldoni esperantajn legajojn. Ni esperas, ke multaj homoj lernos Esperanton. Sed al ili mankas legajoj post la eklerno de Esperanto. Nun la esperantaj legajoj, precipe esperantaj originalaj kaj tradukitaj sciencaj verkoj estas tro malmultaj. Ankaŭ diversfakaj esperantaj tradukaĵoj de aliaj landoj ne povas kontentigi bezonon de la esperantistoj, rezulte de tio Esperanto ne sufiĉe ludis la rolon de kultura interfluo inter diversaj landoj. Tial, laŭ mi granda problemo atentenda estas pli multe eldoni esperantajn librojn. Tiuj estas miaj opinioj.” Fine kamarado Cen diris modeste: “Nun mi informiĝis malmulte pri esperanta movado, ĉar mi ricevis malmultajn materialojn tiurilate. Mi volas fari esploran laboron pri Esperanto, tamen tion mi faris malmulte ĝis nun pro nesufiĉaj materialoj. Tial mi emfazas, ke oni devas plimulte disvastigi Esperanton kaj eldoni esperantajn librojn.”

Por ne ĝeni laboron de kamarado Cen, mi adiaŭis lin. Survoje mi pensis en mi, ke kiel juna esperanta laborantino mi devas preni disvastigon de Esperanto kiel mian plej gravan taskon por ne vanigi la esperon de la maljunaj esperantistoj.





## Du semajnoj




*Kunsidas la ĉina delegacio kaj EPC-legantoj.*

**P**OSTTAGMEZE de la 26-a de aŭgusto nia trimembra Delegacio de Ĉina Esperanto-Ligo al la 69-a Kongreso de Japanaj Esperantistoj atingis la flughavenon Narita, kaj poste veturis vagonare al Tokio. S-ino Isobe Jukiko, ĉefdirektoro de la Japana Esperanto-Instituto, kiu ĵus faris lacigan vojaĝon al Antverpeno kaj suferis de vundita piedo, venis al la stacidomo por nin bonvenigi malgraŭ la doloro.

En la oficejo de JEI ni intervidiĝis kun ĝiaj oficistoj kaj priregardis ĝian bibliotekon kun altvaloraj esp-ajoj kaj ĝian bone funkciigatan libroservon. Kaj tie ni tranoktis kaj longe interbabilis kun la ĝenerala sekretario de UEA d-ro Flóra Szabó Felső kaj ŝia edzo d-ro P. Felső el Hungario, hinda filologo P. Daŝgupto kaj franca lingvisto L. Sacoma, ankaŭ kiuj venis por ĉeesti la kongreson.

*De maldekstre: s-ro Yamakawa, s-ro P. Daŝgupto, s-ro Laŭlum (parolanta) kaj f-ino Krizantemo en la kunveno de aziaj esp-istoj*



La 69-a Kongreso de Japanaj Esperantistoj daŭris du tagojn. Ĝin ĉeestis 343 personoj, krom japanoj, ankaŭ gastoj el UEA, Ĉinio, Francio, Hungario, Hindio, Jugoslavio, FR Germanio, Novzelando, Usono kaj suda Koreio, kaj pro sia riĉa programo ĝi estas komparebla kun malgranda UK. Krom prelegoj, popularaj dancoj, muziko kaj dramo, okazis ankaŭ ĉ. 20 diversaj interesaj fakaj kunsidoj de sciencistoj, medicinistoj, radio-amatoroj, virinoj, budhistoj k.a.

Dum la kongreso ni intervidiĝis kaj kore interbabilis kun multaj malnovaj amikoj. Multaj legantoj de EPC kaj aŭskultantoj de Radio Pekino afable laŭdis pri nia laboro kaj faris sincerajn proponojn por ĝin plibonigi. S-roj S. Milojeviĉ k. a. promesis recenzi niajn esp-ajojn. Tio multe nin kuraĝigis. Ni elkore ilin dankas.

Ankaŭ internacia solidareco manifestiĝis en la kongreso. Laŭ propono de f-ino Krizantemo okazis kunsido por diskuti pri la E-movado en Azio, dum kiu oni interŝanĝis informojn kaj opiniojn por helpi malfortajn E-grupojn en aziaj landoj. Japanaj esperantistoj kolektos monon kaj sendos donacojn kaj delegitojn por helpo kaj stimulado.

# en Japanio

La Redakcio de EPĈ kaj la E-sekcio de Guoji Shudian pre-  
tas sendi eldonaĵojn por helpi  
tiajn grupojn.

Vespere de la 29-a de aŭgusto  
okazis post la fermo de la kon-  
greso bankedo en ĝoja atmosfero.  
Eksterlandaj gastoj unu post alia  
faris varman parolon. Mi ne  
parolis sed donis mallongan ri-  
maĵon, kiu bedaŭrinde ne povis  
esprimi la gajan etoson de tiu  
vespero. Dum la bankedo oni  
havis viglan interparolon. In-  
formiĝinte ke eble la 71-a UK  
okazos en Pekino, prof. Koseki  
diris, ke li revizitos Pekinon kun  
sia nepo, kaj s-ro Umeda Yoshi-  
mi proponis, ke la ĉinaj kaj japa-  
naj esperantistoj kune aranĝu  
artan vesperon de la Oriento.

Post la kongreso ni vizitis  
esperantistojn en Nagoja, Kioto,  
Tojonaka, Kameoka kaj Ŝizuoka.

La 30-an ni ekveturis suden  
per vagonaro. Mi sentadis dor-  
memon pro tio, ke nokte ni babi-  
ladis ĝis la 2-a horo. Sed kiam  
mi ekvidis s-rojn Takenaka Ĝi-  
suke, Niva Masahisa, K. Matu-  
bara kaj Shigenori ĉe la stacido-  
mo de Nagoja, mi tuj refreŝiĝis.  
Mi ĝoje informiĝis, ke s-ro Take-  
naka sin okupas per verkado de  
historio de la Nagoja E-movado.  
Ni intime interparolis ĉ. tri ho-  
rojn — neforgeseblajn horojn.

En Kioto ni vizitis la “Salon-  
non” de la Kiota Esperanto-  
Societo en moderna domego. Ĝi  
havas malgrandan bibliotekon  
kaj kunvenejon taŭgan por aran-  
ĝi kurson. Oni tuj kaptis la ŝan-  
con fari al ni demandojn por  
meti niajn voĉojn en sian “voĉan  
albumon”. Poste, kiam ni vizitis  
la oficejon de KLEG en Tojona-  
ka mi rimarkis, ke ankaŭ ĝi ha-  
vas tian “albumon”. Mi pensas,  
ke tio estas bona ideo, ĉar tia-  
maniere oni povas akiri ne nur  
memoraĵojn, sed ankaŭ utilan  
materialon por propagando kaj  
instruado de Esperanto. En la  
“Salono” ni ĝoje vidis la edzon  
de s-ino Takeuti Tomiko. Kiam  
s-ino Takeuti vizitis Pekinon, ni  
jam interparolis kun ŝia edzo per  
telefono. Estas vere tre ĝoje por  
mi, ke mi havis la ŝancon ren-  
kontiĝi kun tiu energioplena  
amiko.

En la lasta vespero de aŭgusto  
ni atingis Kameokan kaj intervi-  
diĝis kun la prezidanto de la  
Esperanto-Propaganda Asocio s-  
ro Ito Eizo, ĝia ĝenerala sekre-  
tario s-ro Agou Takasi kaj la  
vicestro de la Internacia Fako  
de Oomoto s-ro Noriya Esumi  
k. a. Per filmo, ekspozicio kaj  
ĉirkaŭrigardo de la Centro de  
Oomoto oni havigis al ni pli da  
scioj pri tiu ordeno. Ni interpa-  
rolis ankaŭ kun la angla denaska

esperantisto s-ro Karlo Rowe,  
kies gepatrojn mi renkontis en  
Pekino. Ni informiĝis, ke Karlo  
ĵus fondis sian familieton kun  
japana fraŭlino, kaj ni tuj gra-  
tulis lin.


La unuan de septembro ni  
veturis al Tojonaka kaj estis  
amike akceptataj de s-roj Konisi  
Gaku, Miyamoto Masao, prof.  
Matumoto Kiyosi k. a. gvidantoj  
de KLEG. Nokte post la 10-a,  
s-ro Konisi Gaku afable veturi-  
gis nin per sia aŭto reen al  
Kameoka.

Matene de la 2-a s-ro Ito in-  
vitis nin al sia hejmo. Kiam ni  
venis en la ombroriĉan korton,  
la mastro diris al ni, ke por atin-  
gi la gastoĉambron ni devas ve-  
turi trans “Pacifikon” — rivere-  
ton, kiu memorigis al mi la ĉinan  
diron “najbaroj dividitaj de  
akvoŝtiro” kaj mi faris jenan  
versajon:

*Por trinki teon ĉe l' amiko,  
boatis ni sur “Pacifiko”  
— la akvoŝtiro sen-ondeta  
en verda korto gastig-preta.*

S-ro Ito detale instruis nin  
pri la arto de te-ceremonio kaj  
diris, ke ĝi radikis en Ĉinio kaj  
floras en Japanio. Kaj ni rapor-  
tis al li, ke hodiaŭ en suda kaj  
nordokcidenta Ĉinio oni ankoraŭ  
tenas la kutimon de aprecio de

*La ĉina delegacio kaj japanaj samideanoj s-ro Takenaka Ĝisuke  
(la dua de dekstre), s-ro K. Matubara (la tria de dekstre) kaj  
s-ro Shigenori Takeuchi (la unua de dekstre) en Nagoja*







*De maldekstre: s-ino Tadaŝi Ĉizuko, s-ino Ŝi Guĭbao, s-ro Tokuda Rokuro, s-ro Laŭlum, ges-roj Mijaŝita Bonzoo kaj s-ro Ŝirai Jasuo antaŭ la domo de ges-roj Mijaŝita Bonzoo*

*La ĉina delegacio kaj ges-roj Itoo (meze en la dua vico) en ilia korto. En la unua vico de maldekstre: s-ro Agou Takasi, filo de ges-roj Itoo kaj s-ro Zhang Haiping*



teo. La te-trinkado ja estas bona pruvo pri la longa kaj intima amikeco inter la ĉina kaj japana popoloj.


La 3-an ni venis al Ŝizuoka, kie ni ne nur intervidiĝis kun dekoj da esperantistoj en la ĉirkaŭaĵo, sed ankaŭ gastis en la hejmoj de s-roj Tokuda Rokuro, Mijaŝita Bonzoo kaj Ŝirai Jasuo kaj ĝuis varman "hejman" intimecon.

Dank' al la aranĝo de s-ro Tokuda, ni intervidiĝis kun la guberniestro kaj prezidanto de la Eduka Komisiono de Ŝizuoka, kaj vizitis tri lernejojn. Aparte menciinda estas la bonveniga kunveno de la 1500 lernantoj kaj instruistoj de la Elementa Lernejo Nakajima, en kiu geknaboj de la Esp-grupo sin prezentis en Esperanto. Kiam finiĝis la kunveno, la geknaboj klopodis por nin atingi kaj manpremi kun ni entuziasme. Eĉ kiam niaj aŭtoj surstratiĝis, iuj hejmenrevenantaj geknaboj svarmis flanke de la strato por nin adiaŭi kun rideto kaj svingiĝantaj manetoj. En tia sincereco kaj tia varma ĝojo! La fame konata japana ĵurnalo Asahi Sinbun kaj kelkaj lokaj ĵurnaloj kaj la Ŝizuoka Televido raportis nian vizitadon.

La 5-an de septembro ni vizitis la grupon de la Rondo Harmonia, kiu "kunloĝadis" en Tokio. Antaŭe en Kioto ni jam informiĝis de f-ino Senda Noriko, s-ro Esaki Nasajasu k. a. RH-anoj, ke tiu junulara E-organizo havas ĉ. mil membrojn kaj pli ol 40 grupojn en la tuta lando, inter kiuj estas 24 studentaj grupoj. Ni vidis, ke tie ĉ. 40 kunloĝantoj estas en ekzameno kaj poste oni raportas pri sia partopreno de esp-ista kunloĝado en suda Koreio per montrado de

lumbildoj. Nur en malmultaj horoj ni ja ne povis ricevi profundan konon pri RH. Mi kredas, ke ĝi estas influhava junulara E-organizo, kaj certe povos fari kontribuon al nia afero.

La 6-an ni ne sukcesis akiri sidlokojn en aviadilo pro la vizito de s-ro Nixon al Pekino, do ni povis resti unu plian tagon ĉe Tokiaj esperantistoj. Dum la 12 tagoj ni plene ĝuis varman amikecon en Japanio. Mi ne povas trovi taŭgajn vortojn por danki la japanajn geamikojn pro iliaj helpoj kaj prizorgado. Ni devas aparte danki f-inon Tanaka Joŝino, kiu nin akompanis ĉiam. Kiam ni adiaŭis unu alian manŝvingante, ni ne povis deteni de larmoj.



**Tarifo:** 1 internacia respondkuponon por 5 vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

\* Jose Eduardo F. Giraud, Rua Alvaro Alvim 235/24, Porto Alegre-RS 90000, Brazilo, deziras korespondi kun ĉina esperantista amiko.

\* Robert D. Wood, 1312 West 5th Street, Tempe, Arizona 85281, Usono, deziras korespondi kun amikoj pri sporto kaj bildoj de ĉiuj landoj.

\* S-ro Jozefo Dudaŝ, Miŝkolc, Engels, Hungario, dez. kor. kun ĉinoj.

\* 13-jara franca knabo Arnaud Quillaud, 2 Avenue Rene Coty, 76120 Legrand-Quevilly, Francio, dez. kor. kun gesamaĝuloj el Polio, Ĉinio, Kanado, Usono, pri sportoj, kutimoj, kaj interŝanĝi p.m. kaj p.k.

\* Prof. Jing Houde (66-j.) dez. kor. pri manĝo, korpa ekzercado kaj longviveco, precipe pri rejuniĝo, kun membroj de la TEVA kaj aliaj personoj esp-e aŭ japane. Adr: Ĉina Medikamenta Instituto, Ĉina Tradicia Medicina Akademio, n-ro 3 Haiyuncang, Dong Zhi Men Nei, Pekino, Ĉinio.

#### Kvinjara Trankvilo Garantiata!

Silikona kapsulo facile enplantebla nuligas nesterilige nedeziratan seksardon de hundino aŭ katino sen flankaj efikoj; forigas ankaŭ virbestajn voluptemon. Informu animalan pezon. Enkoverte alsendos kontraŭ 25 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro, Doktoro Med. Veterinaro Teodoro Vaske— Adreso: Rua Esperanto sno-95760—Kai—Brazilo.



En la Salono de la Kiota Esperanto-Societo, de dekstre: la 1-a, s-ro Takeuti Yosikuzu; la 3-a, s-ro Sano Jasuharu; la 4-a, s-ino Takeuti Tomiko



# Esperantistoj el kvin landoj vizitis Ĉinion

**L**ASTASOMERE s-ino Nancie Durham, membro de la Londona Esperanto-Klubo kaj de la Societo de Brita-Ĉina Interkompreniĝo, gvidis esperantistojn el Britio, Francio, Nederlando, Aŭstralio kaj Danlando por fari turisman vojaĝon en Ĉinio. Dum dek ok tagoj de sia restado en Ĉinio ili vizitis la urbojn Pekino, Xi'an, Chengdu, Nankino, Yangzhou, Suzhou kaj Ŝanhajo. Kiel vojevizitisto mi akompanis ilin dum la tuta vojaĝo de pli ol 4 000 kilometroj.

## ĜOJAJ RENKONTIĜOJ

Niaj samideanoj ĝuis ĝojon nehaveblan por alispecaj turistoj, t.e. ili renkontiĝis kun esperantistoj en diversaj lokoj. Ili havis Esperanton kiel komunan lingvon por libere babili sen helpo de interpretisto.

En Pekino, akompanate de samideanoj de la Ĉina Esperan-

to-Ligo, la Pekina Esperanto-Asocio, la redakcio de "El Popola Ĉinio" kaj la Esperanta Sekcio de Radio Pekino, la gastoj vizitis la Imperiestran Palacon, la Someran Palacon, la Grandan Muron kaj unu el la Dek Tri Maŭzoleoj de Mingdinastio. Por bonvenigi la eksterlandajn samideanojn la Ĉina Esperanto-Ligo aranĝis kunsidon, en kiu Zhang Qicheng, la ĝenerala sekretario de la ligo kaj la ĉefredaktoro de EPĈ, faris paroladon. La kunsidon ĉeestis ankaŭ s-ro Geoffrey Sutton, brita volontulo por EPĈ, kaj gesroj E.W. Woodruff el Kanado.

La gastojn varme akceptis lokaj esperantistoj. Kun ili renkontiĝis ankaŭ veteranaj ĉinaj samideanoj, kiuj esperantistiĝis jam en la tridekaj jaroj. Esperantistoj de Xi'an bonvenigis la gastojn en la fama parko Dayanta, kie ili interparolis kaj kantis

Esperante, kio altiris ĉirkaŭ cent neesperantistajn ekskursantojn. Esperantistoj de Chengdu interŝanĝis kun la gastoj informojn kaj spertojn pri Esperanto-movado. En Nankino la gastoj priregardis vidindajn lokojn, kaj post tio du esperantistinoj-fratinoj akompanis ilin al Yangzhou por viziti. En tiu urbo ses junaj esperantistoj vizitis ilin en ilia hotelo. Kvankam komencantoj, ili havis grandan fervoron por la internacia lingvo, kaj pro tio la gastoj kuraĝigis kaj laŭdis ilin. La kunsido en Suzhou profunde impresis la gastojn per tio, ke junaj esperantistoj donis afablajn salutovortojn kaj prezentis gajajn kantojn kaj humuraĵojn. En akompano de Ŝanhajaj esperantistoj la gastoj ŝipveturis laŭ la rivero Huangpu kaj ĝuis la belan pejzaĝon ĉe ĝia enfluejo.

La 79-jara aŭstralia samideano Idyss eklernis nian lingvon frue en la tempo, kiam d-ro Zamenhof ankoraŭ vivis. Ĉi-foje ŝi tre ĝojis pro tio, ke ŝi kontaktiĝis kun tiel multe da ĉinaj esperantistoj. La dana poeto Paul emocije diris: "Mi vivas en la amikeco de la ĉina esperantistaro kaj la ĉina popolo."

## "FELIĈAN FESTON AL VI"

La 18-an de aŭgusto la brita esperantistino Hilda pasigis sian naskiĝtagon sur la Granda Muro, unu el la sep mirindaj konstruaĵoj de la mondo. La seplandaj esperantistoj, inkluzive de la

*Sur la Ponto kun Kvin Kioskoj en Yangzhou*



kanadaj ges-roj kaj la ĉinaj akompanantoj, donacis al ŝi gratulan karton kun siaj nomoj manskribitaj. S-ino Hilda emocie diris: “Mi ofte pasigis mian naskiĝtagon eksterlande, dum mi feris tie. Sed tiu ĉi fojo ne estas ordinara, ĉar mi pasigas mian naskiĝtagon sur la Granda Muro de la granda Ĉinio. Tion mi neniam forgesos dum mia tuta vivo.”


La brita esperantistino Kate pasigis sian naskiĝ-feston en la antikva ĉina urbo Nankino. Dum la tagmanĝo de la 26-a de aŭgusto, en la nomo de la turisma grupo, s-ino Nancie donacis al ŝi karton kun nomoj de ĉiuj grupanoj por gratuli. Informiĝinte pri tio, ankaŭ nankinaj esperantistoj gratulis ŝin.

Ankaŭ s-inoj Betty kaj Amy havis sian feston respektive en la 28-a kaj la 29-a de aŭgusto en la kvieta urbo Suzhou, konata kiel la orienta Venecio. Vespere de la 29-a, la gastoj invitis min al vespermanĝo. Mi vidis elegantan festokukon kun la Esperantaj vortoj “Feliĉan Feston”, preparitan de s-ino Nancie por tiuj kvar esperantistinoj. La kuko alportis harmonion de sentoj, ke ĉiuj ĉeestantoj unuvoĉe ekkantis “Feliĉan Feston al Vi”.

### “DU FU JA ESTIS POETO DE LA POPOLO!”

La granda ĉina poeto Du Fu en Tang-dinastio kun sia familio venis de norda Shaanxi al la urbo Chengdu en la vintro de 759 p.K. kaj konstruis en ĝia antaŭurbo kabanon, en kiu li loĝis pli ol tri jarojn kaj verkis pli ol 240 poemojn. Por rememorigi pri li, oni konstruis pajlan kabanon en la loko de la malnova kabano. Nun la kabano estas tre ofte vizitata de turistoj.

*Vizitantoj kantas Esperante kune kun esp-istoj de Chengdu.*



Dum la vizito al la kabano mi voĉlegis al niaj gastoj en Esperanto la belajn poemojn de Du Fu, kiel “Balado pri Militĉaroj”, “La Pedelo de Shihao-vilaĝo”, “La Disiĝo de Nove-geedzigitoj” kaj “Lamento pri l’ Kabano Destruta de l’ Aŭtuna Vento”. Liaj poemoj sen ia ajn malvereco montras la suferon de la popolo kaj lian simpatian al ĝi. Kelkaj el la gastoj eĉ larmis, aŭskultante jenajn versojn:

*Se dekmilĉambra palacego  
ie estus nur,*

*Sub kies ŝirm’ la malriĉuloj  
de l’ tutmondo vivas kor-  
kontente,*

*Kaj spite ŝtorm’ ĝi starus  
montsimile en sekur’.*

*Ho! kiam antaŭ mia okul-  
par’ levigos ĉi domego  
monumente,*

*La domrompiĝon propran  
kaj malvarmon mi sufe-  
ros senlamente!*

La brita gasto Steve diris: “Ni bone komprenis la poemon. Du Fu ja estis poeto de la popolo!”

### KANTADO SUB VERDA STANDARDO

Kantoj fariĝis nemalhaveblaj por niaj gastoj dum la vojaĝo.

Kie oni vidis ilin, tie oni povis aŭdi ilian voĉon. Estis altira en la ĥoro la voĉo de la nederlanda samideano Bert, la plej juna el la gastoj. Li, altstatura kaj iom hontema, scias multajn kantojn. Liaj samlandanoj s-inoj Willy kaj Ans ofte fariĝis liaj akompanantoj dum lia kantado. S-ino Hilda ofte dividis la kantantojn en kvar grupojn por kanonoj. Ankaŭ ŝiaj samlandanoj Lily, Trixie, Kate kaj Amy estis lertaj en kantado. Inter la kantoamantoj troviĝis ankaŭ la franca esperantistino-filmistino Marcelle. En la ĥoro oni facile distingis la belan voĉon de poeto Paul, la sola dano inter la vizitantoj.

Vespere de la 1-a de septembro la Internacia Vojaĝa Servo de Ĉinio aranĝis bankedon por adiaŭi la gastojn kaj danki ilin pro ilia alporto de la amikeco de la popoloj kaj esperantistoj de la kvin landoj. En la nomo de la tuta grupo s-ino Nancie donis varman parolon, en kiu ŝi esprimis sian deziron organizi similan grupon por viziti Ĉinion en la venonta fojo. S-ro Paul voĉlegis sian nove verkitan poemon “La Muro”. La bankedo finiĝis en gaja kantado en Esperanto.



## En Ĉinio renaskiĝas pionira spirito

**A**NTAŬ pli ol dudek jaroj mi aliĝis al Esperanta kurso en Kolonjo, kiun gvidis s-ro Wilhelm Wingen, konata kiel aŭtoro de multuzata germana lernolibro de Esperanto. Kial mi tiutempe decidis lerni la lingvon? La ĉefa konsidero estis, ke Esperanto ŝajnis promesi aliron al mondregionoj, kiuj min interesis, sed ne estis alireblaj per unu el la lingvoj, kiujn mi tiutempe lernis en la gimnazio. Hazarde, iun tagon mi vizitis varbvesperon de la Esperanto-Grupo de Kolonjo, kaj tiam estis por mi kvazaŭ sensacia malkovro vidi inter la ekspoziciitaj libroj kaj gazetoj el la tuta mondo eĉ esperantlingvan periodaĵon el fora Ĉinio, nome la revuon *El Popola Ĉinio*. Tio multe helpis konvinki min pri la utilo de Esperanto: En tiu tempo apenaŭ estis troveblaj germanlingvaj verkoj pri la nuntempa Ĉinio, kaj jen mian scivolon promesis kontentigi revuo el la lando mem — varienhava, ilustrita revuo el Ĉinio en Esperanto!

De tiam mi estas, kun nur ioma interrompo, regula abonanto de *El Popola Ĉinio*, kiu instruis al mi multon pri ĉinaj aferoj. Kiam en la universitato mi ekstudis historion kaj politikan sciencon, tiu ĉi originala fonto akiris ankoraŭ pli da graveco, kompletigante aŭ relativigante la iom post iom ŝvelantan literaturon, kiu precipe ekde la fino de la 1960'aj jaroj komencis aperi en Eŭropo pri la progresoj,

perturboj kaj perspektivoj de Ĉinio.

Sed legi kaj vidi estas du aferoj. Neniam tio iĝis al mi tiel klara, kiel dum kvar tagoj en junio ĉi-jare, kiam mi havis la ŝancon viziti Pekinon. La scioj, kiujn mi alproprigis al mi pri Ĉinio, interalie per la multjara legado de *El Popola Ĉinio*, certe estis bona bazo, sed samtempe ĉiam konsciigis pri la limoj — pri tio, ke eĉ multe da legado pri iu lando ne povas anstataŭi viziton al ĝi kaj personan kontakton kun ĝiaj loĝantoj. Kaj ĝuste tial la vizito al Ĉinio estis ekscita travivaĵo.

Kvar tagoj estas tute mallonga tempo, sed se mi memoras, kiom Ĉinio tra du jardekoj kvazaŭ malkovris sin al mi helpe de Esperanto, mi kun des pli granda ĝojo konstatis, kian maksimuman utilon donis tiu restado dank' al la tuja kontakto kun ĉinaj esperantistoj kaj ilia perfekta prizorgo. Eble mi neniam antaŭe vizitis fremdan landon, kie mi preskaŭ ekskluzive uzis Esperanton: en Ĉinio mi apenaŭ devis dependi de la kutimaj provoj "interkompreniĝi" balbute aŭ geste.

Kiel scias la legantoj de *El Popola Ĉinio*, la ĉina Esperanto-movado povas bazi sin sur impona tradicio. Kune kun la japana, ĝi delonge helpis kontraŭagi la impreson, ke Esperanto, pretendanta tutmondecon, fakte floras nur en Eŭropo kaj Ameriko. Estis por mi siatempe



*S-ro Ulrich Lins  
en Pekino*

kialo por bedaŭro, ke dum la t. n. kultura revolucio preskaŭ ĉesis ekzisti Esperanto-movado en Ĉinio. Tiu tempo feliĉe nun pasis, kaj dum mia restado la ĉinaj esperantistoj malkaŝeme dividis mian bedaŭron pro la deviga paŭzo, samtempe certigante, ke hodiaŭ la ŝancoj por Esperanto en ilia lando estas pli bonaj ol iam ajn antaŭe. Aparta travivaĵo estis la renkonto kun pluraj gejunuloj el diversaj partoj de Ĉinio, kiuj venis al Pekino por partopreni porinstruistan kurson. En ilia entuziasmo mi rimarkis iusence pioniran spiriton, al kies karakterizaĵoj apartenas retoriko jam preskaŭ forgesita inter eŭropaj esperantistoj. Tial, eĉ se la esprimformoj de la laboro por Esperanto varias de lando al lando, mi ne hezitas esprimi la esperon, ke la ĉinaj esperantistoj sukcesos infekti siajn alilandajn samideanojn per sia freŝa entuziasmo, ĉar la nova aŭroro de Esperanto en Ĉinio povas daŭri nur, se la ĉinoj ricevas kuraĝigon por sia laboro per tio, ke ankaŭ en aliaj landoj pulsas vigla Esperanta vivo.

En vilaĝo de Jiangxi



“Mi paŝtas anasojn  
kune kun mia avo.”  
(en Jiangxi)

## Fotoj Faritaj dum Mia Trimil-kilometra Vojaĝo




Mi kune kun miaj junaj fotistoj-amikoj faris longan vojaĝon bicikle. Ni ekveturis de Jiangxi, trairis Zhejiang, Anhui, Ŝanhajon, Jiangsu, Shandong, Tianjin, Hebei kaj fine atingis Pekinon. La vojaĝo daŭris du monatojn.

La trairitaj lokoj estas tre belaj kaj riĉaj kaj la tieaj popolanoj tre laboremaj kaj modestaj. Ni kun granda intereso fotis scenojn impresantajn nin neforgeseble.

Fotoj de Sun Yi


Reveno de paŝtado (en Zhejiang)









Kampaninoj





La monto Huangshan en Anhui





La lago Shouxi en Yangzhou


Kampanoj en la Okcidenta Lago de Hangzhou




Reveno de fiŝkaptado en la lago Taihu



Ĉe marbordo  
en Shandong



Kampano kun siaj  
ĉevaloj (en Shan-  
dong)



Antaŭ rikoltado (en Hebei)

Gojo pro riĉa rikolto (en Hebei)



# RENKONTE AL LA NOVA JARO

## ABONVARBA KAMPANJO

por

## EL POPOLA ĈINIO

Ekde 1-a nov. 1982 ĝis 28-a feb. 1983

Tiu, kiu abonos aŭ reabonos dum la supra periodo de la kampanjo, ĝuos 20% da rabato kaj donace ricevos Esp. koloran kalendaron por 1983.

### ABONTARIFO

|                    |       |           |          |        |           |
|--------------------|-------|-----------|----------|--------|-----------|
| 1 jaro (12 n-roj)  | £3.00 | US\$6.00  | post     | =£2.40 | US\$4.80  |
| 2 jaroj (24 n-roj) | £5.00 | US\$10.00 | rabatado | =£4.00 | US\$8.00  |
| 3 jaroj (36 n-roj) | £7.00 | US\$14.00 |          | =£5.60 | US\$11.20 |

*Atentigo: La supra tarifo ne validas en landoj de Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko. Abonantoj kaj reabonantoj tie bonvolu atenti EPC-anoncon en sialandaj Esp.-periodaĵoj aŭ sin turni al la loka peranto.*


### Memoraĵoj por abonvarbantoj

Kore bonvenigata estos ĉiu, kiu volonte varbos abonantojn por EPC. La varbanto sendu abonant-liston kaj abon-pagojn al la loka peranto kun peto, ke la lasta enskribu lin aŭ ŝin kiel abonvarbanton. Aŭ oni sendu la liston kaj pagojn rekte al la suba adreso. Ĉin-stila memoraĵo iros al ĉiu abonvarbanto proporcie al ties akirita sukceso.

*Tamen, ne forgesu aboni aŭ reaboni por vi mem!*

**PROSPEKTON KAJ  
PROV-EKZEMPLERON ONI  
SENDOS SENPAGE LAŬ PETO**

Esperanta Sekcio de  
CENTRO DE  
ĈINAJ ELDONAĴOJ  
(GUOJI SHUDIAN)  
P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio





## GUANGDONG-A KAJ KANTONA ESPERANTO-ASOCIO FONDITA

La 19-an de septembro okazis en Kantono, la ĉefurbo de Guangdong-provinco, la inaŭgura kunveno de la Guangdong-a kaj Kantona Esperanto-Asocio. La kunvenon ĉeestis ĉ. tricent esperantistoj. Liu Jian raportis al la kunveno pri la laboro de la prepara grupo de la asocio. Li diris, ke en la pasinta pli ol unu jaro la prepara grupo funkciigis 23 diversajn Esperanto-kursojn kaj elkulturis pli ol okcent esperantistojn, kio metis bazon por la fondo de la asocio.

Yang Kanghua, vicestro de la provinco Guangdong, faris paroladon en la kunveno. Li estis elektita kiel honora prezidanto de la asocio; Ren Bosheng, vicestro de la Scienca-Teknika Komisiono de la provinco, kiel ĝia prezidanto; kaj Liu Jian, Li Shixiong kaj Ye Shuzi kiel ĝiaj vicprezidantoj.

La kunveno ricevis gratulajn leterojn kaj telegramojn de tridek Esperanto-organizoj en diversaj lokoj de Ĉinio kaj ankaŭ de japanaj sami-

deanoj. Esperanto-organizoj de Hubei, Ŝanhajo, Anhui, Jiangsu, Guangxi k.a. sendis siajn reprezentantojn al la kunveno por gratuli.

## EKFUNKCIIS EN PEKINO LA DUA PORINSTRUISTA ESPERANTO-KURSO

La inaŭguro de la Dua Porinstruista Esperanto-kurso fondita de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj la Pekina Fremdlingva Instituto okazis en la Pekina Fremdlingva Lernejo, la 15-an de septembro. La kurson vizitas dek kvin instruistoj el la Internacia Politika Instituto de Pekino, Nankai-universitato de Tianjin, Poŝta kaj Telekomunika Instituto de Changchun, Instruista Universitato de Hebei, Hebei-a Universitato, Eduka Instituto de Jiangxi, Ĉinmedicina Instituto de Jiangxi, Fuzhou-a Universitato, Zhejiang-a Universitato, Kantona Fremdlingva Instituto, Jinan-universitato, Yunnan-a Universitato, Financa Instituto de Sichuan, Pekina Fremdlingva Instituto kaj Anhui-a Universitato. La kurson vizitas ankaŭ dek du lernantoj senditaj de la Esperanto-Instituto de Jilin kaj la Esperanto-asocioj de Hubei kaj Shanxi. La kurso daŭros unu jaron.

## ESPERANTO-HELPSTACIO EN YINCHUAN STARIGITA

Subtenate de la Scienca-Teknika Komisiono de la Ningxia-a Huj-nacieca Aŭtonoma Regiono, la Esperanto-helpstacio starigis la 1-an de aŭgusto. Ĝiajn laborojn partoprenas veteranaj esperantistoj kaj ankaŭ junuloj fervoraj por nia movado, inter kiuj troviĝas instruistoj, teknikistoj, kuracistoj, laboristoj kaj tradukistoj.

La helpstacio funkciigos Esperanto-kursojn kaj disvolvos diversajn aktivadojn.

La 13-an de septembro prof. Io Chou, fama entomologo de la Nordokcidenta Agronomia Instituto, kiu veturis al Ningxia por prelego, kunsidis kun la kamaradoj de la stacio kaj varme gratulis ilin pro la starigo de la stacio.

## ESPERANTO EN LA GAZETO "FILATELO"

La gazeto "Filatelo" kun distribua kvanto de 250 000 ekzempleroj publikigis en sia naŭa numero de 1982 la artikolon "Zamenhof kaj Esperanto" verkitan de Song Shengtian, en kiu la aŭtoro mallonge traktis la evoluon de Esperanto kaj ĝian nu-

*La Dua Porinstruista Esperanto-kurso en Pekino*





*S-ro G. Chevrolat, la nova prezidanto de SAT, en la paco-domo de Leningrado, renkontiĝas kun sovetiaj esp-istoj kaj faras paroladon.*

nan staton. Ĝi ankaŭ aperigis sep Esperantajn poŝtmarkojn.

### ADIAŬ AL S-RO GEOFFREY SUTTON

Kiel volontulo por EPC s-ro Geoffrey Sutton jam finis sian laboron de unu jaro en la redakcio. Tie li sin okupis ĉefe pri polurado de artikoloj. La 8-an kaj 9-an de oktobro EPC kaj ĈEL aranĝis te-kunsidon kaj bankedon por adiaŭi lin kaj danki lin pro lia efika kunlaboro en la pasinta unu jaro.

S-ro Sutton forlasis Pekinon por flugi al Japanio la 11-an de oktobro.

### LA 55-A KONGRESO DE S.A.T.

En Lisalmi, Finnlando, okazis la 55-a SAT-Kongreso de la 31-a de jul. ĝis la 6-a de aŭg. 1982. Ĝin partoprenis 237 esperantistoj el 15 eŭropaj landoj. La kongreso aprobis deklaron, kiu diras interalie: La jaro 1983, kiun U.N. proklamis Monda Jaro pri Komunikado, estas okazo por profunda esploro de ĉiuj problemoj de lingvoj, de komunikado, kaj de starigo de bazoj kaj rimedoj por nova monda lingva ordo.

Propono okazigi la 56-an SAT-Kongreson en Linz, Aŭstrio, ricevis aplaŭdon de la ĉeestantaro.

### VERKISTA ASOCIO REFONDITA

Dum la 67-a Universala Kongreso de Esperanto en Antverpeno, la 29-an de julio 1982, kunvenis 15 bone konataj Esperanto-verkistoj, tradukistoj kaj kritikistoj, kaj decidis refondi la iam ekzistantan Estrantan Verkistan Asocion, kies nova nomo estos Esperanta Verkista Asocio (EVA). La celoj de la asocio estos prizorgi la profesion statuson de la Esperanto-verkisto, ordigon de kopirajto kaj aliaj profesiaj demandoj, firmigante la pozicion de la verkisto; kiam bezonate, influi la literaturpolitikon en nia medio, kaj laŭ sia eblo kontribui al la rekono de la Esperanto-literaturo en neesperantaj rondoj.

La renovigita asocio planas sian unuan plenkunsidon dum la UK en Budapeŝto, en julio 1983.

### ALVOKO AL LA INTERNACIA KONGRESA UNIVERSITATO

En la kadro de la 68-a UK en Budapeŝto okazos la 36-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato. Universitataj profesoroj kaj simile kvalifikitaj personoj povas proponi prelegon al la Komisiono pri IKU (S. Kawamura, M. Landmark kaj B. Sherwood) ĉe la sekretario: Prof-o Bruce Sherwood, 252 Engr.

Res Lab., 103 S. Mathews, Urbana IL 61801, Usono. Oni sendu foto-portreton kaj kvar kopiojn de titolo, resumo, bibliografio kaj biografieto antaŭ la 10-a de januaro 1983.

Prelegantoj ricevos danksumon sed ne vojaĝajn kostojn.

### "LA MEVO" ELDONATA EN HUNGARIO

La kunsido de Ornitologia Rondo Esperantlingva okazinta en la hungara urbo GYULA decidis transdoni la presigon de sia organo "La Mevo" en Hungarion, kie loĝas la prezidanto, la sekretario kaj unu el la kassistoj de ORE. Kiel sciante, "La Mevo" estas internacia revuo pri ornitologio en Esperanto kaj estas sendata al ĉiuj ORE-membroj. Nun la n-ro 1 (51), 1982 jam aperis bonkvalite kaj bonaspekte. Unuopaj kajeroj estas aĉeteblaj ĉe la redaktoro, ĉiu je 5 nederlandaj guldenoj. Ankaŭ por interŝanĝo de revuoj oni turnu sin al la redaktoro, same kiel pri la enhavo. Poŝtadreso: Debrecen, P.K. 61, H-4010, Hungario.

ORE revokas ĉiujn siajn estintajn anojn kaj esperas akiri por "La Mevo" novajn abonadojn kun la celo atingi 1 000-ekzempleran eldonadon.

### LA 16-A INTERNACIA KONFERENCO DE ILEI

La nomita konferenco okazis de la 15-a ĝis la 24-a de julio 1982 en Seiano di Vico Equense (Italio) sub la aŭspicioj de la Itala Ministerio pri Publika Instruado. Partoprenis la konferencon 87 delegitoj el 10 landoj (Aŭstralio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Francio, FR Germanio, Hungario, Izraelo, Italio, Nederlando kaj Svedio). La ĉefa temo de la konferenco estas la emancipa principo de Esperanto en la edukado: eblecoj kaj limoj.

La 17-a Internacia Konferenco de la Internacia Lingvo de Esperantistaj Instruistoj okazos en Sintra (Portugalio) de la 14-a ĝis la 22-a de julio 1983.





Doktoro Kotni

**L**A 9-a de decembro ĉi-jare estos la 40-a datreveno de la forpaso de doktoro D.S. Kotni, intima amiko de la ĉina popolo kaj internaciisma batalanto kia Norman Bethune\*\*. Ĉiufoje, kiam mi rememoris la tagojn en kiuj mi kunlaboris kun tiu hinda kuracisto, mi kvazaŭ denove vidus lian ridetan mienon.

Doktoro Kotni estis bombajano. Li finis sian studon en medicina instituto en la tempo, kiam japanaj imperiistoj invadis Ĉinion. En 1938 li venis en Ĉi-

KANG KE\*:

## Kar memoro al doktoro Kotni

nion kiel membro de medicina grupo iniciatita kaj sendita de la Naci-kongresa Partio de Hindio por helpi Ĉinion en ĝia rezisto kontraŭ Japanio. Li serioze kaj sindoneme laboris en Yan'an kaj aliaj kontraŭjapanaj bazlokoj en norda Ĉinio por savi vunditajn soldatojn kaj instrui kuracarton. Fine li falis en malsanon pro peniga laborado kaj oferis sian junan vivon por la naciliberiga afero de la ĉina popolo.

Dum la Kontraŭjapana Rezistmilito mi laboris en la Higiena Lernejo N. Bethune en la Shanxi-Chahar-Hebei-a Liberigita Regiono, en kiu instruis doktoro Kotni. Antaŭ ol vidi lin, mi multe aŭdis pri liaj modelaj agoj. Ekzemple, dum iu batalo malgraŭ kanonado doktoro Kotni kune kun medicinistoj de la Oka-voja Armeo rapide starigis kuracejon ĉe la fronto por savi vunditajn soldatojn. Tre arde iris la batalo. Obusoj detruis angulon de la kuracejo. Maltrankvilaj pri li, la ĉinaj kolegoj admonis, ke li transloku la kuracejon iom malproksimen de la fronto. "Se ni translokos la kuracejon tre malproksimen por nia sekureco, kiom da doloroj tio kaŭzos al vunditaj soldatoj?" li diris kaj daŭre operaciis vunditon. Dum la 40-hora batalado li bandaĝis kaj operaciis sinsekve pli ol 80 vunditojn. Tial mi kaj miaj kamaradoj tre ĝojis, ke instruos en nia lernejo tiu nobla

justama doktoro kun eminenta kuracarto.

En la aŭtuno de 1940 Kotni venis al nia lernejo en la vilaĝo Gegong en la gubernio Tangxian, Hebei-provinco. Komence li instruis ĥirurgion kaj poste funkciis kiel estro de la Mondpaca Hospitalo N. Bethune. Li ne vidis doktoron Bethune, tamen tre admiris lin. Li decidis lerni de li bonan laborstilon kaj sin montri fervorega por la popolo. Ĉiutage, krom plenumi pezajn laborojn de la hospitalo, li ankaŭ donis lecionojn kun alta devokoscio. Li ofte diris, ke la tasko por alilanda medicina grupo estas ne nur senpere apliki teknikon en kuracado, sed pli grave kulturigi ĉinajn medicinistojn neniam forirontajn.

Dum kulturado de medicinistoj lin trafis lingva baro. Foje, ĉe la fino de sia parolo en kunveno li diris: "Kamaradoj, mi ne finis mian parolon." Vidinte, ke la lernantoj sidas senmove, li ripetis la samon. Sed ili restis ankoraŭ senmovaj. Nur en tiu momento li ekkonsciis, ke eble li malĝuste sin esprimis, kaj faris geston de disiĝo. Nur post tio ili ekkomprenis, ke li volis diri, ke li finis sian parolon. Kotni trovis necese lerni la ĉinan lingvon. Por ellerni ĝin, li ĉiam kunportis kun si kajereton kaj petis helpon de ĉiu, kiun li renkontis. Li eĉ notis vortojn, kiujn li vidis sur apudvoja tabulo, starigita

instru-cele por membroj de infana ligo, dum ilia kontrolo de paslegitimiloj. Kiel kantoamanto, li notis ankaŭ la vortojn de la ĉinaj kantoj "Marŝo de Volontuloj" kaj "Sur la Montaro Taihang". Por prepari lecionojn li unue skribis la lekciajn tekstojn en la angla lingvo, poste petis alian instruiston ĉinigi ĝin kaj li lekciis laŭ la ĉina tradukajo. Por prepari unu lecionon li devis elspezi tempon kelkoble pli longan ol aliaj. Tiamaniere li pliefikigis kaj sian instruadon kaj la lernadon de la ĉina lingvo. Dank' al sia diligenteco li povis, post apenaŭ unu jaro, bone prepari kaj doni lecionojn ĉinlingve.

Foje, kiam doktoro Kotni gvidis lernantojn por fari praktikon en arma hospitalo, oni portis de la fronto soldaton grave vunditan je la abdomeno. Ekvidinte la vunditon, Kotni diris: "Tuj, tuj! Tempo ja signifas vivon." Ekzamenante la vundojn, li faris klarigojn al la lernantoj.


La batalanto havis ses vundojn en la abdomeno. Parto de lia intesto ellasiĝis el la abdomeno, kiu bezonas kunkudriĝi. Dum la operaciado Kotni ĝustatempe donis atentigojn al la lernantoj. Subite fekajo ŝprucis el la vundita intesto kaj makulis liajn vizaĝon kaj kolon. Tiam liaj lernantoj tuj viŝis la fekajon per gazo, sed li diris: "Gravas savi la vunditon!" kaj daŭre faris la operacion, kvazaŭ nenio okazus. La operacio daŭris de la dektria horo ĝis la vespero. Post la operacio Kotni diris al la lernantoj, ke ili observu la sanstaton de la vundito, kaj klarigis al ili, kial ŝprucis la fekajo. Li diris poste: "La vundito estas glora batalanto kaj bona filo de la ĉina nacio, kiu sangis pro la patrolando. Tion pensante, ni ne plu sentas fekajon eĉ pli fetora." Liaj vortoj profunde kortuŝis la ĉeestantojn.

Kotni havis profundan amon al la ĉina popolo. Li ĉiam fer-

vore kuracis vilaĝanojn, se li rimarkis ilin malsanaj. Foje li eliris por kunveno. Informiĝinte, ke malamikoj invados la vilaĝon Gegong, kie situis la lernejo, li tuj hastis revene al la lernejo. Kiam li iris preter vilaĝo dekkelkajn kilometrojn for de Gegong, li subite ekaŭdis ĝemojn de virino. Laŭ la sonoj li eniris en kabanon kaj vidis ŝvitantan gravedulinon kun pala vizaĝo kuŝantan sur terlito. Sia edzo jam forlasis la hejmon por aliĝi al gerila taĉmento. Ŝi devis akuŝi, sed dronis en granda danĝero pro abunda hemoragio. Kotni tuj venigis kelkajn vilaĝajn milicianojn, kaj ĉi tiuj portis ŝin per brankardo al Gegong. Tuj en tiu vespero li operaciis ŝin kaj sukcese akuŝigis ŝin. Liaj agoj kortuŝis ĉiun, kiu ricevis lian kuracon.

Kotni multe laboris, sed neniam postulis apartan prizorgon. Dum iu tempo malamika blokado kaŭzis malfacilegon al la vivo

*La hinda medicina grupo en Chongqing en 1939. La dua de dekstre estas doktoro Kotni.*



*La 21-an de junio 1940 doktoro Kotni ĉeestis la inaŭguron de la tombo de N. Bethune laŭ la peto de komandoro Nie Rongzhen. Jen li prezentas girlandon en la nomo de la hinda medicina grupo.*



de la popolo en la Liberigita Regiono. Konsiderante pri lia sano, la superuloj ĉiamaniere havigis al li rizon. Sed li diris: “Vi manĝas milion kaj nigrajn fabojn sed donas al mi rizon. Tio signifas, ke vi ne rigardas min kamarado. Mi ne volas tian apartan prizorgon.” Foje la superuloj donis al li densigitan lakton batalakiritan de popola trupo. Li ĝin portis al grave vundita soldato kaj trinkigis lin kuleron post kulero. Sub lia influo iuj ĉinaj medicinistoj konsciencie cedis sian delikatan manĝaĵon al vunditoj.

Dank’ al la zorgema kuracado de Kotni multaj vunditoj resaniĝis unuj post aliaj, sed la doktoro mem malgrasiĝis. Pro lacego lia malnova malsano — epilepsio pli kaj pli graviĝis. La superuloj admonis al li, ke li, akompanate de sia edzino, veturu al Yan’an aŭ revenu al sia lando por kuraci la malsanon. Tion Kotni rifuzis, dirante: “Ĉiufoje, kiam mi vidas soldatojn de la Oka-voja Armeo, kiuj brave batalas sen timo al sangverŝo kaj morto, mi trovas mian malsanon bagatela kaj ne volas eĉ unu minuton forlasi mian batalan postenon.” Posttagmeze de la 8-a de decembro 1942, kiam Kotni skribis la tekston “Pri Ĥirurgio” por lek-


cio, oni alportis de la fronto kelkajn grave vunditajn soldatojn. Li tuj ĉesis skribi kaj rapidis al la operaciejo. Poste li ekzamenis la sanstaton de dudekelkaj vunditoj, kaj fininte tion li revenis hejmen. En tiu nokto graviĝis lia malsano. Kaj je la sesa horo de la sekvanta mateno li forlasis nin por ĉiam post vana kuracado. Tiam li estis nur 32-jara.

Okaze de la 40-a datreveno de lia forpaso ni kun granda respekto kaj sopiro rememoras lian pasintecon. Kiel semanto de la amikeco inter la ĉina kaj hinda popoloj, doktoro Kotni ĉiam vivos en la koro de la ĉina popolo.

*\* La aŭtoro funkcias kiel vicrektoro de la Medicina Universitato N. Bethune. Ĝia antaŭa nomo estas la Shanxi-Chahar-Hebei-a Higiena Lernejo N. Bethune.*

*\*\* Norman Bethune (1890-1939) estis fama kanada toraka ĥirurgo. En 1938 li venis al Ĉinio kun medicina grupo sub sia gvido por helpi la ĉinan rezistmiliton kontraŭ Japanio. Li faris grandan kontribuon por la naci-liberiga afero de la ĉina popolo. Novembre de 1939 li mortis en Ĉinio pro sangoveneniĝo dum operacio al vundita ĉina soldato.*

*Doktoro Kotni mortis en la vilaĝo Gegong, Tangxian-gubernio, Hebei-provinco, je la 9-a de decembro 1942. Jen adiaŭas lian kadavron lia edzino Guo Qinglan kun la filo en la brakoj.*



## Vojaĝo al la

**L**A monto Wudang estas unu el la famaj ĉinaj montoj. En la loko kun periferio de 400 kilometroj ondas ĝiaj sepdek du pintoj, inter kiuj la ĉefa pinto Ĉielsubtena Kolono, 1 613 metrojn alta super la marnivelo, staras en la gubernio Junxian, Hubei-provinco.

Jam en la komencaj jaroj de Tang-dinastio antaŭ pli ol 1300 jaroj oni komencis konstrui ĉi tie templojn por prediki taoismon. En la 15-a jc., post kiam la imperiestro Zhu Li de Ming-dinastio surtroniĝis, li favoregis taoismon kaj ordonis al iu altrangulo gvidi 300 000 soldatojn por tie konstrui templojn. Post dek jaroj tie aperis pli ol 160 temploj, kioskoj, pontoj k.a., kiuj etendiĝas 70 kilometrojn. De tiam la monto fariĝis la taoisma centro en la meza parto de Ĉinio. Hodiaŭ tie ankoraŭ estas bone konservataj konstruaĵoj, el kiuj la plej pompa Ora Halo situas sur la kulmino de la ĉefa pinto.

Ni surgrimpis la monton laŭ vojeto flanke de la montpiedo. Sur la serpentuma vojo kun kruta ŝtuparo, ni grimpis tri horojn, trapasis akran vojkurbiĝon sur la kruta montdeklivo kaj vidis kvar gravuritaĵajn ĉinajn ideografiaĵojn signifantajn “Ĉielsubtena Kolono”. Jen ni jam atingis la ĉefan pinton.

Supren rigardante, ni vidis tuj antaŭ ni ŝtonan urbon sur alta krutaĵo, kies muro, 1.5 kilometrojn longa, estas masonita per ŝtonegoj ĉiu kun pezo de ĉirkaŭ duono da tuno. En-

# monto Wudang

de MU WEN

irinte la urbon, trapasinte longan zigzagan koridoron laŭ rokmuro, grimpite sur serpentuman neregulan kaj krutan ŝtuparon ni atingis la Oran Halon. La halo staras sur la kulmino kun areo nur de p'i ol 20 kvadrataj metroj. La tuta halo, krom la granita bazo, estas farita el orumitaj bronzaĵoj kunigitaj per nitaj. La orbrila konstruaĵo aspektas impone. Sur ĝiaj duoblaj kornicoj kaj firsto staras 68 delikate faritaj kaj orumitaj bronzaĵoj. En la centro de la halo troviĝas sidstatuo de Zhenwu, dio kultata de la taoistoj. Apud la statuo staras skulptitaj figuroj de Ora Knabo, Jada Knabino, Generaloj Fajro kaj



*La pintoj "Kvin Maljunuloj" de la monto Wudang*

Akvo. Ili ĉiuj estas orumitaj bronzaĵoj. La halo, konstruita en 1416, restas ankoraŭ sendifekta hodiaŭ. Tio montris majstrecon de metal-fandado, muldado kaj konstruado.

Forlasinte la Oran Halon, laŭ la kruta ŝtuparo kaj vojstrekaj ni iris al la Suda Klifo, la plej bela el la 36 pitoreskaj klifoj de la monto. La

bela pejzaĝo de la survojaj montpintoj kondukis nin en la lokon, kie murmuris fontakvoj, kantas birdoj. La ĉiam verdaj nuboskrapaj pinoj kaj cipresoj kaj ĉie videblaj ruĝaj folioj impresis kiel ruĝaj floroj sur la verdaj tapiŝoj.

En la monto Wudang, precipe ĉe la Suda Klifo abundas drogherboj, multspecaj kaj bonkvalitaj. Jam de

*Sonorilo kun du drakoj (bronzaĵo farita en 1413-1418)*



*Serpento kaj testudo (bronzaĵo farita en 1413-1418)*





longe ĝi ĝuas la reputacion de "Natura Apoteko". La fama ĉina farmaciisto en la 16-a jc. Li Shizhen trapasis multajn montojn por serĉi daturon kaj fine trovis ĝin en la monto. En lia fama farmakopeo "Bencao Gangmu" registriĝis pli ol 1 800 specoj da drogherboj, el kiuj pli ol 400 specoj ja troveblas en la monto Wudang.

Ĉirkaŭ tri kilometrojn malantaŭ la Suda Klifo en la vasta montvalo vidiĝas verda templo kun glazuritaj tegoloj. Ĝi estas la fama templo Zixiao-gong.

La templo situas dorse al la pinto Zhanqi, kiu aspektas kiel giganta flago flirtanta en vento. Sur la monto ĉie kreskas pinoj, cipresoj kaj bambuoj, floras orflavaj krizante-moj, purpuraj kokkrestoj (*Celosia kristata*) kaj boltonioj (*Boltonia indica*). Inter ili kaŝiĝas la templo en imponeco kaj kvieteco.

La templo Zixiao-gong, ĝis hodiaŭ sendifekta, estas la ĉefa konstruaĵo el la ok temploj de la monto. Ĉirkaŭ ĝi estas alta ruĝa muro, ambaŭflanke de ĝi estas la haloj Orienta kaj Okcidenta. Sur ĝia meza akso troviĝas kvar haloj unu super alia laŭ la montodeklivo. En iu halo


sidas delikata bronza statuo de Zhenwu, tri metrojn alta, ambaŭflanke de ĝi staras argilaj statuoj. En la kiosko antaŭ la halo estas du bone konservitaj gigantaj ŝtonaj testudoj, ĉiu kun alteco de tri metroj, longeco de kvar metroj kaj larĝeco de du metroj. Sur la dorso de ĉiu ŝtona testudo staras ŝtona slabo, dek metrojn alta. Historiisto montris, ke tiaj testudoj skulptitaj el tiel giganta ŝtono estas raraj en nia lando. Forlasinte la templon Zixiao-gong kaj ekirinte okcidenten ni malsupreniris laŭ montvojo, kiu serpentas inter montvaloj kaj preter klaraj fontoj ombrataj de sovaĝaj floroj. Baldaŭ ni venis al la Kudril-akriga Puto.

En la monto Wudang cirkulas multaj mitoj, inter kiuj plej vaste koniĝas la rakonto pri la Kudril-akriga Puto. Oni diras ke antaŭ tre tre longa tempo, kiam Zhenwu kulturis sin por akomodiĝi al taoismo en la monto, li ŝanceliĝis en sia kredo kaj foriris malsupren de la monto. Kiam li atingis la puton, li vidis maljunulinon akriĝanta ferstangon ĉe la puto. Li mire demandis, por kio ŝi faras tion. Tiu ĉi respondis kun rideto, ke ŝi volas


turni la ferstangon en kudrilon. Je tio subita saĝo lumigis lian kapon kaj li tuj revenis al la monto por daŭrigi sian memkulturadon. Legendo diris, ke la maljunulino estis transformita el feo. Hodiaŭ la bronza maljunulina statuo staras en la halo ĉe la puto. Ŝi kun ferstango en la manoj ridete rigardas turistojn. Tiu antikva legendo pri-kantis neŝanceblan volon kaj esprimas la belan deziron de la popolo. Inter la ĉinoj longtempe cirkulas la proverbo "Kun persista penado oni povas turni ferstangon en kudrilon".

Ĝuste kun tia fera volo, dum pli ol 30 jaroj post la Liberiĝo la tieaj kamparanoj konstruis sian hejmlokon. Nun la kalva monto jam kovriĝas per verdaj plantaĵoj. Sterniĝas ĉie teraskampoj kun cisternoj. Kanaloj kvazaŭ silkaj rubandoj fluas ĉe la montpiedo. Sur la monto kreskas fruktarbaroj. Jam donas fruktojn pomarboj el la Nordoriento, oranĝarboj el Zhejiang-provinco kaj eĉ senkernaj vinberarboj el Xijiang. La ŝoseo jam kondukas al la Suda Klifo, kio estas multe oportuna al turistoj vizitantaj la pitoreskan lokon.

## LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. Pekino
2. Huhhot
3. Weichang-gubernio
4. Xi'an
5. Chengdu
6. Nankino
7. Yangzhou
8. Suzhou
9. Ŝanhajo
10. Wudang-monto
11. Qingdao
12. Shenjang




## LA MONTO WUDANG

Fotoj de Li Chungeng

La monto Wudang sin trovas en Junxian-gubernio de Hubei. Ĝi allogas la turistojn per siaj belaj pejzaĝoj de altaj montpintoj, profundaj ravinoj, kristalaj lagetoj kaj delikataj pavilonoj. Pri ĝia detalo bonvolu legi la artikolon "Vojaĝo al la monto Wudang" en ĉi numero.





La templo Zixiaogong konstruita inter 1413-1418



La Ora Halo konstruita en 1416



“Ĉielsubtena Kolono” — la ĉefa pinto de Wudang

La templo Nanyangong konstruita en 1413





# FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ

de Gerda Koupp  
(FR Germanio)

Lageto-rozoj



Orkideoj sur la herbejo



# La Domo de Kriplaj Infanoj

**M**IA amiko estas jurnalista. Li donis al mi foton fari-tan de li kun la titolo "Neordi-nara Festeno". Ĝi montras ves-permanĝadon de kriplaj infanoj de la Ŝanhaja Infana Bonstatiga Domo en festotago, kiuj, sidante ĉirkaŭ tabloj, ĝuas abundajn pla-dojn helpe de la direktorino kaj vartistinoj.

La foto vekis ĉe mi grandan intereson. Posttagmeze de iu sabato mi vizitis la domon. La 63-jara direktorino de la domo Yang Jiezeng akceptis min. Tiu grizhara maljunulino laboris kiel pedagogo de kriplaj infanoj jam pli ol dudek jarojn. Ŝi estas tre fiera pri sia laboro.

Ŝi diris: "Tuj post la liberiĝo de Ŝanhajo, urbestro Chen Yi kaj Song Qingling, la gvidanto de la Ĉina Popola Ĝenerala Helpa Ligo, ordonis transpreni la infanan domon Yuyintang por savi la infanojn baraktantajn kontraŭ la morto, kiu poste fariĝis la domo de kriplaj infanoj. Nun tie vivas kvincent infanoj, inter

kiuj la plej granda aĝas je 16 jaroj kaj la plej malgranda je kel-kaj tagoj. La elspezo de la domo estas pagata el la socia fonduso fondita de la ŝtato."

Mi volis tuj vidi la infanojn en la foto. Akompanate de Yang, mi venis al la vasta ĉam-bro, kie sur la muroj pendis bil-doj kaj papertondadoj ŝatataj de la infanoj, kaj la horaro. Tiam la infanoj ĵus ellitiĝis post la siesto kaj faris ludon sidante ĉirkaŭ tabloj. Kvankam ili ne povas sin movi libere kiel la sanaj infanoj, tamen ili estas same viglaj. Vidante Yang kaj min, ili la unuaj salutis nin, kaj iuj el ili ameme vokis Yang "avinjo", ĉirkaŭprenante ŝin. La lasta respondis al la infanoj per kareso kaj kiso.

Vidante tiujn infanojn, mi sentis akran doloron en la koro. Iuj, kvankam jam pli ol dekjaraj, ankoraŭ ne povas sidi, aliaj ha-vas kriplajn brakojn aŭ anorma-lajn piedojn kaj la triaj suferas

de grava intelekta manko. Ili kaŭzas al siaj gepatroj senfinan ĉagrenon. Por zorgi ilin multaj gepatroj devas resti hejme. Por liberigi la gepatrojn de tiuj mal-faciloj la domo akceptis tiujn kriplajn infanojn kaj donis al ili edukon. La gepatroj, kiuj havas kriplan infanon, povas peti kon-senton de la Ŝanhaja Civila Ad-ministra Buroo por sendi ĝin al la domo, kun ĉiumonata pago de dudek juanoj por la vivteno.


En Ĉinio, forjeto de beboj estas riproĉata de la publika opinio. Sed ankoraŭ ekzistas tiaj gepatroj, kiuj ŝatas filojn, sed malŝatas filinojn, eĉ forjetas ilin; ankaŭ iuj junulinoj forjetis sian bastardon en hospitalo, ho-telo aŭ aliaj lokoj. La domo akceptas ankaŭ tiujn forjetitajn infanojn.

"La domo estas malsama ol ordinara infanĝardeno aŭ lerne-jo. Ĝi zorgas ĉefe pri la vivo de kriplaj infanoj kaj samtempe faras al ili kuracadon kaj eduka-don, ĉiel klopodante por malpe-

*Neordinara festeno*



*Yang Jie en pentrado*





zigi ilian kripoleon kaj fari ilin utilaj al la socio,” diris Yang.

Apenaŭ ŝi finis siajn vortojn, aŭdiĝis de ekstere bela muziko. Ŝi diris: “Jam komenciĝis la kuraca gimnastiko por la infanoj, bonvolu iri rigardi.” Ni eliris kaj vidis, ke iuj ne grave kriplaj infanoj faras gimnastikon helpate de kuracistoj. En la gimnastike kuraca ĉambro troviĝas diversaj sportaj instrumentoj, ekz., malgrandaj halteroj, brust-fortigiloj, fiksitaj apogĉaretoj kaj radseĝoj.

Nun la infanoj de la domo estas dividitaj en tri grupojn: En la unua grupo vivas malpli ol-tri-jaraj infanoj; en la dua estas la 13-16-jaraj kun ne tre grava kripleco aŭ malpli da intelekto; kaj en la tria sin trovas infanoj kun grava kripleco kaj serioza manko de intelekto, al kiuj oni faras ĉefe kuracadon kaj trejnadon por ke ili almenaŭ povu zorgi sin mem.

Pli da eduko oni donas al la infanoj de la dua grupo. Oni lernigas al ili ideografiajn ĉefe per bildoj. Dank’ al multjara lernado iuj infanoj jam scipovas legi, kalkuli kaj verki malgrandan artikolon. Estas 11-jara knabo Yang Jie, kiu malfeliĉe

perdis ambaŭ brakojn en akcidento. Sub la helpo de instruistoj li ellernis skribi kaj pentri per plumo tenata per dentoj. En klasĉambro estis montritaj interalie liaj artikolo kaj pentraĵoj. Lia pentraĵo “Koko” estis ekspozita en la Monda Ekspozicio de Pentraĵoj de Kriplaj Infanoj en Japanio kaj premiita per arĝenta medalo.

“La unuan de junio ĉiujare ni faras ĉiujn klopodojn, por ke ili ĝoje pasigu la festotagon kiel la sanaj infanoj,” diris la direktorino. Antaŭ la festo la laborantoj de la domo estas tre okupataj. Kudristoj faras por ili somerajn vestojn, kuiristoj preparas por ili frandaĵojn kaj la arta grupo provludas programerojn. Krome vendejoj provizas ilin per plej bona rizo, freŝaj fiŝoj kaj salikokoj, viando, ovoj, bombonoj, fruktoj ktp.



Dum la festotago multaj gastoj vizitas la domon. Krom raportistoj de radiostacioj kaj filmistoj de studioj, venas al la domo ankaŭ reprezentantoj de la Ŝanhaja Ludila Farejo por doni ludilojn, la konsola grupo de la Ŝanhaja Ruĝa Kruco, la Porinfana Teatro kaj la Pupteatra Trupo por fari prezentadon kaj

la Filmprojekcia Taĉmento por projekcii filmojn.

Depost sia fondiĝo la domo ĉiam ricevas ĉiufankajn subtenojn de la socio. La popola registaro de Ŝanhajo faras periodan inspektadon al ĝi por doni helpojn. Kelkaj grandaj hospitaloj havas rilatojn kun la domo. La Pediatria Fakto de la Sesa Popola Hospitalo kaj la Genetika Instituto ofte faras korpan ekzamenon al la kriplaj infanoj de la domo, tio multe helpas la domon por kuraci la infanojn.

“Ĉu tiuj infanoj restos en la domo dum la tuta vivo?” mi demandis scivoleme. Yang diris: “Laŭ la difino la infanoj, kiuj atingis la aĝon de 16 jaroj, devas forlasi la domon. Iuj revenas al sia hejmo kaj estas zorgataj de siaj gepatroj; aliaj, certagrade laborkapablaj, estas akceptataj de fabrikoj por plenumi facilajn laborojn; kaj la triaj, kiuj ne havas laborkapablon, estas transsenditaj al la Dua Bonstatiga Domo kaj flegataj de la ŝtato. En la pasintaj jaroj 180 plenkreskaj kriplaj infanoj de la domo ekhavis laboron kaj 60 estis senditaj al la Dua Bonstatiga Domo.”

### *En la kuraca ĉambro*



# Kiel aprezi ĉinstilajn pentraĵojn?

de LIAN TONG

**L**A tradicia ĉinstila pentrarto dividiĝas en du specojn, t. e. liberstila pentrado kaj delikatlinia pentrado. La liberstila pentrado aplikas plej rafinitajn, sed troigajn liniojn por prezenti bildon pli perfekta kaj pli versimila, dum delikatlinia pentrado celas perfekte prezenti bildon per delikataj linioj. Ili estas tute malsamaj stile, tamen havas saman efekton.

Post longtempa praktikado de sennombraj pentristoj la tradicia ĉinstila pentrarto fariĝis arto, kiu havas ne nur multajn stilojn kaj skolojn, sed ankaŭ komunajn karakterizaĵojn.

Kio do estas ĝiaj bazaj karakterizaĵoj? Pan Jiezi, pentristo kaj teoriisto de la ĉinstila pentrarto, opinias, ke prezenti bildon per linioj estas unu el ĝiaj karakterizaĵoj. En la ĉina pentrarto oni kreas versimilan bildon kaj mienon per linioj, sed ne per grandfaca farbado. La ĉinaj pentristoj ne tre atentis pri uzo de lumoj kaj ombroj. La kialo, kiel diris la fama ĉina veterana pentristo Pan Tianshou, estas "per linioj oni povas plej facile kapti figuron de ĉiu aĵo objekto kaj plej klare kaj koncize prezenti ĝian konturon, sed uzo de punktoj faras la bildon disiĝa kaj kolora faco faras ĝin malklara kaj senviva." Kaj krome, la pentrarto kaj kaligra-

fio de Ĉinio devenas de la sama fonto. La han-naciecaj skribsignoj de Ĉinio estas ideografiaĵoj. La hanaj ideografiaĵoj grandparte konsistas el linioj. Tial la han-lingva skribado kaj la ĉinstila pentrado postulas belecon de linioj.

Por fari ĉinstilan pentradon oni ĝenerale uzas penikojn, tuĉon kaj farbojn, altkvalitan paperon aŭ suplan silkajon, kiu povas rapide sorbi farbon.

Tiuj specialaj materialoj postulas, ke la pentristo atenteme observu objektojn kaj plene konsideru pri sia temo antaŭ sia pentrado, ĉar oni ne povas korekti eraron faritan sur ĉina pentraĵo. Se li komencas pentri, li nepre devas sukcesi en tio. Por atingi tian lertecon, la pentristoj devas dediĉi sian tutan vivon kaj konsumi multe da papero kaj penikoj.

Plurfokusa perspektivo estas ĝia alia grava trajto. La ĉinstila pentraĵo ne estas limigita de tempo kaj spaco: Jangzi-rivero longa pli ol 5 000 km. povas prezentiĝi en unu bildo. Oni povas plene bildigi laŭbezzone la pejzaĝojn antaŭmontan kaj postmontan, aŭ internon kaj eksteron de domo en sama pentraĵo. Super-rigardaj pentraĵoj estas ofte vidataj en la ĉinstilaj pentraĵoj. Se la fokuso iras de supre malsupren, do formiĝos vertikala pen-



En Printempa Lageto  
de PAN TIANSHOU

trajo. Se ĝi moviĝas de dekstre maldekstren, do aperos horizontala pentraĵo. Se ĝi moviĝas de supre malsupren kaj de dekstre maldekstren, do prezentiĝos panoramo. Ni prenu kiel ekzemplon la bildon "Vespera Bankedo de Han Xizai" kreitan de Gu Hongzhong en la periodo de la Kvin Dinastioj (907 — 960). La pentraĵo prezentas malsamajn scenojn kaj la heroo Han Xizai aperis kvin fojojn en tiu ĉi pentraĵo.



Kial la ĉinaj pentristoj ne observas rigore la principon de perspektivo? Pan Jiezi diris, ke perspektivo multe katenas la artan prezentpovon de pentristo, precipe en pejzaĝa pentraĵo, per ĝi oni ne povas prezenti en sama pentraĵo diversajn objektojn en malsamaj distancoj. Fokus-movo ofte vidiĝas ankaŭ en la reala vivo. Dum montgrimpa ekskurso oni ofte iras kaj rigardas, kaj poste surpaperigas la vidaĵojn.

Utiligo de blanka spaco estas ĝia tria karakterizaĵo. Ekzemple, kiam oni pentras flolvazon, florojn aŭ portreton, ili ofte ne pentras la fonon. Tio, kiel Pan Jiezi opinias, donas al aprezantoj eblecon imagi al si. Tia arta traktado konformas al kutimo de personoj en ilia rigardo de objektoj. Pentristo Pan Tianshou diris: "Oni devas klare vidi objekton, sur kiu li turnas sian atenton, kaj oni povas ne rigardi la objektojn ekster sia atento."

Tia traktado povas elstarigi la ĉefan objekton. La fama pen-

tristo s-ro Huang Binhong en siaj lastaj jaroj ofte pentris montojn tute nigraj kaj en la nigro li pentris domojn kaj homojn irantajn en densaj arbaroj, ĉirkaŭatajn de blanka spaco. Tiel la homfiguroj klare konturiĝis.

Sur la blanka spaco de pentraĵo ofte troviĝas poemo lerte kaligrafita de la pentristo por esprimi la temon aŭ lian koncernan ideon. Kaj sub la kaligrafiaĵoj estas metita stampo de la pentristo. Ankaŭ la stampo estas konsistiga parto de la pentraĵo, kies loko estas difinita laŭ la aranĝo de la pentraĵo.

Elektado de temoj estas tre grava por la tradicia ĉinstila pentrarto. Ĉiu objekto sur pentraĵo havas sian signifon. Ekzemple, umeo, orkideo, krizantemo kaj bambuo estas rigardataj kiel kvar nobluloj; pino kaj gruo simbolas longvivecon; peonio riĉecon; granato multecon de idoj; umeo kun pigo ĝojon. En pejzaĝa pentraĵo ĉefmontpinto, pino kaj cipreso

estas simbolo de nobluloj, dum monteto kaj herbaĉoj simbolas malnoblulojn. Bovo estas simbolo de laboremo kaj firma karaktero. Pan Jiezi opinias: "Temo estas animo de pentraĵo. Sen temo ne ekzistas pentrarto." Tiu aserto montris, ke la temoelektado okupas tre gravan lokon en la tradicia ĉinstila pentrarto.

Iuj opinias, ke la ĉina tuĉa pentrarto neglektas kolorojn. Sed fakte ne. Ĝiaj koloroj montriĝas en malsamaj nuancoj de surpapera tuĉo. La nuancoj povas esti dividitaj en kvin gradojn: sekan, nigran, helan, malhelan kaj malsekan. La delikatlinaĵoj kun densaj koloroj aplikas multajn densajn farbojn. En uzo de koloroj la ĉinstila pentrarto havas principon, ke ili devas esti konformaj al la realaj objektoj. La kontrasto de malsamaj koloroj devas esti harmonia kun la tuĉaj linioj. Kvantkam oni ne strebas al kompleksa variado de lumoj kaj ombroj, la pentraĵo tamen povas atingi su-

*Vespera Bankedo de Han Xizai*

de **GU HONGZHONG**



fiĉe riĉan, versimilan kaj infek-  
tan efekton.

Ĝenerale la ĉinaj pentristoj esprimas sian senton pere de naturaj pejzaĝoj kaj objektoj. Kiam pentristo estas bonhumora, li pentras freŝkolorajn florojn, viglajn bestetojn, serenajn ĉielon ktp. Kiam li sentas sin malbonhumora, li do pentras velkantajn florojn, kadukajn arbojn, ruinitan muron, senvivan vintran pejzaĝon ktp. Unuvorte, la pejzaĝoj kaj objektoj sub la peniko de pentristoj estas esprimo de ilia sento.

De la nuna jarcento, precipe de la lastaj jaroj, la tradicia ĉinstila pentrarto havas plian progreson en temo kaj tekniko. Nombro da kreivaj pentristoj ĉerpis iujn esprimmanierojn de la okcidenta pentrarto, knedis ilin en la ĉinajn tradiciajn manierojn kaj iniciateme bildigas la spiritan fizionomion de popoloj kaj vastan socian vivon. Iliaj pentraĵoj riĉigis la esprimopovon de la tradicia ĉinstila pentrarto.



*Zhihui'rai sur Huangshan-monto*  
de **HUANG BINHONG**







# Tutkore servi al la patrujo

de ZHENG SHOUYI

*La aŭtoro naskiĝis en familio de malriĉa patriota ĉino en Manilo, la ĉefurbo de la Filipinoj, en 1931. Ŝi revenis la patrujon, fininte sian universitan studon en 1956 kaj eklaboris super la foraminiferoj en la Mar-biologia Instituto de Qingdao. En 1980 ŝi estis elektita kiel vicurbestro.*

— La Red.

Estis neforgesebla tago por mi la 1-a de julio antaŭ 26 jaroj. Tiutage mi trajne veturis de Shenzhen al Kantono. Elvagoniĝinte, mi estis tuj altirita de la giganta olepentraĵo “Dediĉu la Tutan Junecon al la Patrujo!” Rigardante la energiplenajn gejunulojn sur la pentraĵo, mi emociiĝis ĝis larmoj. “Ho, mia pa-

trujo, revenis via filino ĝuste por dediĉi al vi sian tutan Junecon!” mi diris en la koro.

Mia familio devenis de la gubernio Zhongshan, Guangdong-provinco. Mia patro vivis en la urbo Manilo jam de sia juneco. Nia 8-membra familio vivis depende de mia patro, kiu laboras

kiel komizo, kaj du pliaĝaj fratoj laborantaj kiel knabo-laboristoj. Dank’ al ŝparemo de miaj gepatroj, mi kaj mia malpli aĝa frato povis studi en lernejo.

Fininte la studon en la komerca kolegio, mi daŭrigis mian studon en laborado. Poste mi eniris senekzamene en la Biologian Fakultaton de la Universitato de la Filipinoj kaj tie studis kiel studento-esploristo. Por pli frue partopreni la konstruadon de la patrolando, mi forlasis la ŝancon baldaŭ magistriĝi. Mi venkis multajn malfacilojn kaj, sen scio de la gepatroj, parencoj kaj amikoj, revenis al la patrujo.

En la patrujo mi estis ĉie bonvenigata. Mi estis sendita al la Mar-biologia Instituto de Qingdao, kaj tiam mi sentis fieron esti mastro de la propra lando, kiun mi neniam spertis eksterlande.

Tiam mi, 25-jarulino, ĉiutage eliris frumatene al la laboratorio

La aŭtoro




kaj revenis malfrue al mia loĝdomo. Laŭ la kondiĉoj de la instituto la laboratorio devas esti ŝlosita en ĉiuj ferioj, sed la gvidantoj donis al mi privilegion labori tie en tiuj tagoj. Miaj najbaroj plendis: “Zheng jam longe ne sin montris.” Miaj kolegoj ŝerce diris: “Zheng enamiĝis en foraminiferojn.”

Jes, mi vere estis okupita de foraminiferoj, kiuj prezentis antaŭ mi miraklan mondon. Tiu unuĉela mara animalo kun malmola ŝelo jam nombras pli ol tridek mil speciojn. Malgrandaj kiel kudril-pinto, ili prezentas sin en diversaj formoj sub sekc-mikroskopo: de konko, perlo, rozario, kapsiko, florvazo k. a. Ili estas aparte sentemaj pri la medio, ekz. la maraj profundo, saleco kaj temperaturo. Iliaj mortintaj ŝeloj longe konserviĝas en la tertavolo. Ĝuste pro tio ili estas ne nur bonaj materialoj por studi la maran ekologion, sed ankaŭ bonaj animalaj indikaĵoj por studi la tertavolon, distingi rokfacion, restarigi la antikvan medion en la olea prospektorado. Sciencistoj konstatis, ke Qomolangma, la plej alta montpinto en la mondo, estis maro, ĝuste pro tio ke oni trovis tie fosiliojn de foraminiferoj.

Por ekspluati kaj utiligi la maron, la ĉina registaro en 1957 ellaboris la Unuan Projekton pri Disvolvo de Sciencoj, kiu inkluzivas ĝeneralan esploron pri la marbordo de Ĉinio, dislokiĝo de foraminiferoj kaj ekologio en ĉiuj maroj de Ĉinio. La Mara Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj asignis la laboron, kiun oni neniam faris en Ĉinio antaŭe, al profesoro Zheng Zhi-zhong. Tiam mi laboris kiel lia asistanto.

Sub direktado de profesoro Zheng, mi desegnis pli ol trimil



*Malgranda mara vivaĵo interesas ĉinan filinon.*

bildojn pri diversspecaj foraminiferoj, kiuj estis faritaj en pli ol 200 bildplatojn, kaj akumulis pli ol 30 000 kartojn de sciencaj literaturoj. Antaŭ 1980 mi verkis raportojn pri klasifiko de foraminiferoj kun proksimume 400 000 ĉinaj ideografiaĵoj, kiuj prezentis materialojn por esplori la marfundajn foraminiferojn en la Flava Maro, Bohai-maro kaj Orienta Ĉina Maro. En la lastaj du jaroj, helpate de mia asistanto Fu Zhaoxian, kiu estas ankaŭ mia edzo, mi ordigis materialojn kaj verkis du artikolojn pri klasifiko de foraminiferoj kun 300 000 ĉinaj ideografiaĵoj.

Elektite kiel vicurbestro de Qingdao, mi ankoraŭ okupiĝas pri mia faka esploro. Kiel sciencisto, mi alkitimiĝis labori en la laboratorio, sed ne pri administrado. Nur sabate mi laboras en la oficejo de la urba registaro por trakti problemojn pri la ĉinaj elmigrintoj, respondi leterojn senditajn de la popolanoj aŭ akcepti vizitantajn civitanojn.

Koncerne mian privatan vivon, ĝi portas pli malpli dramatan karakteron. Antaŭe mi ne intencis edziniĝi, ĉar foraminiferoj

estis miaj plej bonaj kunuloj. Sed mia asistanto Fu Zhaoxian nerimarkite enŝovis sin en mian vivon.

Li komencis labori en mia laboratorio kiel asistanto antaŭ 20 jaroj. Li bele skribas per fontoplumo kaj lerte ludas kelkajn muzikilojn. Li helpis min en ordigo kaj kopiado de materialoj kaj artikoloj kun centmiloj da ĉinaj ideografiaĵoj, pro kio li fariĝis mia nemalhavebla asistanto. Vespere mi instruis miajn kolegojn studi la anglan lingvon, kaj kiam ni laciĝis, Fu do instruis nin ludi muzikajn instrumentojn. Nia malgranda orkestro iam eĉ ludis en amuzkunveno de nia instituto.

Mi tiam havis neniun parencon en Ĉinio. La patrino de Fu, kiu vivas kun sia filo en Qingdao, tre zorgis pri mia privata vivo. Ŝi de tempo al tempo invitis min gastigi ĉe ŝi. Ŝi diris al sia filo: “Zheng estas bona knabino. Ŝi vivas sola en Ĉinio. Se ŝi ne edziniĝos dum la tuta vivo, kiu do prizorgos ŝin, kiam ŝi maljuniĝos?” La maljunulino kuraĝigis sian filon peti mian manon, ne sciante ke la koro de



ŝia filo jam de longe inkliniĝis al mi. Li diris al sia patrino: "Ŝi eĉ rifuzis la edziniĝpeton de kelkaj viroj, diplomitoj de altaj lernejoj en la 50-aj jaroj, ĉu ŝi povus ami min, kiu diplomitiĝis nur en mezlernejo kaj havas grandan distancon kompare kun ŝi en klereco, salajro kaj aĝo." Sed li ne volonte akceptis sian malsukceson. Li bone sciis, ke en la scienca esploro mi ne povas malhavi lin, dum li volontas helpi min por ĉiam. Tial li foje kaj refoje esprimis sian amon al mi, sed tiam mi dediĉis mian tutan energion al la esploro pri foraminiferoj kaj ne havis tempon pripensi tion. Nur en la dekjara kaoso, kiam mia laboratorio estis senkaŭze fermita kaj mi estis devigite disiĝi de miaj foraminiferoj kaj mi restis senfara, la semo de amo ekĝermis en mia koro.

Ni geedziĝis en 1967. Mi ekhavis solfilinon Xiaohong, kiam mi estis 40-jara. Ŝi nun lernas bone en la kvina klaso de elementa lernejo.

Nia familia vivo estas simpla sed ĝoja. Hejme mia edzo zorgas

pri aĉeto de greno kaj legomoj, kaj aliaj pezaj laboroj, dum mi preparas manĝaĵojn kaj prizorgas la filinon. Por ŝpari tempon ni ĝenerale havas nur unu pladon kaj unu supon por ĉiu manĝo. Se ni havas liberan tempon, ni aĉetas enladigitajn viandon kaj fiŝon, terpomon, cepon kaj aliajn almanĝaĵojn por rezervo. Ĉiunonate ni enspezas ĉ. ducent juanojn, post diversaj elspezoj ni ankoraŭ havas malgrandan sumon por deponiĝi.

Ĉiutage post vespermanĝo, mi iom ripozas, demandas nian filinon pri ŝia lernado en la lernejo kaj poste kune kun mia edzo daŭrigas nian laboron aŭ legas ĵurnalon en la ekstera ĉambro, dum nia filino faras siajn hejmajn ekzercojn en la interna dormoĉambro. Somere vespere ni iam promenas ĉe la marbordo aŭ ludas muzikilon hejme, el kio ni ĝuas la familian feliĉon.

Oktobre de 1977 mi kune kun mia filineto veturis al Manilo, kiun mi forlasis antaŭ 21 jaroj, por vidi miajn parencojn. Ni ĉiuj sentis kaj ĝojon kaj malĝojon, kiam mi intervidiĝis kun

mia patrino, kiu baldaŭ atingos 80 jarojn, du pli-ol-50-jaraj fratoj kaj aliaj familianoj. Mia patro jam forpasis antaŭ longe. Per tremantaj manoj mia patrino elprenis la testamenton de mia patro el kesto. Miaj okuloj nebuliĝis de larmoj, kiam mi legis la vortojn en la testamento: "Mi tre ĝojas, ke Shouyi havas ŝancon servi al la patrolando. . . Estas necese inokuli patriotismon al niaj infanoj. . ."

Observante la testamenton de mia patro, mi laboris pli energie, reveninte de Manilo. En la fino de 1979 mi veturis al Usono kiel membro de delegacio de maraj sciencistoj por tie fari esploron. Maje de 1981 mi veturis al Francio por partopreni la Internacian Konferencon pri la Maraj Planktonaj Protozooj. Mi profunde konscias, ke por plirapidigi la studon pri la maraj planktonaj protozooj de nia lando ni urĝe bezonas plibonigi niajn scienc-esplorajn kondiĉojn, ekz. renovigi ekipaĵojn, pligrandigi laboratorion k. a. Mi klopodos por kiel eble plej rapide solvi tiujn problemojn.

*Feris la tuta familio.*




# VOJAĜO DE ESPERANTISTOJ EL KVIN LANDOJ EN ĈINIO

Fotoj de Qu Kang

La turisma grupo kun 21 esperantistoj el Britio, Francio, Nederlando, Aŭstralio kaj Danlando, kiun iniciatis kaj organizis s-ino Nancie, membro de la Londona Esperanto-Klubo kaj de la Societo de Brita-Ĉina Interkompreniĝo, faris 18-tagan vojaĝon en Ĉinio. Ili vizitis Pekinon, Chengdu, Xi'an, Nankinon, Yangzhou, Suzhou kaj Ŝanhajon, kie ili, krom rigardi pitoreskejojn, historiajn lokojn, fabrikojn kaj vilaĝojn, ankaŭ havis ĝojan renkontiĝon kun ĉinaj esperantistoj.


S-ino Nancie (dekstre)



Zhang Qicheng, ĝenerala sekretario de ĈEL, parolas en la kunsido por bonvenigi la gastojn.








En unu el la Dek Tri Maŭzoleoj de Ming-dinastio

Brita esperantistino kun Pekina esperantisto





**Latuna cervo tre plaĉas al franca kaj nederlandaj esperantistoj.**

**En la Maŭzoleo de Sun Yatsen en Nankino**




**La gastoj en la Imperiestra Palaco en Pekino**






Sur la Granda Muro



Aŭstralia kaj brita esperantistinoj interparolas kun Pekina esperantisto.



S-ro P. Thorsen kaj francaj esperantistoj antaŭ ŝtona statuo




Danlanda esperantisto (maldekstre) kaj nederlanda esperantistino (dekstre) kun ĉina samideanino en Xi'an




**KOLORA INFANLIBRO  
PREMIITA**

**EN LA INFANLIBRA KONKURSO DE 1982**

# ***Pesi Elefanton***



En la antikveco ne ekzistis granda pesilo. Kiamaniere oni povis mezuri la pezon de elefanto? Iun bonan rimedon, kiun elpensis sepjara infano, vi trovos en la kolora infanlibro "Pesi Elefanton". La libro enhavas sep mallongajn rakontojn pri saĝaj kaj diligentaj infanoj, kiuj poste fariĝis eminentuloj. Ĉiuj rakontoj estas pentritaj en la ĉina stilo.



**ELDONITA DE "EL POPOLA ĈINIO"**

**Numero: 88-Es-181P Formato: 180×205mm. 91 pĝ. Prezo: £1.60 US\$3.30**


**Mendu ĉe: Libroservo de UEA  
Peranto de EPC**

**aŭ Esperanta Sekcio de la Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj  
(GUOJI SHUDIAN), P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio**



# Virina Lando

Elektita ĉapitro el la ĉina klasika romano  
"Pilgrimado al la Okcidento"



Verkita de WU CHENG'EN.  
Ilustritaj de WU HUALUN.

"Pilgrimado al la Okcidento" estas fama ĉina klasika romano, kies aŭtoro Wu Cheng'en (1500-1582 p.K.) estis granda verkisto. El liaj multaj verkoj nun restas, krom la supre dirita, nur "Verkoj Lasitaj de Sinjoro Sheyang". Ĉi-jare oni celebris la 400-jaran datrevenon de lia morto.

"Pilgrimado al la Okcidento" rakontas, ke fama bonzo Xuanzang (alnomita Tang Sanzang) de Tang-dinastio (618-907 p.K.) kun siaj tri disĉiploj trapasis multajn danĝerojn, kaj fine alvenis al la Okcidento por peti sanktajn sutrojn de budhismo. La aŭtoro muldis serion da personigitaj figuroj de feoj kaj demonoj, el kiuj la plej elstara estas la unua disĉiplo Sun Wukong. La saĝa, kuraĝa, sagaca kaj multkapabla Wukong venkis ĉiajn demonojn kaj malfacilojn, faris multajn meritajn agojn dum la longa vojaĝo kaj fine atingis la celokon kune kun la majstro kaj siaj fratuloj. Ili sukcese akiris la verajn sutrojn. En "Pilgrimado al la Okcidento" la aŭtoro kreis multajn interesajn historiojn kun mirigaj kaj fantaziaj intrigoj. La romano estas tre populara kaj ŝatata de nia popolo. Ĝi estas tradukita en plurajn lingvojn kaj cirkulas en Eŭropo kaj Japanio. Ĝi enhavas 100 ĉapitrojn kaj ĉi tie ni prezentas al vi ĝian 54-an ĉapitron kun la titolo reviziita kaj la enhavo iom mallongigita.

La Red.

Adiaŭinte la vilaĝanojn, Sanzang kaj liaj tri disĉiploj daŭrigis sian vojaĝon okcidenten laŭ la difinita vojo. Post malpli ol kvardek lioj ili jam atingis la Virinan Landon Xiliang. "Wukong," diris la majstro sur la ĉevalo, "jen estas urbo antaŭe kaj mi jam aŭdas bruon de la homamasoj. Tie estas kredeble la Virina Lando. Vi ĉiuj agu disipline kaj nepre ne senbride."

La tri disĉiploj aŭskultis lian admonon kun respekto.

Parolante, ili venis al la orienta strato antaŭ la urbo. Ĉu junaj ĉu maljunaj, ĉu vendantaj ĉu aĉetantaj, ĉie estas nur virinoj en jupoj aŭ bluzoj kaj kun pudritaj vizaĝoj kaj oleumitaj hararoj. Renkontante la kvaropon, la loĝantinoj tuj eksplodis per aplaŭdoj kaj ĝojkriis: "Naskigantoj! Naskigantoj!" Baldaŭ la

strato estis plena de rigardantinoj kun sonora rido kaj pepa bablado. La majstro kaj la tri disĉiploj iris antaŭen kaj vidis ankaŭ, ke ambaŭflanke de la strato viciĝas altaj domoj kaj luksaj vendejoj, same kiel en aliaj landoj. Ili daŭrigis sian iron kaj renkontis regnan oficistinon starantan ĉe stratrando, kiu vokis al ili: "Gastoj el malproksimo! Ne iru antaŭen plu! Bonvolu ripozu en

nia regna gastejo kaj registri vian alvenon, por ke mi raportu al Ŝia Reĝina Moŝto kaj kontrolu vian pasporton!” La majstro deĉevaliĝis kaj ŝin salutis, vidinte, ke post ŝi estas konstruaĵo kaj super la pordo pendas tabulo kun tri vortoj “Regna Vira Gastejo”.

Ŝi kondukis ilin en la gastejon kaj regalis ilin per teo. “Via Moŝto, de kie kaj pro kio vi venas?” Ŝi demandis al ili respektoplene. “Ni venas el la Granda Tang-imperio en la Oriento,” respondis Wukong, “kaj laŭ la komisiono de Lia Imperiestra Moŝto, ni pilgrimas okcidenten por peti budhismajn sutrojn. Tiu ĉi estas nia majstro Tang Sanzang, frato de Lia Imperiestra Moŝto. Mi estas lia unua disĉiplo Sun Wukong kaj oni donis al mi ankaŭ la kromnomon Simio. Ĉi tiuj estas miaj fratuloj Porko Wuneng kaj Wujing. Oni simple nomas ilin Porko kaj bonzo Sha. Ni estas entute kvinope, inkluzive de nia ĉevalo. Ni kunportas pasporton kaj petas, ke vi ĝin ekzameni kaj permesu al ni daŭrigi nian vojaĝon.” La oficistino ilin registris kaj diris al ili riverence surgenu: “Mi petas vian pardonon, Via Moŝto. Mi estas intendantino de ĉi tiu gastejo. Mi ja ne sciis, ke vi venis el la Granda Tang, alie mi certe elirus renkonti vin survoje.” Post tio ŝi leviĝis kaj ordonis siajn subulinojn pretigi manĝon por la gastoj kaj diris: “Bonvolu iom ripozi, Via Moŝto. Permesu al ni iri en la urbon por raportu al Ŝia Reĝina Moŝto por kontroli vian pasporton kaj eskorti vin en vian venonta vojaĝo.” Kun ĝojo Sanzang atendis ŝin en la gastejo.

La intendantino ordigis siajn vestojn kaj iris rekte en la urbon por havi aŭdiencon ĉe la reĝino. Ĉi tiu ekĝojis pro ŝia raporto kaj

diris al siaj korteganinoj: “Mi songis lastanokte, ke belaj kolo-roj lumas sur ora ekranego kaj jada spegulo brilas per okulfrapaj lumoj. Tio estis bona aŭguro de la hodiaŭa okazaĵo.” La korteganinoj surgenuis sur la palaca ŝtuparo demandante: “Kion signifas viaj vortoj, Via Reĝina Moŝto?” “Ekde la praepoko,” klarigis la reĝino, “neniu viro venis al nia lando. Nun tiu ĉi ĵus alveninta el la Oriento estas pli juna frato de Tang-imperiestro. Versajne li estas sendita de dioj por mi. Kun mia riĉa lando mi volas preni lin kiel la reĝon kaj mian edzon, tiel mi povos havi filojn kaj nepojn por daŭrigi mian regadon generacion post generacio. Jen vere bona aŭguro, ĉu ne?” La korteganinoj ĝoje gratulis surgenu la reĝinon.

“Pravas la ideo de Via Reĝina Moŝto,” diris la intendantino, “sed la tri disĉiploj aspektas malbele.” “Kian aspekton havas la imperiestra frato,” demandis la reĝino, “kaj kiel malbelaj estas la tri disĉiploj?” “La imperiestra frato havas admirindan aspekton kaj dignan mienon,” respondis la intendantino, “li estas vera viro de la majesta Tang-imperio. Sed la tri disĉiploj estas tre timigaj kun monstraj vizaĝoj.” “En tia okazo,” diris la reĝino, “kontrolu la pasporton, irigu la tri disĉiplojn okcidenten kaj restigu tie ĉi nur la imperiestran fraton, ĉu bone?” “Pravegas la ideo de Via Reĝina Moŝto,” denove riverencis surgenu la korteganinoj, “kaj ni certe ĝin efektivigos. Sed nur mankas svatistino por la geedziĝo.” “Mi konsentas kun vi,” diris la reĝino, “kaj ordonas, ke la dukino estu svatistino kaj la intendantino estu mastrino de la geedziĝa ceremonio. Vi ambaŭ iru al la gastejo por svati la imperiestran fraton. Post kiam li

estos akceptinta la edziĝan proponon, mi solene renkontos lin ekster la urbo.” La dukino kaj la intendantino laŭordone foriris el la palaco.

Kiam Sanzang kaj liaj disĉiploj ĝuis vegetaran manĝon en la gastejo, alvenis la dukino kaj la intendantino, kiuj riverencis surgenu al li kaj diris: “Ni havas la honoron gratuli vin, Via Moŝto!” “Pro kio vi esprimas gratulon al bonzo kiel mi?” demandis la majstro. “Ĉi tie estas la Virina Lando Xiliang,” respondis la dukino denove riverence, “kaj neniu viro iam antaŭe estis ĉe ni. La alveno de Via Moŝto estas por ni granda honoro. Nun ni venis laŭ la ordono de Ŝia Reĝina Moŝto por proponi edziĝon.” “Bonege, bonege!” diris Sanzang. “Mi venis al via lando kun nur tiuj tri impertinentaj disĉiploj. Al kiu el ili Ŝia Reĝina Moŝto volas edziniĝi?” “Mi ĵus iris en la palacon por raportu vian alvenon al Ŝia Reĝina Moŝto,” respondis la intendantino, “kaj kiam ŝi eksciis, ke Via Moŝto estas imperiestra frato veninta el la granda lando Tang, ŝi estis tre ĝoja kaj volis kun la tutlanda riĉaĵo restigi Vian Moŝton ĉi tie kiel sian edzon kaj nian reĝon.” Aŭdintion Sanzang mallevis la kapon senvorte. “Vera viro devas kapti kaj ne perdi la ŝancon,” diris la dukino. “Ne estas mininde por virino restigi viron kiel la edzon en la gepatra hejmo. Sed, vere rara estas tio, ke ŝi komisiis sian landon al la edzo. Mi petas Vian Moŝton tuj akcepti nian proponon, por ke ni povu raportu tion al Ŝia Reĝina Moŝto.”

“Wukong,” diris Sanzang, “tion vi decidu.” “Laŭ mi,” respondis Simio, “estus pli bone, se vi restus ĉi tie.” “Wukong,” diris Sanzang, “se ni ĝuos riĉan



kaj nobelan vivon en ĉi tiu virina lando, kiu do iros al la Okcidento por la sanktaj sutroj? Ĉu tio ne vanigos la atendon de la imperiestro de nia Granda Tang-imperio?” “Via Moŝto,” elpaŝis la dukino, “mi ne kuraĝas kaŝi la veron. Nia reĝino volas restigi nur Vian Moŝton kiel edzon kaj sendi viajn tri disĉiplojn al la Okcidento.” “Ĝusta estas la ideo de Via Reĝina Moŝto,” diris Simio, “kaj ankaŭ ni tri disĉiploj volas restigi nian majstron kiel edzon de Ŝia Reĝina Moŝto. Kontrolu la pasporton kaj lasu nin iri okcidenten kiel eble plej baldaŭ. Kiam ni revenos kun la sanktaj sutroj, ni vizitos nian majstron kaj Ŝian Reĝinan Moŝton kaj petos de ili porvojaĝan monon por reveni al nia Tang-imperio.” La dukino kaj la intendantino ambaŭ riverencis al Simio: “Multajn dankojn pro via helpemo!” “Via Dukina Moŝto!” subite enmiksiĝis Porko. “Mi esperas, ke vi dankos nin ne nur per vortoj. Ni jam akceptas vian proponon kaj vi devas iri al via reĝino, por ke ŝi aranĝu festenon por fianĉiniĝo, tiel ni povos havi

iom por drinki. Ĉu bone?” “Bone, bone, bone!” respondis la dukino. “Tuj venos la festeno!” Ŝi kaj la intendantino foriris ĝojplene por raporti al la reĝino.

La majstro kaptis Wukong je la vesto kaj superŝutis lin per plendoj: “Simiaĉo, vi simple min perfidis! Kiel vi faris tian promeson! Mi preferus morti ol edziĝi ĉi tie kaj lasi vin solaj pilgrimi okcidenten!” “Estu trankvila, mia majstro,” diris Simio. “Ĉu mi ne scias vian kordon? Sed, ĉar ni jam alvenis al ĉi tiu lando kaj renkontis homojn tiajn, ni povas fari nenion alian, ol ludi nian artifikon kun ili laŭ ilia artificio.” “Kion signifas viaj vortoj?” demandis la majstro. “Se vi rifuzus ŝian proponon,” respondis Simio, “ŝi ne sigelus por ni la pasporton kaj ne lasus nin foriri, eĉ malice ordonus siajn subulojn detranĉi de via korpo la karnon por fari parfumajon. Ĉu ni ĉiuj ne ricevus malbonan traktadon? Kaj se tiel estus, ni neeviteble devus uzi nian magian forton por batali kontraŭ ili. Vi ja scias, kiel pezaj estas niaj batoj kaj kiel akraj

estas niaj armiloj. Nur per movetoj de niaj brakoj ni jam povus ekstermi ilin ĉiujn tra la tuta lando. Sed ili estas homoj, ne demonoj. Kaj vi ĉiam estas humana kaj ne volis mortigi eĉ estajeton dum nia vojaĝo. Ĉu vi povus toleri, ke sennombraj virinoj estus mortigitaj? Ĉu oni povus preni tian buĉadon kiel bonfaron? Absolute ne!” “Vi pravas,” diris la majstro, “sed mi timas, ke la reĝino trudos al mi la edziĝon. Kiel mi povos difekti la virton de budhano?” “Se vi konsentos la edziĝon,” diris Simio, “ŝi certe bonvenigos vin per reĝa ceremonio. Tion vi ne rifuzu. Veturu en la drak-feniksa kaleŝo, tronu en la palaco, ordonu min kaj miajn fratulojn eniri. Sigelu la pasporton, petu la reĝinon subskribi sur ĝi kaj redonu ĝin al ni. Sekve de tio vi aranĝu festenon por soleni vian edziĝon kaj ankaŭ por nin adiaŭi. Post la festeno vi pretigu vian kaleŝon kun reĝa ceremonio dirante, ke post kiam vi adiaŭos nin ekster la urbo, vi revenos por kunvivi kun la reĝino. Tio certe sukcese trompos la reĝinon kaj ŝiajn korteganinojn, tiel ke ili en ĝojo ne baros al ni la vojon nek havos malican intencon kontraŭ ni. Kiam ni estos elirintaj el la urbo, vi forlasu vian kaleŝon kaj ordonu al Wujing, ke li ĉiam restu ĉe vi kaj helpu vin surrajdi nian blankan ĉevalon. Tiam mi uzos senmovigan magion, por ke la reĝino kaj ŝiaj subulinoj ĉiuj fariĝu senmovaj kiel ŝtono. Tiam ni iru nian vojon daŭre okcidenten. Post unu tuta tago mi eldiros aliajn sorĉvortojn por savi ilin en la ŝtoniĝo. Per tiu artificio konserviĝos kaj via virto kaj iliaj vivoj. — Jen artificio de ‘eskapo el reto per trompa edziĝo’, kiu trafos du celojn per unu sagpafo, ĉu



ne?” La majstro ekkomprenis la tutan planon kaj diris al Simio: “Koran dankon pro via bona ideo!”

La dukino kaj la intendantino iris rekte en la palacon sen la reĝina ordono. “Realigiĝos la sonĝo de Via Reĝina Moŝto!” diris ili al la reĝino. “Via Reĝina Moŝto baldaŭ ĝuos edziniĝan plezuron!” Aŭdinte tion la reĝino levis la perlan kurtenon, malsupreniris de sia reĝa seĝo kaj demandis kun ĉarma rideto: “Pri kio vi interparolis, kiam vi renkontis la imperiestran fraton?” “Kiam ni atingis la gastejon kaj finis la vizitan riton al la imperiestra frato,” respondis la dukino, “ni tuj proponis al li la edziĝon. Li provis ĝin rifuzi. Feliĉe la aferon sukcesigis lia unua disĉiplo.” “Kaj poste kion diris la imperiestra frato?” ridete demandis la reĝino. “Nenion,” respondis la dukino, “sed li jam ne plu rifuzis la edziĝon. Kaj lia dua disĉiplo volas antaŭ ĉio havi fianĉinigan bankedon.”

Aŭdinte tion, la reĝino tuj ordonis aranĝi festenon kaj pretigi ŝian kaleŝon kun pompa ceremonio por iri renkonti la edziĝonton.

La kaleŝo veturis el la urbo kaj baldaŭ atingis la gastejon. Informiĝinte pri alveno de la reĝino, Sanzang kaj la tri disĉiploj ordigis siajn vestojn kaj eliris renkonte al ŝi. Ŝi levis la kurtenon kaj elkaleŝiĝis. “Kiu el tiuj honoraj gastoj estas Tang-imperiestra frato?” ŝi demandis. “Lia Moŝto staras antaŭ la gasteja pordo kaj portas stolon.” respondis la dukino. La reĝino ĵetis esploran rigardon sur lin. Ho, vere belaspekta viro! Ŝi kore ekamis lin, ne povante kaŝi sian pasion. Movetante siajn ĉerizajn lipojn, ŝi diris: “Juna fra-



to de Tang-imperiestro, ĉu vi ne volas preni min kiel vian edzinon?” Tiuj vortoj ruĝigis Sanzang, tiel ke li ne kuraĝis levisian kapon pro embaraso.

Porko, staranta apud la majstro, rigardis la reĝinon per voluptaj okuloj. Kia rava virino! Lia koro preskaŭ saltis ekster la bruston kaj salivo pendiĝis sub la muzela buŝo. Li moliĝis ĝis la ostaro, kvazaŭ glacia leono alfrontus al fajro.

La reĝino alproksimiĝis al Sanzang kaj karese kaptetis lin per sia mano. “Kara imperiestra frato,” ŝi koketis, “venu en la kaleŝon, veturu al mia palaco kaj edziĝu al mi!” Timigite, la majstro sentis sin eĉ ŝanceliĝa. “Ne estu hontema kaj tro modesta, mia majstro,” lin kuraĝigis Simio staranta apud li, “eniru en la reĝan kaleŝon. Kontrolu la pasporton kiel eble plej rapide

kaj lasu nin iri petakiri sanktajn sutrojn!” La majstro trovis nenian rimedon kaj ne povis sin deteni de larmoj karesante Simion. “Ne ĝenu vin,” daŭrigis Simio. “Jen ŝanco por gajni honoron kaj riĉecon. Kion alian vi faru ol ĝin kapti?” Sanzang povis nur agi laŭ la vortoj de Simio. Kun deviga ĝojmieno li forviŝis la larmojn, prenis la delikatan manon de la reĝino kaj eniris en la kaleŝon kune kun ŝi.

Vidante tion, la sekvantaro de la reĝino ege ĝojis. Ili veturis revene al la urbo. Post ili iris Simio kondukanta la blankan ĉevalon kaj Wujing vektoportanta la pakajojn laŭ la ordono de Simio. Porko kuris antaŭe kaj kiam li atingis la Turon de Kvin Feniksoj, li ekkriis: “Tio estas vere bonajo! Sed tio povas esti plenumita nur post kiam oni regalos min per geedziĝa vino!”



Tion aŭdinte, la oficistinoj raportis al la reĝino unu post alia: “Via Reĝina Moŝto! Tiu kun muzela buŝo kaj elefantaj oreloj kriacas por geedziĝa drinko!” La reĝino demandis al la majstro dolĉvoĉe: “Kara imperiestra frato, ĉu tiu estas unu el viaj disĉiploj?” “Jes,” respondis Sanzang, “li estas la dua. Li havas grandan stomakon kaj ĉiam penas por frandaĵo. Ni devas regali lin per bonaj manĝaĵoj kaj vino, antaŭ ol ni faros nian aferon.” La reĝino tuj demandis, ĉu la festeno estas preta. “Ĝi jam pretiĝas en la orienta halo,” respondis iu oficistino, “krome oni surtabligis pladojn viandajn kaj vegetarajn.”

Ĝuste tiam la dukino venis kaj diris al la reĝino: “Via Reĝina Moŝto, ĉu vi bonvolas iri al la orienta halo por la festeno? Hodiaŭ estas tago bonaŭgura kaj ĉi-vespere vi povos edziniĝi al la imperiestra frato. Morgaŭ la Imperiestro-frata Moŝto povos surtroniĝi kaj uzi la titolon de nova reĝo.” Ŝia diro tre ĝojigis la reĝinon.

Kiam ili atingis la orientan halon, sonis bela muziko kaj viciĝis ambaŭflanke belulinoj. Meze de la halo estis du luksaj tabloj, maldekstre vegetara kaj dekstre vianda. Malsupre estis du vicoj da individuaj sidlokoj. La reĝino suprentiris sian silkan manikon, ektenis jadan pokalon kaj invitis Sanzang al la banke- do. Simio alproksimiĝis dirante: “Ni ĉiuj estas vegetaranoj. Estus pli bone, se vi sidigus la majstron ĉe la vegetara tablo kaj metigus tri seĝojn malsupren por ni tri disĉiploj.” “Prave, prave,” diris la dukino kun aprobo, “majstro kaj disĉiploj estas kva- zaŭ patro kaj filoj kaj oni ne devas sidigi ilin ŝultro ĉe ŝultro.”

La oficistinoj rearanĝis la tablon, kaj la reĝino pasigis pokalojn da vino al ĉiu el la tri kaj petis ilin iri respektive al siaj seĝoj. Simio donis al la majstro okulsignon, aludante, ke ankaŭ li prezentu vinon al la reĝino. Sanzang leviĝis de sia seĝo kun jada pokalo en la mano kaj petis la reĝinon sidiĝi.

Spite al ĉiuj ceremonioj Porko senbride ekmanĝis frandaĵon kun bona apetito. Kiam li jam englutis kelkajn pokalojn da vino, li kriis: “Plenigu mian pokalon! Donu al mi alian pli grandan kaj pli da drinkaĵo kaj post tio ĉiuj disiĝu por propra afero!” La reĝino tuj ordonis alpreni pokalegon kaj doni aroman vinon al Porko.

Sanzang ekstaris, kunmetis siajn manplatojn antaŭ la bruston kaj diris al la reĝino: “Via Reĝina Moŝto, elkoran dankon pro la grandioza festeno. Estas jam sufiĉe por ni. Ĉu vi bonvolus kontroli la pasporton, por ke miaj disĉiploj ekvojiru kiel eble plej frue?” La reĝino kapjesis kaj ordonis la disĉiplojn elpreni la pasporton. Simio prezentis ĝin respektoplene al la reĝino, kiu ĝin zorgeme ekzamenis. Sur ĝi estis naŭ sigeloj de la Granda Tang-imperio, kaj malsupre de ili estis tiuj de aliaj landoj. Ankaŭ la reĝino sigelis ĝin kaj redonis al Simio.

La reĝino donacis al la disĉiploj teleron da pecetaĵo kaj arĝento, kiujn Simio danke rifuzis. Ŝi elprenigis ankaŭ dek ru- lojn da silkaĵo, sed Simio refoje ilin malakceptis. Ŝi do ordonis elporti sakon da rizo el la palaca kuirejo kaj diris, ke per tio ili povos fari manĝon survoje. Aŭdinte la vorton “manĝo”, Porko prenis la rizon, metis ĝin

en la pakaĵon kaj kunpremis siajn manplatojn antaŭ la bruston por danki.

“Via Reĝina Moŝto,” diris Sanzang, “ĉu mi povus ĝeni vin kuniri kun mi por akompani miajn disĉiplojn ekster la urbon? Mi donos al ili kelkajn adiaŭajn instruojn, por ke ili bonkondu- tum sia vojaĝo. Post tio ni ambaŭ revenos kune por ĝui la reĝan vivon.” La reĝino ordonis pretigi kaleŝon kaj baldaŭ ili atingis la okcidentan antaŭurbon.

La tri disĉiploj kun sama celo ordigis siajn vestojn kaj iris rekte al la kaleŝo, laŭte kriante: “Via Reĝina Moŝto! Ne eskortu nin plu! Lasu nin adiaŭi vin ĉi tie!” Ankaŭ la majstro ĝentile adiaŭis la reĝinon kaj diris: “Nun bonvolu reiri kaj lasu min pilgrimi kun miaj disĉiploj!” Aŭdinte tion, la reĝino paliĝis mirigite. Ŝi kaptis la majstron je la maniko dirante: “Kara imperiestra frato, mi proponis al vi mian landon, por ke vi estu mia edzo. Morgaŭ vi surtroniĝos kiel reĝo kaj mi fariĝos via edzino. La geedziĝa festeno ja estis ĵus finita. Kial vi perfidas min?”

Ne tolerante la dirojn, Porko furioziĝis. Li trudiĝis antaŭ la kaleŝon kun la muzelo puŝiĝanta kaj la oreloj svingiĝantaj, kriante: “Kial ni bonzoj volus edziĝi al skeletino kiel vi? Lasu mian majstron foriri!” Timigite, la reĝino falis en sian kaleŝon. Wujing helpis la majstron surĉevaliĝi. Ĝuste tiam virino pafiĝis el vojrandado, kriante: “Ne foriru, Tang-imperiestra frato! Ni faru amajon kune!” “Kia rabistino!” tondris Wujing kaj batis ŝin je la kapo per sia bastono. Subite aŭdiĝis “ŝus!”, la virino faris kirloventon, kiu forportis la majstron.



## AMIKAJ ARBOJ KUNE PLANTITAJ DE ĈINAJ KAJ JAPANAJ JUNULOJ

Posttagmeze de la 19-a de septembro 1982, pli ol 300 junuloj kaj junpioniroj de Pekino kaj la membroj de 7 japanaj junulaj vizitgrupoj al Ĉinio okazigis en la parko Ĉiela Altaro la inaŭguron por planti amikajn arbojn okaze de la 10-a datreveno de la normaligo de la rilatoj inter Ĉinio kaj Japanio.

En la inaŭguro Jin Jian, la prezidanto de la Pekina Junulara Federacio, diris: "Hodiaŭ ni kune plantas amikajn arbojn ĉi tie por esprimi niajn sopiron kaj estimon al tiuj personoj kiuj faris kontribuon al la ĉina kaj japana amika afero, ankaŭ por esprimi la volon de nia juna generacio daŭrigi tiun aferon." Ankaŭ la estroj de la 7 japanaj vizitgrupoj faris paroladojn unu post alia. Ili esprimis, ke la japanaj junuloj protektas la amikecon de la du landoj kiel la amikajn arbojn.

En manklakado kaj trumpetado de junpioniroj la junuloj de ambaŭ landoj kune plantis kaj akvumis 7 cipresojn. (En Ĉinio cipreso estas simbolo de eterna juneco. — Trad.)

## STUDENTOJ DE LA MUZIKAJ LERNEJO KAJ AKADEMIO MENUHIN EN ĈINIO

Inter la 30-a de aŭg. kaj la 13-a de sept. 1982, la vizitgrupo de studentoj de la Muzika Lernejo Yehudi Menuhin de Britio kaj la Internacia Muzika Akademio Menuhin de Svislando vizitis Ĉinion. Post la 6 prezentoj faritaj de ili en Ŝanhajo kaj Pekino, la mondfama violonisto Menuhin alflugis de Usono al Pekino la 10-an de sept.

kaj ludis la lastajn tri prezentojn kune kun siaj studentoj.

En la du koncertoj kune okazigitaj de la grupo kaj la ĉina Centra Filharmonio, direktate de s-ro Menuhin, la ĉinaj 27-jara Jia Hongguang kaj 13-jara Jin Li, kiuj studas en la lernejo kaj akademio, ludis du violonajn koncertojn de Brahms kaj Beethoven, kunlabore de la filharmonio. La du studentoj montris en la ludado siajn profundecon, lertecon kaj riĉsenton de muziko kaj ricevis aplaŭdon de muzikistoj. Kiam la orkestro de la Muzika Akademio Menuhin ludis la "Dueta Konĉerto D-minora" de Vivaldi, s-ro Menuhin kaj la ĉina 20-jara studento Zhang Leyi lernanta eksterlande ludis kiel violonaj solludistoj. Dum la vizitado la ĉina Centra Konservatorio titolis s-ron Menuhin honora profesoro.

## AŬSTRIA PIANISTO EN ĈINIO

La 5-an de sept. 1982, kunlabore kun la ĉina Centra Filharmonio la fama aŭstria pianisto profesoro Hans Kann ludis en la Nacieca Kultura Palaco de Pekino la "Ebenolan Majoran Pianokonĉerton N-ro 5" de Beethoven kaj ricevis varman akcepton de pli ol mil ĉinaj muzikamantoj.

S-ro Kann estas piana profesoro de la Viena Konservatorio de Aŭstrio kaj lertas en ludado de eŭropa tradicia klasika muziko. Li esploras kaj ludas ankaŭ modernan muzikon. En septembro 1980 li vizitis Ĉinion, ludis kaj prelegis en Pekino, Ŝanhajo, Chengdu kaj Nankino, kio estis bonvena por la ĉinaj muzikistaj rondoj. Ĉi-foje profesoro Kann ludis kaj prelegis en la urboj Xi'an, Ŝanhajo kaj Kantono, krom en Pekino.

## LA GANSU-A ENSEMBLO DE ĈINIO EN ITALIO KAJ FRANCIO

De la 14-a ĝis la 18-a de sept. 1982 la ensemblo prezentis la bale-

ton "Sur la Silka Vojo" en Milano, kaj la 19-an ĝi veturis al Parizo kaj tie faris prezentadon dum pli ol unu monato.

La baletoj montris la komercan rilaton, kulturalan interŝanĝon kaj tradician amikecon de la antikva ĉina popolo kun tiuj de aliaj landoj. La italaj kaj francaj spektantoj estis ravitaj de la bela sceneja dekoracio, ĉarmaj vestoj kaj brila prezentado. Ĉiu prezento ricevis longan aplaŭdon de spektantoj, pro tio la geaktoroj devis plurfoje saluti ilin por esprimi sian dankon.

## ĈINA VERKISTA DELEGACIO AL USONO


La ok-membra delegacio estrata de Feng Mu, vicprezidanto de la Ĉina Verkista Asocio, ĉeestis la Konferencon de Ĉinaj kaj Usonaj Verkistoj okazigitan en Los-Anĝeleso, Usono, de la 21-a ĝis la 23-a de sept. Tiu konferenco estis iniciatita de la Arta kaj Literatura Instituto de Usono kaj la Kalifornia Universitato en Los-Anĝeleso, kun la celo interŝanĝi opiniojn pri la problemoj interesaj por ambaŭ flankoj en la literatura kampo.

## FRANCIO DONACIS AL LA PEKINA ZOOLOGIA ĜARDENO LEONTIGRIDOJN

La Natura Zoologia Ĝardeno de Thoiry en la antaŭurbo de Parizo donacis al la Pekina Zoologia Ĝardeno du leontigridojn. Ili, similaj kaj al sia patro leono kaj al sia patrino tigrino, estas tre ferocaj.

La franca natura zoo sukcesis naskigi sume 4 leontigridojn, du masklajn kaj du femalajn, kiuj nun havas 1.5 jarojn. Tio estas la unua sukceso de hibridiĝo de leono kaj tigrino. Sed la du tigrinoj mortis nelonge post sia akuŝo.





# Ekonomio kaj kulturo de la Okcidenta Han-dinastio

de BA HONG

## DISVOLVIĜO DE AGRIKULTURA PRODUKTADO

En la komencaj jaroj de la Okcidenta Han-dinastio (206 a.K. — 8 p.K.), kiam ĵus foriĝis la milita kaoso, la ŝtato praktikis la politikon kvietigi la socian ordon kaj popolan vivon, la popolo ekspluatis dezertan teron por agrikulturo kaj morusarba plantado. Tiam estis jam vaste aplikataj la perbova plugado kaj feraj instrumentoj, kiaj plugilo, ŝovelilo, ŝpato kaj falĉilo. El tiama tombo oni elfosis freskon, en kiu du bovoj kun T-forma ligna bastono sur la nukoj tiras plugilon tenatan de unu homo, kio prezentas la tiaman agrikulturan produktadon.

Tiam la kamparanoj kreis teknikon de semado. Ili semis per tripieda ĉareto. Per tia metodo la semoj estis kovritaj per sandika tavolo da tero, kaj la plantidoj kreskis bonorde.

La Okcidenta Han-dinastio havis nemalmultajn kreaĵojn ankaŭ en akvoutiligo. Dum la regperio-

do de la imperiestro Wudi (140 — 87 a.K.) oni konstruis multajn kanalojn kaj putojn, kio multe pligrandigis la irigacian areon.

Tiam estis homo nomata Zhao Guo. Li kreis kulturan metodon: Prilabori agron en longajn sulkojn 33 centimetrojn larĝajn kaj profundajn kun malsulko ankaŭ 33 centimetrojn larĝaj; semi en la sulkoj, post elteriĝo de la plantidoj aldoni al ili la teron de la malsulko por pliigi la povon de la plantidoj kontraŭ sekegeco kaj vento; interŝanĝi la lokojn de la sulkoj kaj la malsulkoj en la sekva jaro. Tia metodo multe plialtigis la produktokvanton de agrikulturaj plantoj.

Krome, tiam oni jam disvastigis metodojn semo-trempo, spiko-elektan, temperaturo-mo-

derigan de la akvo en riz-kampoj, plurfoja-kulturan, altern-kulturan kaj interkulturan.


Progresis ankaŭ la tekniko por prilabori agrikulturajn produktadojn. Antaŭe oni pistis rizon kaj prilaboris aliajn grenojn per manlaboro. Sed en la Okcidenta Han-dinastio oni komencis uzi ŝtonan muelilegon tiratan de brutoj aŭ puŝatan per akvoporto.

Dum tiu periodo oni kulturis ĉefe milion kaj tritikon, kaj ankaŭ rizon, sojfabon, kanabon, ĵijen (*Coix lacryma-jobi*) kaj sorgon en la baseno de la Flava Rivero.


## NOVA TEKNIKO DE FERSTALA PRODUKTADO

Dank' al la vasta uzo de feraj instrumentoj en la agrikulturo,

*Maldika vesto elterigita en 1972 en la tombo n-ro 1 de la Okcidenta Han-dinastio ĉe Mawangdui en Changsha*



*La fresko "Plugado per Bovo" el tombo ĉe Zaoyuan, Pinglu-gubernio, Shanxi-provinco*




la fera produktado plej prosperiĝis. Post kiam mortis la imperiestro Wudi, la fera produkto estis entreprenata de la ŝtato kaj en la tuta lando troviĝis 49 produktoj. Oni trovis 18 fornojn por ferforĝado en elterigita ferforĝejo de la Okcidenta Han-dinastio kun areo de 1 500 kvadrataj metroj. El ĝi oni rimarkis, ke krom lignokarbo ankaŭ ŝtonkarbo estis vaste uzata kiel brulo por ferforĝado. Tiam oni jam uzis refrektan fornon kaj forĝadon en ŝtalafinaciado. Tiuj ŝtalafinaciaj teknikoj estas grava progreso en la ŝtalafinacia historio.

### BELAJ METIARTAĴOJ KAJ TEKSAĴOJ

Pro la vasta uzo de fero la farado de bronzajoj perdis sian gravan pozicion. Bronzo estis uzata por fari delikatajn instrumentojn kaj artismajn objektojn. En 1968 oni prifosis maŭzoleon de la princo Zhongshan de la Okcidenta Han-dinastio, el ĝi oni elterigis delikatajn bronzajn incensujon, palacan lampon k.a.

Ŝpinteksado estis metio en la Okcidenta Han-dinastio kun granda skalo, multaj specoj kaj avangarda tekniko. Ĝiaj produktajoj plejparte estis silkaj kaj kanabaj ŝtofoj. En la ĉefurbo Chang'an estis du silkaj metiejoj, kiuj havis po pli ol mil metiajn sklavojn, produktantajn diversajn delikatajn teksaĵojn el silko kaj kanabo. Tiuj produktajoj estis liverataj al la imperiestro kaj nobeloj kaj ankaŭ eksportataj al aliaj landoj. En la printempo de 1972 oni elterigis multajn silkajn teksaĵojn el granda tombo de la Okcidenta Han-dinastio en Mawangdui, Changsha de Hunan-provinco. Estis pli ol cent specoj de silkajoj, inter kiuj troviĝis bone konservataj



*Elterigitaj objektoj de ŝipfarejo en la unuaj jaroj de la Okcidenta Han-dinastio eltrovita en Kantono glazurita fajenca poto kun tri piedoj (maldekstre supre) tegmentrandaj tegoloj kun nubaj desegnoj (dekstre supre), moneroj de Qin-dinastio (maldekstre sube) kaj kupraj sagopintoj (dekstre sube)*

vestoj, kompletaj kaj nekompletaj ruloj da silkaj ŝtofoj kun koloroj tea, purpure verda, griza, ruĝa, helbruna, helflava, nigra, verda kaj blanka. Ili portis desegnojn de animaloj, nuboj kaj rombaj figuroj. Inter la vestoj estis vesto el maldika silkaĵo, 128 cm. longa kaj kun maniko longa je 190 cm., sed peza je 49 gramoj.

### LA PROSPERA URBO CHANG'AN

Kun la ekonomia disvolviĝo kaj pliiĝo de loĝantaro aperis multaj prosperaj urboj dum la periodo de la Okcidenta Han-dinastio, el kiuj la plej granda estis la ĉefurbo Chang'an. Ĝi situis nordokcidente de la nuna Xi'an en la provinco Shaanxi. La ĉefurbo kun perimetro de 23 kilometroj kovras 35 kvadratajn kilometrojn, kie loĝis 80 000 familioj kun ĉ. 500 000 loĝantoj. Ĝi estis trioble pli granda ol la

tiam Romo. Ĝi havis 12 urbajn pordegojn, ĉiu kun tri enirejoj, tra kiuj 12 kaleŝoj povis eniri samtempe. Sur ĉiu pordego staris grandioza turo 52 metrojn larĝa, kiu videblis eĉ de malproksime je dekoj da kilometroj.

En la urbo troviĝis naŭ homplenaj foirejoj, kie estis diversaj metiejoj, vendejoj kaj drinkejoj kaj videblis drogo-vendistoj, ĵonglistoj, vetantoj kaj aliaj. Tie vendiĝis tiaj varoj el diversaj lokoj de la lando, kiaj lakitaj kaj lignaj mebloj, kupraj kaj feraj objektoj, silka vato, lanfadenoj, peltaj, brodaĵoj, gravuraĵoj kaj skulptaĵoj, porkoj, bovoj, ŝafoj kaj aliaj.

Chang'an tiam estis politika, ekonomia kaj kultura centro de la lando. Post kiam la imperiestro Wudi nomumis ŝtatajn oficistojn per ekzameno kaj starigis ŝtatan lernejon por akcepti eminentulojn per ekzameno, erudi-



ciuloj de diversaj lokoj ofte kolektiĝis en la ĉefurbo.

Ankaŭ la alilandaj senditoj kaj komercistoj loĝis en la gastejoj konstruitaj de la ŝtato speciale por ili. Ili alportis ĉevalojn, struktajn ovojn, glazuraĵojn, lanajn tapiŝojn, muzikilojn kaj komponciojn de okcidentaj landoj. De tie startis ankaŭ la kamelaj karavanoj plensarĝitaj per silkajoj al la Okcidento laŭ la silka vojo.

## LA UNUA LIBRO PRI LA ĜENERALA HISTORIO DE ĈINIO

Tiutempe, kiam la feŭdisma sistemo pluapasa solidiĝis kaj disvolviĝis, la reganta klaso bezonis sisteme resumi la historian sperton. La libro "Kroniko de Historio" verkita de Sima Qian aperis ĝuste en tiu periodo. En la jaro 135 a.K. Sima Qian naskiĝis en familio de ŝtata historiisto. En sia juneco li vojaĝis tra la tuta lando kaj bone konis la popolan moron kaj vivon, geografiajn kaj specialajn produktajn de diversaj lokoj de la lando. En 108 a.K. post sia patro li estis nomumita kiel la plej alta historia oficisto de la kortego. Pro tio li havis ŝancon legi grandan kvanton da libroj konservataj en la kortego. Ekde 104 a. K. li komencis verki "Kronikon de Historio" kaj en 91 a. K. li finis tiun historian libron en biografia stilo. La libro registris la historion de 3 000-4 000 jaroj de Huangdi, tribestro en la ĉina primitiva socio, ĝis la imperiestro Wudi de Han-dinastio. Ĝi liveris al la posteuloj ekstreme gravan materialon por koni la historion antaŭ la Okcidenta Han-dinastio kaj eĉ nun ankoraŭ havas tre altan valoron en historia scienco kaj literaturo.

# POR KE LA HOMARO VIVU EN BELA MEDIO

— Iom pri la Medioprotektado en Aŭstrio, Japanio kaj Singapuro

*Medioprotektado estas unu el la gravaj problemoj atentataj en la nuna tempo. Por ke la homaro havu belan medion, multaj registaroj alprenis diversajn rimedojn. Ĉi-sube ni prezentas sukcesojn de Aŭstrio, Japanio kaj Singapuro en tiu flanko.*

— LA RED.


## ARBAROJ EN AŬSTRIO

Aŭstrio famas tra la mondo kiel muzika lando. Ĝi ankaŭ ĝuas la nomon de "verda lando" pro sia bona protektado de arbaroj. Nun 45% de ĝia landa areo estas kovrataj de arbaroj. Ili kune kun la paŝtejoj kaj kampoj formas belan verdan pejzaĝon de Aŭstrio.

Aŭstrio tre atentigas protekton de arbaroj. Frue en 1852 ĝi

publikigis "Leĝon de Arbaroj". En la du mondmilitoj ĝiaj arbaroj estis serioze detruitaj. Post la militoj la aŭstria registaro metis la disvolvon de arbaroj en gravan lokon en sia nacia ekonomio. Antaŭ nelonge ĝi ellaboris grandan longtempan planon pri verdigo, laŭ kiu ĝi ĉiujare asignos 1 200 — 1 700 milionojn da aŭstriaĵaj ŝilingoj por disvolvi agrikulturon kaj forstokulturon, protekti vivantajn esta-

Osaka, bela urbo de Japanio



ĵojn kaj verdigi la medion. En la tuta lando fondiĝis pli ol 50 eksperimentejoj pri forstumado. La Federacia Arbara Instituto kun historio de pli ol cent jaroj estas centro de Aŭstrio por esplori, protekti, renovigi kaj plibonigi arbarojn. Aŭstrio havas 214 rezervejojn kaj 180 ĉasado-malpermesitajn lokojn, kiuj konsistigas kvinonon de la totala areo de la lando. Eĉ dekono de la areo de ĝia ĉefurbo Vieno estas difinita kiel rezervejo.

Arbaroj estas grava riĉfonto de Aŭstrio. Ili formas "nevideblan akvorezervejon" kaj ludas grandan rolon por konservi akvon kaj grundon kaj preventi inundon. Tial aŭstroj amas kaj ankaŭ zorgas ilin. Oni ofte povas vidi ĉe ŝoseoj inter montoj okulfrapajn karikaturojn kaj sloganojn, kiuj atentigas pri singardo kontraŭ incendio kaj protektado de arbaroj kaj sovaĝaj bestoj. Aŭstroj opinias, ke la beligo de la patrolando estas nedisigebla de la amo al ĝi kaj protektado de floroj, arboj kaj medio estas bona moralo.

En Aŭstrio beligo de la medio fariĝis nemankigebla por la popola vivo. Kiam venas sezonoj por planti arbojn, ĉiuj loĝantoj, ĉu plenkreskuloj, ĉu infanoj, plantas arbojn sur montoj aŭ apud siaj domoj. Dank' al tio la lignorezerva kvanto de Aŭstrio plimultiĝas jaro post jaro kaj la areo de arbaroj senĉese plivas-tiĝas, kvankam ĝi ĉiujare forhaskas pli ol 10 milionojn da kubmetroj da ligno.

Aŭstrio altiras al si multajn turistojn el diversaj landoj pro siaj belaj pejzaĝoj. Vintre ĝi estas ideala loko por skiado pro abundeco de neĝo kaj mildeco de

vento, kaj somere oni tie kampa-das kaj piknikas en arbaroj por ĝui kvietecon de la naturo. Turistoj povas iri al difinitaj lokoj por ĉasado kaj fiŝhokado kaj tieaj restoracioj liveras delikatajn frandaĵojn el diversaj sovaĝbestaj viandoj. Ĉiuj, kiuj vizitis Aŭstrion, havas bonan impreson pri ĝiaj arbaroj kaj verdigo de la medio.

### POLITIKO DE JAPANIO PRI LA MEDIOPROTEKTADO

En la sesdekaj jaroj Japanio estis ankoraŭ lando suferanta seriozan polucion. Nun en la okdekaj jaroj jam multe pliboniĝis ĝiaj laboroj pri la medioprotektado. En la meza kaj suda partoj de Japanio montodeklivoj estas kovrataj de prosperaj arbaroj, kaj sur la tero sterniĝas kampoj kaj herbejoj. En multaj urboj fabrikoj ne plu lasas

nigran fumon kaj en la aero ne estas malbonodoro.

La sukceson Japanio ŝuldas al sia ĉi-rilata politiko. Ĝi fondis, de la centra registaro ĝis diversaj lokoj, kompletan da organizoj por medioprotektado kaj ankaŭ ellaboris relative perfektan politikon pri medioprotektado, kies plenumiĝon garantias la koncernaj leĝoj. Laŭ la "Fundamenta Leĝo de Politiko pri Media Polucio" reviziita en 1970, la japana registaro ellaboris centojn da leĝoj kaj reguloj por protekti la medion, kiel ekzemple Leĝo pri Preventado de Atmosfera Polucio, Leĝo pri Preventado de Akva Polucio, Leĝo pri Preventado de Bruo, Leĝo pri Preventado de Gaso Lasita de Aŭtoj, Leĝo pri Preventado de Grunda Polucio, Leĝo pri Preventado de Mara Polucio, Leĝo pri Traktado de Eluzitaĵoj k. a.

Laŭ tiuj leĝoj Japanio difinis rigorajn normojn pri ellaso de

*Industria kvartalo de Singapuro, konata kiel ĝardena urbo*





malpuraĵoj. Ekzemple, la sulfurentena kvanto de brulaĵo en ordinaraĵoj ne superu 1.2%, kaj tiu en la lokoj dense loĝataj kaj industriaj estu ankoraŭ pli malgranda. Se la sulfurentena kvanto superas la normon, desulfurigado devas esti farata al la brulaĵo. En 1975 la povo de desulfurigaj instalaĵoj en la tuta Japanio estis 20-oblo de tiu en 1970, kio ludis grandan rolon por redukti la ellasan kvanton de sulfura dioksido. Japanio ankaŭ kuraĝigas industriaĵojn en cirkule uzataj akvon. Nun 94%-97% de la akvo uzata en iuj novaj ferŝtalaj fabrikoj estas uzataj cirkule, kaj tiamaniere multe reduktiĝas ellasa kvanto de malpura akvo. Krome ĝi ankaŭ kuraĝigas sinteze utiligi riĉfontojn kaj fondi tian bazon por redukti damaĝon de malpuraĵoj.

Por sukcesigi la preventadon, limigon kaj eliminadon de polucio, la japana registaro difinis en sia medioprotekta leĝo ekonomiajn rimedojn, ekzemple, la bankoj povas fari longtempan prunton de mono je malalta interezo al la koncernaj entreprenoj por forigi polucion; redukti imposton super la fiksitaj kapitaloj por forigi polucion; jaron post jaro altigi imposton super ellasitaj malpuraĵoj laŭ ilia kvanto. Tiuj rimedoj bone efikas en protektado de la medio kaj reduktado de malpuraĵoj.

### BELA MEDIO DE SINGAPURO

Singapuro tre atentigas urboverdigon. Ĉie troviĝas gazonoj, malgrandaj parkoj ornamas la urbon, palmoj kaj aliaj arboj ombros la stratojn. Kaj aromas floroj kaj fruktoj en la tuta jaro.

En tiu lando la verdigo de ĉiuj stratoj estas zorgata de fakaj laboristoj kaj tiu ĉirkaŭ la privataj domoj estas zorgata de loĝantoj. Por kuraĝigi la loĝantojn beligi la medion, la singapura registaro decidis redukti la lupagon de tiuj domluantoj, kiuj bone faras la verdigon. En malgrandaj parceloj oni elkulturas diversajn florojn kaj herbojn. Ili kulturas grimpemajn kaj pendantajn plantojn por ornamoj murojn, balkonojn, pordojn kaj fenestrojn. Tiaj plantoj rapide kreskas kaj post duona jaro ili jam povas formi belan vidaĵon per siaj prosperaj floroj kaj folioj.

Por beligi la medion la loĝantoj de Singapuro ankaŭ kulturas diversajn envazajn plantojn sur balkonoj kaj en koridoroj. Ĉiuj envazaj plantoj estas vivaj lirkaj.

La loĝantoj de Singapuro opinias, ke plantoj estas ne nur "natura fabriko" por purigi la aeron, sed ankaŭ "natura sanprotektanto". La bonodoroj de plantoj utilas al preventado de malvarmumiĝo kaj malsanoj de spira sistemo. Ekzemple, laodoro de dalio povas kvietigi la nervojn, forigi lacon kaj stimuli dormadon, tiu de rosmareno povas mildigi suferon de astmapacientoj, kaj tiu de kariofilo povas mildigi dentodoloron.

Singapuro, fama kiel ĝardeno, kondamnas laŭvolajn disjetadon de cigaredaj stumpoj, malplenaj skatoloj kaj eluzitaj paperpecoj, kraĉadon kaj detruadon de arboj en parkoj kiel krimojn ekde la jaro 1968. En 1980 8 400 homoj estis arestitaj pro sia detruo de la medio kaj kondamnitaj al monpuno. Laŭdire, la registaro alprenis tiun rimedon pro tio, ke simpla admono ne rikoltis konsiderindan efikon.



### PER ESPERANTO AKCELI LA INTERNACIAJN INTERŜANĜOJN EN SCIENCIO KAJ TEKNIKO

de Shirin Ahmad-Nia

Esperanto, la neŭtrala lingvo, gravas ne nur pro ties kapablo liveri al la homaro majstrajn tradukojn de mondfamaj ĉefverkoj de verkistoj aŭ poetoj, sed ankaŭ por evolulandaj junuloj soifantaj la pliscion, pli-studon, sciencan kaj teknikon, Esperanto estas bona rimedo atingita.

Tiu-cele tio, kion la esperantistaro povas fari, estas respondece utiligi Esperanton je disvastigo de sciencaj kaj teknikaj scioj inter la popolamasoj, kaj pere de Esperanto akceli la internaciajn interŝanĝojn en scienco kaj tekniko.

Kiel sciante, nuntempe en la mondo ĉiutage distribuiĝas miloj da sciencaj periodaĵoj, libroj, broŝuroj, kursotekstoj, tajpaĵoj, ktp, en la lingvoj kiel la angla, franca aŭ germana, sed ne en Esperanto.

La manko de tiuj postulataj eldonadoj estas klare kaj grave sentebla ĉe niaj movadanoj en Irano, kaj plejble tion sentas ankaŭ multaj niaj samideanoj en Azio, Afriko, Latinameriko, k.s., kiuj suferas la similajn kondiĉojn.

Daŭra eldonado de esperantlingvaj scienco-legaĵoj — jes, tio certe estos bona kaj kontentiga respondo al la avidaj alrigardoj de la amasaj junuloj tria-mondaj, kiuj serĉas alion ol tio, kion serĉas la eŭropaj en Esperanto.

La prelegtekston de atestimata s-ano Zhang Qicheng "Esperanto kaj la Tria Mondo" en la maja nu-

# Voĉoj el Irano

mero mi legis kun granda entuziasmo kaj sekvaj laŭdo kaj respekto. Jen verko, kiu ankoraŭfoje elmontras pure kaj klare la urgajn postulojn de la suferantaj tria-mondanoj al la tuta esperantistaro kaj Esperpondecoj, survoje al la efektiva internaciigo de nia verdire ankoraŭ ne Internacia Lingvo.

## LA PLEJ GRAVA ESTAS PLIMULTIĜO DE E-ISTOJ DE LA TRIA MONDO

de Ahmad R. Mamduhi

Feliĉoplene, post la gratuloj pri fondiĝo de "Amikoj de Esperanto", mi vidis ĉefartikolon "Esperanto kaj la Tria Mondo", prelegita de ŝro Zhang Qicheng, ĝenerala sekretario de la nova organizaĵo.

Vidpunktoj esprimataj en tiu artikolo estas tiuj, pri kiuj ankaŭ Irano ĉiam emfazis (la revuo Esperanto: Dec./77, Jan./78 kaj Okt./80) kaj emfazas. T.e. konservi facilecon de E-o kaj apliki tion kiel konduk-ponton alportantan scienccon de la t.n. unua kaj dua mondoj en la trian, por plialtigi sciencnivelon de la tria mondo unuflanke, kaj tiel popularigi E-on en la tria-mondaj landoj, kiuj konsistigas ĉ. du trionojn de la monda loĝantaro, aliflanke.

Samkiel dirite en tiu prelego, apenaŭ okcidentaj e-istoj, kiuj povas legi scienc-teknikajn librojn en siaj naciaj lingvoj, kapablas kompreni kion atendas tria mondo de Esperanto. Pro tio, do, ni, triamondaj esp-istoj, devas ĉiam kaj diversmaniere informi ilin ĉi-rilate.

Metodoj, por tion fari, estas diversaj sed la plej efika, laŭ mi, estas

plimultiĝo de e-istoj en la tria mondo, ĝis nia propono kvante plifortiĝu; ju pli la nombro de la kriantoj pri la manko de scienc-teknikaj eldonaĵoj en E-o grandiĝos, des pli bone la monda (okcidenta) e-istaro konsideros la aferon grava kaj serioza.

Pere de plimultiĝo de e-istoj, kiuj emas legi scienc-teknikajn librojn en E-o, okcidentaj eldonejoj kuraĝiĝos kaj trovos bonan kaj garantiitan merkaton tiutere. Sed, eldonadon tian devas komenci tria mondo mem, se ĝi povas. Se ni povas eldoni librojn en E-o, kial ni ne faru tion pri la libroj, kiujn ni mem konsideras bezonataj? La Tria Mondo, kiam stagnadas la bezonoj mem, kvankam havas la eblecojn, ne devas atendi ĉion flanke de aliaj mondoj. Komenco almenaŭ, estu nia.

Via lando, Ĉinio, kiu, kompare kun la aliaj de la movadaj landoj de la tria mondo, disponas pliajn eblecojn, povas komenci tion, unue per ne tre ekspertaj sed ĝeneralaj sciencaj enciklopedietoj kaj libroj referencaj.

## ĈINIO DEVAS FARI KONTRIBUOJN EN ELDONADO DE SCIENCAJ VERKOJ

de Giti Ahmadnia

Tiu artikolo ("Esperanto kaj la Tria Mondo") legite en niaj E-rondoj kaŭzis grandan diskuton ĉi tie. La opinioj menciitaj en tiu prelego de longe estis priparolitaj inter irananoj, kaj via artikolo esperinde vigligis tiujn interesojn. En Irano ni pli multe kalkulas pri vi ol Eŭropo. La tria mondo estas

granda parto de nia tero, sed ankaŭ via popolo mem konsistigas ĉ. kvaronon de la homaro. Tio estas tre grava, eĉ gravega, ĉar via akcepto estos iel la akcepto de t.n. tria mondo, kaj disvastiĝo de Esperanto havos grandan garantion.

Nun mi prenas la okazon por priparoli kelkajn aferojn. Kiel dirite, vi havas grandan landon kun sufiĉaj eblecoj sur la kampo de eldonado kaj tio estas apoginda tereno en la evoluado de scienc-teknikaj eldonaĵoj. Se eĉ minimume 10 000-onon de via edukadbuĝeto vi investus por la eldonado de sciencaj verkoj Esperante, tiu pionira agado dum venontaj dek jaroj alportus plej verŝajne al vi mond-kulturan ĉeeston, prestiĝon kaj respekton ne precedencan, pli vastan kaj imponan ol tiu kiun kvar- aŭ kvin-mil-jara kulturhistoria agado eble ne akiris por Ĉinujo. Ĉi-teme necesas diri ke en la tria mondo, kiel vi scias, 50-55% de la loĝantaro staras sub la aĝo de 20 jaroj kaj ĉar tiu junularo estas la celo de Esperanto, do la eldonaĵoj devas kapabli respondi la soifon de ili surbaze de la tekniko kaj avangardaj sciencoj.

Ĉi tiu letero reflektas ne nur la opinion mian individue, sed reflektas resumon de opinioj de niaj ĉiuj iranaj samideanoj.

## EŬROPAŬOJ KOMPRENUNIAN BEZONON

de Mojgan Tajefi

En Irano en lastaj jaroj Esperanto multe disvolviĝis kaj multaj homoj konis ĝin kaj eklernis ĝin sed multe da ili ekkabeigis. Ĉar ili ne volas nur poemojn kaj literaturon de la lingvo. Ili lernas lingvon por uzi ĝin kaj ili deziras akiri scienccon de ali-lingvaj libroj. Do kiam ili ne trovas kion ili deziras, ili forlasas la lingvon kaj ne plu daŭrigas ĝin.

Ni deziras ke la Eŭropanoj komprenu nian bezonon kaj komencu traduki valorajn eldonaĵojn.





## LA "MARA OVO"

### —MITULO

Mitulo estas mara molusko kun konko. La ofte videbla mitulo estas de speco kun konko maldika, nigra kaj ovala, kiun la ĉinaj fiŝistoj nomas orientmara belulino.

La mitulo estas nutroriĉa. Ĝia karno entenas proteinon (53%), grason (6.9%), sukeron (17.6%) kaj kalcion, fosforon, feron kaj aliajn elementojn. Ĝi estas tiom nutra, je 98% kiom la kokovo, sed pli nutra ol la bovajo, salikoko kaj markrabo, kaj la supre diritaj elementoj estas facile asimileblaj por la homa korpo. Tial ĝi estas konata ankaŭ kiel mara ovo. Laŭ la biokemia konsisto, ĝi enhavas ok specojn de la aminaj acidoj, ekz. triptofano kaj fenil-alanino, kiujn la homa korpo ne povas sintezi sed tre bezonas. El la mitulo oni preparas manĝaĵojn diversmaniere: ĝin kuiri en akvo, frikasi, vaporumi kaj friti, kaj ankaŭ fari mitulan supon. Se oni spicas la manĝaĵon per sojo, vinagro kaj haketita zingibro, do ĝi fariĝas pli bon-gusta.

La mitulo servas ankaŭ kiel bona medikamento por vigligi sangocirkuladon kaj malhelpi maljuniĝon kaj arteriosklerozon. Li Shizhen, ĉina farmaciisto de la 16-a jarcento skribis en sia farmakopeo "Bencao Gangmu", ke ĝi, dolĉa, povas malvarmigi la internajn orga-

nojn kaj varmigi la sangon, forigi febron kaj kuraci erizipelon. Krome, la mitulo estas ankaŭ riĉa je vitamino B kaj havas malgrandan kvanton da mangano, kobalto, jodo kaj multaj aliaj elementoj. Tial ĝi povas kuraci perleĉon, glositon, anemion kaj okulajn malsanojn.

La mituloj estas algluiĝaj, ili ofte arope algluiĝas al rokoj de kajo aŭ marbordo, ĉe kiu okazas malalta tajdo. La maturaj masklaj kaj femalaj mituloj ellasas siajn semojn kaj ovojn en la marakvo por fekundigo. Unu 4-6-centimetra femala mitulo povas ellasi 6-8 milionojn da ovoj. Post kelkaj metamorfozoj la zigoto kreskas en mitulidon. Tiam la mitulido ekvivas en maro, movate de akvofluoj, post ĉ. unu monato ĝi kreskas ĝis longeco de unu centimetro kaj eniras en la periodon de algluiĝo. Ĝi sekrecias piedfibrojn, per kiuj ĝi sin alkroĉas al senmova objekto. Pro tio en aprilo kaj junio oni pendigas ŝnurojn en maro por kolekti mitulidojn kaj ilin bredi. La mitulidoj plenkreskas post pli ol unu jaro kaj en la sekvanta aŭtuno oni havas rikolton. Ĉiu cento da kilogramoj da mituloj donas 20 kilogramojn da karno.

### DUGONGO KAPTITA

En aprilo ĉi-jare Gao Zhouxing, fiŝisto de Dongfang-gubernio, Guangdong-provinco, kaptis raran dugongon en la golfo je 60 metroj for de la marbordo. Ĝia bruna kaj senhara korpo longas 1.75 metrojn kaj pezas pli ol 100 kilogramojn, kun brusto larĝa je 43 centimetroj. Ĝia kapo estas ronda, ĝiaj okuloj malgrandaj, naztruoj supren levi-

ĝantaj, kranio dika kaj granda. Ĝiaj oreloj ne havas eksteran parton. Ĉe ĝia buŝo estas helflavaj mal-longaj, haregoj. Ĝi havas dentojn kaj la senemajlaj mueldentoj estas cilindroformaj. Ĝiaj antaŭaj membroj prezentas formon de naĝilo kaj la malantaŭaj jam degeneris. Ĝi havas platan voston kaj paron da mampintoj.

La dugongo estas mamulo. Ĝi vivas ĉe enfluejo de rivero kaj en malprofunda golfo, sin nutrante per algoj kaj aliaj akvaj kreskaĵoj. Ĉiujare ĝi naskas unu idon. Dum mamnutrado ĝi brakumas sian idon per siaj antaŭaj membroj, kun kapo kaj brusto super la akvosurfaco, kiel homo staranta en la akvo, tial ĝi portas la diritan nomon. Por spiri ĝi levas sian kapon super la akvosurfacon unu foje en ĉiu minuto. Ĝiaj okuloj brilas kiel steloj. Ĝi estas trovebla en tropikaj golfoj de Azio kaj apud la suda marbordo de Ĉinio. Oni povas manĝi ĝian karnon kaj fari ledon el ĝia haŭto kaj lubrikaĵon el ĝia graso.

### TESTUDO KUN VERDAJ HAROJ

Changshu-gubernio de Jiangsu-provinco produktas kuriozajn verdharajn testudojn. En formo ili neniom diferencas de la alispecaj testudoj, escepte de tio ke ilia dorso surhavas densajn maldikajn verdajn harojn eĉ ĝis alteco de 25 centimetroj. En blankporcelana poto iliaj haroj ŝvebas laŭ akvomoviĝoj, kvazaŭ amaso da musko kaj peco da smeraldoinkrustita en blanka jado, kio ĉarmas la rigardantojn.

La gubernio havas historion de pli ol 100 jaroj en bredado de tiaj testudoj. Nun, ĉiujare ili estas vendataj en la Kantona Eksporta Foiro de Ĉinio, kio ricevas laŭdojn de eksterlandaj komercistoj, sed ilia nombro ne sufiĉas por kontentigi la bezonon.



*Dugongo kaptita de fiŝisto Gao Zhouxing*

## ĈINA 12-A SATELITO LANĈITA

Ĉinio sukcese lanĉis alian sateliton por scienca eksperimento la 9-an de septembro 1982. La satelito precize eniris en la orbiton kaj bone funkciis. Ĉiuj mezuriloj kaj instrumentoj sur la satelito laboris normale. La 14-an de septembro ĝi akurate revenis al la difinita loko laŭ la plano.

## EKFUNKCIIS LA UNUA ELEKTRIZITA DUTRAKA FERVOJO DE ĈINIO

La fervojo, komencita de Shijiazhuang, la ĉefurbo de Hebei-provinco, en oriento kaj finita en Taiyuan, la ĉefurbo de Shanxi-provinco, en okcidento havas longecon de 235 kilometroj. Ĝia jara transporta kapablo estas 40 milionoj da tunoj. Ĝi estas ĉefa vojo por transporti karbon el Shanxi, la plej granda karbobazo de Ĉinio.

## 10 000-TONELA KONTENERŜIPO KONSTRUITA EN KANTONO

En la mezo de septembro, la Kantona Ŝipfarejo okazigis ceremonion por lanĉi la unuan kontenerŝipon de Ĉinio.

La kontenerŝipo nomata Papua estas farita por la Ŝiptransporta Limigita Kompanio de Plymouth, Usono. La ŝipo, 134.45 metrojn longa kaj 20.8 metrojn larĝa, povas enteni 670 dudek-futajn kontenerojn kun kapacito de 11 000 tunoj.

## INTERNACIA TEKNIKA KURSO DE METANO EN ĈINIO

La 13-an de septembro en la urbo Chengdu, Sichuan-provinco, ekfunkciis la nomita kurso fondita de la Disvolva Programo de UN, la Sociala kaj Ekonomia Konsilio de Azio kaj la Pacifika Regiono, la Nutraĵa kaj Agrikultura Organizo de UN kaj la koncerna fako de Ĉinio.

Ĝin partoprenis 20 personoj el Birmo, Tajlando, Bangladeŝo, la Filipinoj, Nepalo, Srilankao kaj Sudano. Ĝin partoprenis ankaŭ fakuloj de FR Germanio pri me-

tano, kiuj venis al Ĉinio laŭ interkonsento pri kunlaboro inter la du landoj.

Nun en Ĉinio konstruiĝis pli ol sep milionoj da porfamiliaj malgrandaj metanbasenoj, el kiuj preskaŭ triono troviĝas en Sichuan-provinco.

## INTERNACIA TEKNIKA KONFERENCO PRI EKSPLOATADO DE PETROLKAMPO OKAZINTA EN DAQING

Specialistoj el 23 landoj kaj el la Organizo de Arabaj Petrol-eksportaj Landoj ĉeestis la konferencon en Daqing, la plej granda petrolbazo de Ĉinio. Ili diskutis pri efikaj rimedoj kiel maksimume ekspluati kaj utiligi la subteran petrolfonton por ĉerpi pli da petrolo el la velkantaj oledonaj tavoloj. Ili taksis, ke tiuj tavoloj entenas ankoraŭ tiom da petrolo, kies kvanto multe pli superas duonon de la tuta rezervo.

Dum la konferenco ili rigardis instalajojn de la olekampo Daqing, kiu estas sperta pri la fruperioda akvoenŝprucigado kaj laŭtavola ekspluatado.


## *Horaro de la Ĉiutaga Esperanta Disaŭdigo de Radio Pekino*

| Pekina Tempo | GMT         | Al Regionoj     | Ondoj(m) | KHz   |
|--------------|-------------|-----------------|----------|-------|
| 4:00-4:30    | 20:00-20:30 | Eŭropo          | 40.1     | 7470  |
|              |             |                 | 32.0     | 9365  |
|              |             |                 | 30.1     | 9965  |
| 6:30-7:00    | 22:30-23:00 | Latin-Ameriko   | 30.4     | 9860  |
|              |             |                 | 26.0     | 11515 |
| 19:00-19:30  | 11:00-11:30 | Japanio, Koreio | 30.4     | 9860  |
|              |             |                 | 40.1     | 7315  |
| 21:00-21:30  | 13:00-13:30 | Sudorienta Azio | 25.6     | 11685 |
|              |             |                 | 19.7     | 15165 |




# *Dankon al la urba publika biblioteko de Kortrijk*


La 28-an de julio 1982, en la nomo de la Urba Publika Biblioteko de Kortrijk, la belga amiko s-ro Vanbiervliet Cesar donacis al la Ĉina Esperanto-Delegacio koloran foton pri jarkolektoj de EPC konservataj de la nomita biblioteko. Dum la pasintaj pli ol tridek jaroj la biblioteko ĉiujare bindis la jarkolektojn de EPC por servi al legantoj. Tio montris la amikecon de la belga popolo al la ĉina popolo. Pro tio la redakcio de EPC esprimas koran dankon kaj bondezirojn al la respondeculoj kaj laborantoj de la biblioteko, esperante ke la gazeto fariĝos ponto por la amikeco inter la ĉina kaj alilandaj popoloj.



*Jarkolektoj de EPC konservataj en la  
Urba Publika Biblioteko de Kortrijk*



*S-ro Vanbiervliet Cesar kaj ĉinaj esp-istoj  
en la kongresejo*



*La Imperiestra Palaco en Shenyang*

## LA IMPERIESTRĀ PALACO EN SHENYANG KAJ LA TRI MAŪZOLEOJ DE QING-DINASTIO

de CAO BAILONG



**L**A vasta nordorienta Ĉinio estas origina loko de manĉur-nacieco, kiu fondis la lastan feŭdan dinastion de Ĉinio. En Shenyang, la politika centro de la frua periodo de Qing-dinastio, nun ankoraŭ konserviĝas la Imperiestra Palaco kaj tri imperiestraj maŭzoleoj, kiuj pasinte estis malpermesataj lokoj por la popolo, sed nun fariĝis famaj vidindaĵoj.

En la Nordoriento eĉ hodiaŭ ankoraŭ cirkulas multaj legendoj pri la familio de Nurhaĉi (1559 — 1626), la unua imperiestro de Qing-dinastio. Laŭdire, antaŭ tre longe tri feinoj ofte banis sin en la lago Tianchi en Changbai-montaro de la Nordoriento. Iutage pigo alportis en la buŝo kratagan frukton kaj metis

ĝin sur la veston de la tria feino. Vidinte la brilantan belan frukton, la tria feino ne volis ĝin forĵeti. Ŝi enbuŝigis ĝin. Neatendite ĝi glitis en la stomakon. Pro tio ŝi gravediĝis kaj poste naskis bebon, kiu jam povis paroli naskiĝinte. Post kiam li plenkreskis, lia patrino rakontis al li la tutan historion kaj diris: “Nu, portu familian nomon Aishin Giolo kaj propran nomon Bukuli-Yongsun. Dio kreis vin, por ke vi fariĝu ŝtatreganto. Faru do tion, kion vi devas fari.” Post tio ŝi forflugis. Bukuli-Yongsun estis la prapatro de Nurhaĉi.

Tiam en la Nordoriento vivis multaj triboj, kiuj ofte militis unu kontraŭ alia. Malfeliĉo okazis al la familio de Nurhaĉi: Liaj avo kaj patro estis mortigitaj de la malamiko. La juna Nurhaĉi entombigis la mortintojn, armis siajn soldatojn per 13 kiraso hereditaj de la patro kaj venĝis ilin kontraŭ la malamiko. Fine sub lia komando lia trupo ekstermis la malamikon kaj konkeris aliajn tribojn. En 1616 li surtroniĝis en Hetuala (proksime al la nuna Xinbin-gubernio de la provinco Jilin), titolinte sin per ĥano, kaj fondis politikan reĝimon la Granda

Jin, kaj per tio li malkaŝe staris kontraŭ Ming-dinastio.

Ming-dinastio ekspedis armeon kun 470 000 soldatoj por ekstermi la reĝimon de Nurhaĉi. Tamen Nurhaĉi embuskigis siajn trupojn en la monto Saerhu kaj fiaskigis la armeon de Ming-dinastio. Poste liaj trupoj konkeris 70 gravajn urbojn inkluzive de Shenyang. En 1625 li prenis Shenyang kiel sian novan ĉefurbon kaj konstruigis tie la Imperiestran Palacon. En 1626 li mortis pro vundo ricevita de malamika kanonado kaj estis entombigita en la Orienta Imperiestra Maŭzoleo en Shenyang.

Lia filo Huangtaiĵi surtroniĝis. Li estis politikisto kun malproksimvido kaj granda ambicio. Por solidigi la regpotencon li ŝanĝis la landnomon Granda Jin en la Grandan Qing. En politiko kaj kulturo li tre atentis pri lernado de civilizacio de la centra Ĉinio; en milito liaj trupoj plurfoje venkis la armeon de Ming-dinastio kaj iam eĉ atingis Pekinon, la ĉefurbon de la tiama Ming-dinastio. Dum sia 17-jara regado li efike administris la ŝtaton, kio metis fundamenton por la venko



de Qing-dinastio. En 1644, la dua jaro post lia morto, la armeo de Qing-dinastio konkeris Pekinon kaj pereigis Ming-dinastion, tiel ke Qing-dinastio unuigis Ĉinion. Huangtaiji estis entombigita en la Norda Imperiestra Maŭzoleo en Shenyang.

Antaŭ ne longe mi kun granda intereso vizitis la Imperiestran Palacon en Shenyang kaj la tri maŭzoleojn.

Aŭte veturinte orienten kvar horojn de Fushun, la karbourbo de Liaoning-provinco, mi atingis Xinbin-gubernion. Proksime al la gubernio estas la antikva ĉefurbo Hetuala konstruigita de Nurhaĉi. Ĝi situas sur alta tereno ĉirkaŭata de montoj kaj estas strategia loko malfacile konkerebla. La rivero Suzi preterfluas ĝin. Tie videblas ankoraŭ la ruinaĵo de la pasinta citadelo. Laŭdire, Nurhaĉi siatempe trejniis tie siajn trupojn. En la loko estas puto, kiu siatempe provizis la trupojn per akvo, kaj kiu nun ankoraŭ servas al la ĉirkaŭaj loĝantoj.

La Maŭzoleo Yongling kun areo de 10 000 kvadrataj metroj konstruita en 1589 estas unu el la tri maŭzoleoj. Ĝi troviĝas apud Hetuala. En ĝi estis entombigitaj la praavo, patro kaj du onkloj de Nurhaĉi. La maŭzoleo estas ĉirkaŭata de ruĝa muro. Sude de ĝi staras fronta ruĝa pordego, malantaŭ kiu estas korto, kie sidas horizontale kvar kioskoj kun tomoŝtonoj ene, sur kiuj gravuriĝas la titoloj de la mortintoj.

Norde de la kioskoj estas kva-

drata korto, en kiu estas la halo Qiyun por kultado. Malantaŭ la halo estas la tombego.

La Orienta Maŭzoleo troviĝas en la orienta antaŭurbo de Shenyang, kie eterne dormas Nurhaĉi kaj lia edzino. Enirinte tra la fronta pordego, suprenirinte laŭ la 108 ŝtonaj ŝtupoj, oni atingas terason, kie estas la ĉefa konstruaĵaro de la maŭzoleo. Ambaŭflanke de la vojo 300 metrojn longa ombrumas antikvaj altaj pinoj, bone viciĝas ŝtonaj skulptaĵoj, inkluzive de drakaj kolonoj, ŝtonaj kameloj, ĉevaloj, leonoj k.a. Pli antaŭe staras turo kun epitafo pri la kariero de Nurhaĉi. Pli norde estas kvadrata citadelo. En ĝi estas granda halo Long'en ĉirkaŭata de gravurita balustrado, kiu servis kiel kultejo. Ambaŭflanke de la halo estas du flankaj haloj. Malantaŭ kvadrata citadelo estas teramaso ĉirkaŭata de duonronda muro sub kiu estis entombigitaj Nurhaĉi kaj lia edzino.

La Norda Maŭzoleo situas en la norda antaŭurbo de Shenyang, kie estas entombigitaj Huangtaiji, filo de Nurhaĉi, kaj lia edzino.

La maŭzoleo estis konstruita en 1643. Ĝi estas simila en la konstrua stilo al la Orienta Maŭzoleo kaj pli granda ol la lasta.

La Imperiestra Palaco de Shenyang estas la dua granda palaco de Ĉinio post la Imperiestra Palaco en Pekino. Ĝia konstruado komenciĝis en 1625 kaj finiĝis en 1636. La palaco dividiĝas en partojn orientan, mezan kaj okcidentan.

Apenaŭ enirinte tra la pordego de la orienta parto, oni povas vidi

la okangulan halon Dazheng kun duobla tegmentrando en la placo. La ok glazuritaj tegmentospinoj de la halo ĉiu surhavas unu skulptitan mongolan fortulon kun vizaĝo frontanta al la pinto de la tegmento. Tio simbolas, ke la diversaj lokoj submetiĝas al lia regado. Antaŭ la halo staras du karmezinaj kolonoj ornamitaj per ore desegnitaj drakoj.

La halo Dazheng estis loko, kie la imperiestro kaj korteganoj diskutis pri gravaj aferoj. Ambaŭflanke de vojo antaŭ la halo sidas sume dek kvadrataj kioskoj, kie laboris la princoj komandantaj la ok flagojn (flagoj estis militaj kaj politikaj organizaĵoj fonditaj de Nurhaĉi kaj distingitaj unu de alia per malsamkoloraj flagoj). La konstruaĵaro kun formo de jurto estas unika inter la restintaj palacaj konstruaĵaroj de Ĉinio.

La halo Chongzheng en la meza parto estis loko, kie laboris Huangtaiji. En 1636 li okazigis tie solenan ceremonion kaj ŝanĝis la Grandan Jin en la Grandan Qing. Malantaŭ la halo, sur alta teraso, estas konstruaĵaro, kie loĝis Huangtaiji kaj liaj edzinoj. Tuj apud la pordego estas trietaĝa domo Fenghuang en plej alta situo en la palaco kaj estis loko de la imperiestro kaj liaj edzinoj por festeno. Malantaŭ la domo estas la palaco Qingning, kie estis la dormĉambro de Huangtaiji kaj lia edzino. Tie estas montrataj pali-sandraj mebloj kaj vivbezonaĵoj siatempe uzitaj de ili.

La okcidenta parto de la palaco estis siatempe kultura centro. Tie la halo Wensu estis kortega biblioteko, kie konserviĝas unu kompleto de la Ĉina Granda Enciklopedio "Si Ku Quan Shu".

Nun la Imperiestra Palaco de Shenyang servas kiel la Muzeo de la Imperiestra Palaco, en kiu konserviĝas Qing-dinastiaj trezoroj, kaligrafiaĵoj kaj aliaj historiaj objektoj, ekz., la glavo de Nurhaĉi, drakaro de la imperiestro Qianlong, portretoj de la imperiestroj en la komenca periodo de Qing-dinastio.



*Kvar kioskoj kun tomoŝtonoj en la maŭzoleo Yongling*



# La Imperiestra Palaco en Shenyang kaj la Tri Maŭzoleoj de Qing-dinastio

Fotoj de Qu Weibo

La halo Dazheng konstruita en 1625





Kolono ornamita per gravuritaj drakoj en la Imperiestra Palaco






La Norda Maŭzoleo konstruita en 1643





# Ĉinstilaj Pentraĵoj

- 1 Pejzaĝo de Guilin  
de Bai Xueshi
- 2 Konvolvulo  
de Qi Liangwei
- 3 Kvieta arbaro  
de Zhang Bu
- 4 Ludado de kordinstrumento  
de Wang Shuhui







山歌  
戊午夏月  
有文画